

V-18673

Esperanto

JARLIBRO

1960

DUA
PARTO

**UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO**

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO
(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

- U.E.A. eldonas monatan Revuon
- U.E.A. eldonas Jarlibron en du partoj
- U.E.A. havas vastan delegitan reton
- U.E.A. organizas la Universalajn Kongresojn
- U.E.A. kreis la Centron de Esploro kaj Dokumentado
- U.E.A. ebligis la reprezentigon en Montevideo
- U.E.A. iniciatis la Internacian Someran Universitaton
- U.E.A. organizas la Belartajn Konkursojn
- U.E.A. aranĝis la Universalan Ekspozicion
- U.E.A. kreis Agadon en Proksima Oriento
- U.E.A. funkciigas Internacian Gazetaran Servon
- U.E.A. funkciigas Eldonan Fakon
- U.E.A. havas Filman Servon
- U.E.A. havas Korespondan Servon
- U.E.A. havas Magnetofonan Servon

CIO ĈI MERITAS VIAN SUBTENON

Tial: Aliĝu al U.E.A.!

- Membro kun jarlibro: 7,50 gld., 30 steloj
- Membro kun jarlibro kaj revuo: 15 gld., 60 steloj

Centra Oficejo de U.E.A.

Eendrachtsweg 7 - Rotterdam - Nederlando

Prof. Mieczysław Sygnarski

Lektoro de Esperanto en Jag. Uniq.

str. Francesco Nullo 12/3

KRAKÓW — POLLANDO

JARLIBRO

DE LA UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO

1960

DUA PARTO

La enhavo de ĉi tiu Jarlibro ne povas esti represata ĉu tute, ĉu parte, sen la permeso de U.E.A.

NUR POR UZO DE MEMBROJ

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando
(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)



La „ROYAL BATH” en Harrogate, unu el la kongresaj ejoj

de la

**46-a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO**

Harrogate — 5-12 aŭgusto 1961 — Britujo



La Kongreso en Ĝardeno

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam

Unua kaj unika libro pri fiŝoj en Esperantujo

Sekretoj de la Marestaĵoj

de Petar Giunio

reverkita de Lic. Marinko Ĝivoje

aperos baldaŭ sub aŭspicioj de UEA

"Scienca laŭ enhavo ĝi estas beletra laŭ vestaĵo"
— diras pri ĝi E. Balech en la enkonduko.

En ĉi tiu interesega, streĉa kaj instrua romano pri marestaĵoj la aŭtoro senvualigas al ni la sekretojn de la maro — lulilo de la vivo sur nia planedo. Riĉaj plurkoloraj ilustraĵoj.

Naĝado kaj fotografado sub la marnivelo iĝas pli kaj pli populara. Ekkonu tiun mondon!

Jen titoloj de kelkaj ĉapitroj: Nevidebla martrezo; Defendo per kemiaj armiloj; Interesaj kooperativoj; Bestoj kun inkujo; Lertaj aviadistoj; Fiŝoj aŭdigantaj voĉon; Venenaj fiŝoj; Fiŝo kun segilo ktp.

Provizora prezo: 5.— gld., 20 steloj.

El ĉiuj landoj kiuj povas pagi al Okcident-Eŭropo mendu pogrande kaj podetale ĉe U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando.

El popol-demokratiaj landoj mendu same ĉe S-ro Marinko Ĝivoje, Gornji Trg 31/II, Ljubljana, Jugoslavio.

ANTAŬPAROLO

Preskaŭ pasis unu jaro post la Zamenhof-Jaro kaj evidentiĝis ke la nuna estis fakte daŭrigo de tiu jubilea jaro. La granda kulmino de la celebrado meze de decembro ja kaŭzis ondojn ankoraŭ tra pluraj postaj monatoj.

Krome, estis ja la supera monda organizaĵo por edukado, scienco kaj kulturo, U.N.E.S.C.O., kiu plilongigis la Zamenhof-Jaron per sia historia decido celebri en 1960 la datrevenon de Zamenhof inter tiuj de grandaj personecoj, tiel rekonante la geniecon kaj noblecon de la verko de Zamenhof kaj la tutmondecon de lia spirito.

Daŭrigo de la Zamenhof-Jaro estis la jaro 1960 ankaŭ pro la decido, farita de U.E.A. surbaze de la Kongres-rezolucio de Varsovio, entrepreni la necesajn paŝojn por laŭgrada enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Pri la unuaj paŝoj faritaj sur tiu kampo oni povis raportti jam dum la ĉijara Universala Kongreso en Bruselo.

La centraj organoj de U.E.A. plenumis sian parton de la Baza Programo por la Zamenhof-Jaro kaj raportas pri tio en la Estrara Raporto troviĝanta en tiu ĉi eldonaĵo. Pri la grandnombraj celebradoj kaj diversspecaj aranĝoj organizitaj dum 1959 ĉie en la mondo, oni povas legi en la raportaro de la landaj asocioj, aldonita al ĝi. Multe pli detalan kaj kompletan bildon oni ricevas pere de la granda jubilea eldonaĵo La Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro, kiun aperigis C.E.D. meze de 1960. En neniu esperantista hejmo manku tiu verko, tiu spirita monumento dediĉita al la aŭtoro de la Internacia Lingvo.

La mondskala informado pri Esperanto en 1959 kaj la rapida politika evoluo en la mondo kaŭzis interesigon pri la Internacia Lingvo ankaŭ ekster Eŭropo. Sekve de tio intensa agado estas entreprenata en la novaj landoj de Afriko.

La grandaj streĉoj de la Asocio dum kaj post la Zamenhof-Jaro kaj la novaj iniciatoj meritas la planan apogon de la tutmonda esperantistaro. Ni fidas ke ĉiuj legantoj de tiuj ĉi linioj samopinias pri tio kaj ke vere ĉiuj instigu siajn esperantistajn ĉekonatojn al firma subteno de U.E.A. Ĉar — ja estas la unueco kaj solidareco, kiuj donas la forton al movado kiel la nia.

M. H. Vermaas

REZOLUCIO

- IV. 1.4.422 La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favora al Esperanto
- IV. 1.4.4221 Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;
- IV. 1.4.4222 Rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de U.N.E.S.C.O.;
- IV. 1.4.4223 Notas, ke pluraj Statoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Statojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;
- IV. 1.4.4224 Instruicias la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.

El: Rezolucioj de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, Montevideo, 1954.

La Memorlibro

pri la

Zamenhof-jaro

Monumento al la aŭtoro de la
Internacia Lingvo

Riĉa fotomaterialo

Elegante bindita en bonkvalita tolo kun
stampo en oro

Prezo: 12,50 gld.
50.— steloj

Havigu al vi ĉi tiun valoran verkon!

Eldonis C.E.D.

Mendu ĉe U.E.A.

Eendrachtsweg 7 — Rotterdam

KOTIZOJ 1961

Lando	MJ	MA	MS	Patr.	Jarl.	Ab.	Valuto
Argentino	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Aŭstralia	19.—	38/—	57/—	380/—	202/—	28/6	aŭs. ŝil.
Aŭstrujo	54.—	108.—	162.—	1080.—	550.—	81.—	Sch.
Belgujo	100.—	200.—	300.—	2000.—	1100.—	160.—	b.fr.
Brazilo	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Britujo	15/—	30/—	45/—	300/—	160/—	22/6	ŝil.
Bulgarujo	7.50	15.—	22.50	150.—	—	11.50	n.gld.
Ĉeĥosl.	7.50	15.—	22.50	150.—	—	11.50	n.gld.
Danlando	15.—	30.—	45.—	300.—	160.—	22.50	d.kr.
Finnlando	690.—	1380.—	2070.—	13800.—	7360.—	1060.—	f.mk.
Francujo	10.—	20.—	30.—	200.—	106.—	15.50	N.F.
German.	9.—	18.—	27.—	180.—	90.—	14.—	g.mk.
Hispanujo	120.—	240.—	360.—	2400.—	1200.—	180.—	pes.
Islando	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Israelo	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Italujo	1350.—	2700.—	4050.—	27000.—	16000.—	2040.—	liroj
Japanujo	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Jugosl	1275.—	2550.—	3825.—	25500.—	—	—	din.
Kanado	2.25	4.50	6.75	45.—	22.—	3.50	dol.
Kubo	2.25	4.50	6.75	45.—	22.—	3.50	dol.
Maroko	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Nederl.	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.

PAGU LA KOTIZON AL

- J. C. Milkuschütz, Sarmiento 3298, Olivos.
- K. G. Linton, 11 Poplar St., South Caulfield S.E. 8, Melbourne.
- Oskar Sinner, Schönbrunner-Allee 53, Wien XII, Pĉk: 38751.
- R.B.L.E., Steenweg op Brussel, 114, Meise; aŭ F. Couwenberg (F.L.E.), Koninginnelaan 14, Blankenberge, Pĉk. 4161.35.
- Brazilo Esperanto-Ligo, Praça da República 54-I, Rio de Janeiro.
- Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Ave., London, W. 11.
- Bulgara Esperanto-Asocio, Poŝtkesto 66, Sofia.
- J. Šustr, Dlouhá 10, Praha I.
- Søren Andresen, Friggssvej 10 st. tv. Fredericia. Pĉk: 12692.
- Joel Vilkki, Somero, Poŝtĝiro 60253.
- U.E.F., 34 Rue de Chabrol, Paris 10. Pĉk. 855-35.
- Fr. Helfers, Potschliessfach 692, (17a) Karlsruhe, Pĉk. 24506.
- Ramon Molera, Calle Hospital 13, Moyá (Barc.).
- Fed. de Islandaj Esperantistoj, Pósthólf 1081, Reykjavik.
- Enlandaj gazetagentejoj.
- I.E.F., Corso Galileo Galilei 22, Torino.
- Japana Esperanto-Instituto, Hongo Motomati 1-13, Tokio.
- S-ino E. Lapenna, Nova Ves 32-III, Zagreb.
- W. D. B. Hackett, 362 Soudan Ave., Toronto, Ont.
- Raul Juárez - Sedeño, Apartado 570, Luaces 155, Camagüey.
- René Cagnon, 9 Rue Coli, Rabat.
- J. Telling, Schietbaanlaan 106a, Rotterdam-3, Pĉk. 2426-19.

Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto :

Prof. D-ro Giorgio Canuto

Generala Sekretario :

Prof. D-ro Ivo Lapenna

Komitato :

- Albault, D-ro A., 8, Avenue Et. Billières, **Toulouse**, Francujo. Tel. : 42-98-71.
- Albers, B.J.J., Olympiaweg 69-III, **Amsterdam**, Z., Nederlando.
- Allan, J. T., 12 Lonsdale Crescent, **Wellington**, E.3, Nov-Zelando. Tel. : 73-679.
- Auld, Mag. William, 35 Deer Park, Sauchie, **Alloa**, Clackmannanshire, Skotlando.
- Azzi, D-ro Ing. Giordano, Viale Giulio Cesare 20, **Como**, Italujo. Tel. : 23459.
- Baghy, Julio, Rottenbiller u. 66/1/20, **Budapest** VII, Hungarujo.
- Baur, D-ro Arthur, Hangweg 57, **Liebefeld-Bern**, Svislando.
- Becker, Günther, Schlossbergstr. 51, **Blieskastel**, Saar, Germanujo.
- Bugge-Paulsen, Kap. Rolf, Dunkersgt. 3-II, **Oslo** N.V., Norvegujo. Tel. : 694526.
- Canuto, Prof. D-ro Giorgio, Via Chiabrera, 37, **Torino**, Italujo. Tel. : 46838.
- Dahl, Einar, Box 900, **Uddevalla**, Svedujo.
- Deubler, K., Agnesstrasse 5/III, (13b) **München**, Germanujo.
- Dolapčiev, Georgi, Bul. Kl. Gotvald 54, **Sofia**, Bulgarujo.
- Domingues, D-ro Carlos, Rua Alvaro Alvim 27, ap. 61, **Rio de Janeiro**, Brazilo. Tel. : 32-9560.
- Egami, Prof. F., Nisikatamati 10-Ni-50, Bunkyo-ku, **Tokio**, Japanujo.
- Epstein, Ludolfstrasse 50 II, (24a) **Hamburg** 20, Germanujo. Tel. 487371.
- Figuerola, A., str. Costa Rica 20 bajo A, **Madrid**, Hispanujo.
- Grigorov, A., bulv. Tolbuhin 10, **Sofia**, Bulgarujo.
- Guillaume, Jean, 8 rue Camille Saulnier, **Le Vésinet** (S.&O.) Francujo.
- Herrmann, D-ro W., Bürdstädter Str. 3, (16) **Lampertheim**, (Hess.), Germanujo. Tel. : 639.

- Höfert, Franz, Penzingerstr. 121, **Wien** XIV/89, Aŭstrujo. Tel. : L 11.609 B.
- Holmes, Harry W., O.B.E., 38 Fillebrook Road, **London** E 11, Britujo. Tel. : LEYtonstone 2240.
- Jakob, Hans, Palais Wilson, **Genève**, Svislando.
- Jaumotte, Maurice, 44 de Bruynlaan, **Wilrijk-Antwerpen**, Belgujo.
- Kühlmann, G., Lovetandsvej 31, **København**. BRH. Danlando. Tel. : 600702.
- Lange, O.C., Giesegaardsvej 33, **Hvidovre**, Danlando. Tel. : (ol) 782073 (loĝejo), Hilda 3802 (komercoj).
- Lapenna, S-ino Emilija, Nova Ves 32, **Zagreb**, Jugoslavio.
- Lapenna, Prof. D-ro Ivo, 77, Grasmere Av., **Wembley**, Mddx., Britujo. Tel. : ARNold 9081.
- Linton, Kenneth G., 11 Poplar St., South Caulfield S.E. 8, **Melbourne**, Aŭstralio.
- Llech-Walter, René, 5 Quai Vauban, **Perpignan** (Pyr. Or.), Francujo. Tel. : (loĝejo) 54-38; (oficejo) 38-84.
- Maertens, G., Pr. Leopoldstraat 51, **Sint Kruis**, Belgujo.
- Martins, D-ro Luiz Alberto Brandao, Rua Sarive, 16, ap. 201 Tijuca, **Rio de Janeiro**, Brazilo.
- Minna, Nicola, viale Giulio Cesare 223, **Roma**, Italujo.
- Monkiewicz, Boleslaw, ul. Filarecka 3 m. 16, **Warszawa-Zoliborz** 32, Pollando.
- Oliveira, Jorge Campos de, Rua Haddock Lobo, 320, ap. 502, **Rio de Janeiro**, Brazilo.
- Pádua, Geraldo, Rua Rio de Janeiro 1599, **Belo Horizonte**, (Minas Gerais), Brazilo.
- Pancer, D-ro Ing. Oton, ulica Jna 39, **Sarajevo**, Jugoslavio.
- Parker, F., 368 Colne Road, **Burnley**, Lancs., Britujo.
- Peterson, Charles E., 8314 B. Florence Avenue, **Downey**, (Calif.) Usono.
- Petit, P., 26 rue Rochebrune, **Rosny-sous-Bois**, Seine, Francujo.
- Popović, Prof. B., Zagrebačka 12, **Sarajevo**, Jugoslavio.
- Rajski, Andrzej, Odyńca 3, **Warszawa**, Pollando. Tel. 401-81.
- Régulo Pérez, D-ro J., Apartado 25, **La Laguna**, Tenerife, Kan. Insuloj.
- Reuchlin, Richard, T. 6/18, (17a) **Mannheim**, Germanujo. Tel. 25045.
- Sakowicz, Roman, Skrytka 26, **Nowa Sól**, Pollando. Tel. : 344.

Sato, D-ro J., Guayra 2076, **Buenos Aires**, Argentino.
Sekelj, Antonije, Kondina 24, **Beograd**, Jugoslavio.
Sekelj, Tibor, koresponda adreso: Kondina 24, **Beograd**, Jugoslavio.

Setälä, Vilho, Esperantotie 4, **Matinkylä** (Helsinki), Finnlando.

Smith, Norman R., 75 South Ealing Road, **London W 5**, Britujo.

Söderberg, Karl, Luthagsesplanaden 15a, **Uppsala**, Svedujo.
Tel.: 36843.

Støp-Bowitz, C., Stensgt. 22b, **Oslo**, Norvegujo. Tel. 695367.

Strönne, Jan, Amiralsgatan 36, **Malmö**, Svedujo. Tel.: 29211.

Thierry, Jean, 26 rue Molière, **Paris 1**, Francujo.

Törnskog, Harry, Box 52, **Stockholm-Alvsjö**, Svedujo.
Tel.: 473288.

Woessink, E. J., Vondellaan 47, **Arnhem**, Nederlando.
Tel. 21256.

Wolf, E. de, Joh. de Breukstraat 18, **Haarlem**, Nederlando.

Yagi, Prof. Hideo, 76 Kawaramachi, **Okayama**, Japanujo.

Zacho, S-ino Kirsten, Randbølvej 4, **København**. F. Tel. DAMSOE 9082.

Zlatnar, P., Rimska c 7/II, **Ljubljana**, Jugoslavio.

Observantoj:

Derks, J. J., "Santa Monica", Boulevard d'Italie 6 bis, **Monte Carlo**, Monako.

Ramanitra, Henri, B.P. 4, **Tananarive**, Madagaskaro.

Smilga, K., 34 Martin Road, **Toronto**, 7 (Ont.) Kanado.

Zeballos Morales, D-ro Roman, **Fray Marcos**, (Florida), Urugvajo.

LIBRO-SERVO

de U.E.A.

Liveras ĉiajn librojn

ĈIAM JE VIA SERVO

Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando

HONORA PATRONA KOMITATO

Prof. D-ro W. E. Collinson, emerita profesoro de la Universitato de Liverpool, Britujo, M.A. de la Universitato de Londono, Dr. Phil. de la Universitato de Heidelberg, "Fellow" de la "University-College" en Londono.

Prof. D-ro M. Fréchet, emerita profesoro de la Universitato de Parizo, membro de la Sciencaj Akademioj de Francujo, Pollando kaj Nederlando, prezidinto de I.S.A.E.

Prof. D-ro Seiho Nishi, estinta profesoro de la Universitatoj de Sendaj kaj Tokio, nun rektoro de la Universitato de Gumna, prezidanto de Maebasi Medicina Kolegio, prezidanto de I.S.A.E.

Prof. D-ro Björn Collinder, profesoro pri finn-ugraj lingvoj en la Universitato de Upsala, Svedujo.

ESTRARO DE U.E.A.

Prezidanto:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, Via Chiabrera 37, Torino, Italujo.

Generala Sekretario:

Prof. D-ro Ivo Lapenna, estrarano pri kongresoj, 77 Grassmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Vic-Prezidantoj:

H. W. Holmes, O.B.E., 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

Membroj:

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando. Tel.: 21256.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 3/5, Warszawa, Pollando.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

Direktorino de la Centra Oficejo: F-ino M. H. Vermaas.

Konstanta Kongresa Sekretario: G. C. Fighiera.

Redaktoro de "Esperanto": S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København. F.

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

London, Britujo

Honorofica direktoro :

Univ. Prof. D-ro Ivo Lapenna, jura konsilisto, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo. Tel. ARNOLD 9081.

Kunlaborantoj en ĉiuj landoj.

Celo :

A. Sciencaj esploroj : Lingvistikaj kaj sociologiaj studoj pri la Internacia Lingvo kaj ĝiaj multflankaj aplikoj sur ĉiuj kampoj de la homa aktiveco. Psikologiaj kaj sociologiaj studoj pri la moralaj kaj intelektaj efikoj, kiujn kaŭzas la praktika uzado de la Internacia Lingvo. Esplorado de la eblecoj por plua utiligo de la Internacia Lingvo precipe sur la kampoj de scienco kaj arto, intelektaj interŝanĝoj, trafiko kaj komerco.

B. Dokumentado : Enregistriĝo de la plej gravaj dokumentoj koncerne la Internacian Lingvon kaj la Esperanto-organizaĵojn. Ellaborado de statistikoj. Kolektado de studoj kaj disertacioj.

C. Informado : Vasta utiligo de dokumentoj menciitaj sub B por verkado de artikoloj; kunmetado de tipaj prelegoj por diversaj okazoj; pretigado de bazaj flugfolioj, alvokoj kaj broŝuroj; aktiva partoprenado en ĉiuj medioj, kiuj pritraktas la problemon de komuna lingvo; interŝanĝado de informoj kaj dokumentoj kun UNESKO, UN kaj aliaj gravaj internaciaj organizaĵoj : liverado de konvena materialo al la landaj kaj fakaj asocioj.

Raporto pri la agado troviĝas en la Estrara Raporto sur paĝoj 64-66 de tiu ĉi Jarlibro.

INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO EN WIEN, WIEN I, HOFBURG, AŬSTRUJO



La Muzeo de la tutmonda esperantistaro, fondita 1927 en Wien per kontrakto kun la Ministerio por Instruado aligita kiel aparta kolekto al la mondfama Aŭstra Nacia Biblioteko por eternaj tempoj, atendas vin ĉiun lundon, merkredon kaj vendredon en siaj 5 salonegoj en la iama imperiestra kastelo Hofburg inter la 9e kaj 15a h. Telefono : R 27944.

La Ronda Salonego prezentas memorlokon por la pioniroj de la movado, PANTEONON; la plej granda salono KONSTANTAN EKSPozICION kun 700 el la plej valoraj kaj interesaj libroj.

La Ministerio disponigis tiujn ejojn por eternaj tempoj, bindigas la librojn, pagas la hejtadon, purgadon k.t.p. kaj nun ĉiujare eĉ donas subvencion.

Membreco : Mecenoj pagas unufoje 60 respondkuponojn; dumvivaj membroj 25 rpk. kaj subtenantoj po 6 rpk. jare. Nia "Informilo" 4-foje jare sendota al M. dum 3, al D. dum 2, al S. dum 1 jaro senpage. Informo kontraŭ rpk. Invitas Hugo Steiner, fondinto-prezidanto de IEMW.

FINANCOJ

Kompara tabelo pri spezoj 1959. Ĉio en Ned. Gld.

Rezulto 1959 Buĝeto 1959

Enspezoj :

Kotizoj AM	5.505,37	4.500,—
MA	62.450,84	50.625,—
MJ	5.213,59	4.500,—
MS	9.133,99	11.250,—
J-MA	1.110,56	1.125,—
J-MJ	85,99	500,—
Patronoj	842,85	500,—
SA	1.788,38	2.500,—
Donacoj	1.032,51	750,—
Profito libroservo	8.230,63	4.200,—
Enspezoj kongresaj :		
Sumo	31.603,42	
— por prop. konto	16.610,90*	
restas en ĝen. kaso	14.992,52	2.600,—
Enspezoj diversaj	1.610,66	2.700,—
Rentumo		400,—
	<u>111.997,89</u>	<u>86.150,—</u>

Elspezoj :

Salajroj	28.372,22	25.600,—
Afrankoj kaj telefono	3.786,19	4.000,—
Presajoj, skribilaro	3.283,01	1.500,—
Oficejaj enspezoj	3.535,81	4.600,—
Luo Centra Oficejo	636,80	650,—
Gazeto	30.756,06	28.000,—
Jarlibro	25.102,—	14.400,—
Vojaĝkostoj estraraj	1.322,81	1.000,—
aliaj	2.134,99	1.750,—
Serva Centro	869,—	875,—
Akademio	212,—	225,—
A.P.O.	357,76	
T.E.J.O.		500,—
Diversaj elspezoj	3.103,36	1.000,—
Estraraj elspezoj	4.967,38	500,—
Amortizoj	2.375,46	1.550,—

Profito	1.183,04	
	<u>111.997,89</u>	<u>86.150,—</u>

*) Licencpago	9.640,77
Makl. loĝado	6.970,13
	<u>16.610,90</u>

STATO DE LA ELDONA FONDAJO JE 31.12.1959

Eldona Fondajo 7.530.48 gld. (a.j. 6.448.42 gld.)

Je 1.1.1959 la saldo de tiu ĉi fondaĵo sumis 6.448,42
En 1959 aldonitaj al tiu ĉi fondaĵo estis :

Profito el "La Internacia Lingvo"		
vendoj	299,99	
kostprezo	107,04	192,95

Profito el "Vagado sub Palmoj"		
vendoj	66,32	
kostprezo	37,05	29,27

Profito el "Angla Antologio"		
vendoj	897,94	
kostprezo	536,—	361,94

Profito el "Belarto"		
vendoj	374,72	
kostprezo	225,—	149,72

Profito el diskoj		
vendoj	896,88	
kostprezo	548,70	348,18

7.530,48

(ĉio en n.gld.)

RAPORTO PRI LA KONTRORO DE LA ADMINISTRADO DE LA CENTRA OFICEJO 1959

Subskribintoj kontrolis la librotenadon pri la jaro 1959 kaj la bilancon je la fino de la jaro de la Centra Oficejo en Rotterdam.

Por nia laboro ni ricevis de la revizoro S-ro Storm detalan kaj bonegan raporton kiu enhavis ankaŭ kombinatan bilancon de nia Asocio por la unua fojo. De la Direktorino de la C.O. ni ricevis ĉiujn deziratajn informojn. Pro la amplekso ni ne povis ekzameni ĉiujn kontojn detale, sed ni opinias ke ĉio estas en bona ordo.

Volonte ni proponas, ke la Komitato malŝarĝu F-inon M. H. Vermaas pro la bona administrado de la C.O., danku ŝin pro ŝia gvidado kaj gratulu S-ron Storm pro la bonega faka raporto.

Rotterdam, la 18-an de junio 1960.

(subskribita)

B. J. J. Albers

(subskribita)

P. Petit

BILANCO je 31.12.1959. Ĉio en ned.gld.

Aktivoj

Mono en la banko (Mees)	6.104,91	
Sparbanko Rotterdam	3.633,18	
Poŝtĉekkonto Nederlando	8.365,28	
Poŝtĉekkonto Svedujo	115,08	
Abbey Nat. Building (Londono)	33.026,—	
Kaso	926,89	
		52.171,32
Steloj, respondkuponoj	276,20	
Ricevotaj enspezoj	2.938,—	
Antaŭpagitaj elspezoj	9.512,19	
Debitoroj	69.007,76	
Provizoj de libroj ktp.	19.952,92	
Inventario ktp.	14.332,24	
Amortizo	6.673,46	7.658,78
Garantiaj sumoj	300,—	
		161.817,17

Pasivoj

Suldoj je longa periodo :		
Garantia Fondaĵo		12.840,16
Suldoj je mallonga periodo :		
Kreditoroj :		
membro-bonhavantoj	21.813,17	
liverantoj	20.024,02	
antaŭric. enspezoj	26.307,86	
pagotaj elspezoj	1.341,28	
		69.486,33
Fondaĵoj por specialaj celoj :		
Eldona Fondaĵo		7.530,48
Fondaĵo Universala Ekspozicio		188,91
Fondaĵo Oficejo Ilaro		434,02
Propaganda konto		16.063,45
Fondaĵo Zamenhof		3.540,49
Fondaĵo Filma Servo		8,47
Kapitala Konto :		
Parto kapitalo destinita por aĉeti dom.	33.159,18	
Laborkapitalo 1.1.59	43.481,48	
DM kotizoj 1959	4.156,43	
Profito 1959	1.183,04	
	48.820,95	
— parto por aĉeti domon	30.255,27	18.565,68
		51.724,86
		161.817,17

GARANTIA FONDAĴO DE U.E.A.

(Administranto : E. Malmgren)

Spezoj 1959

Enspezoj :

Rentumo de la sveda banko	Sved.kr.
Rentumo de la svisa banko 1.600,95 frcs	315,19
	1.920,—
	2.235,19

Elspezoj :

Bankelspezoj 77,80 frcs	90,—
Al la Kapitalo	2.145,19
	2.235,19

Bilanco 31.12.'58 31.12.'59

Aktivoj:

		Sved.kr.	
En sveda banko	7.812,32	8.127,51	
En svisa banko 4.289,10 resp. 5.812,25	5.100,—	6.930,—	
Obligacioj, nom. 9.000,— kanad. dol.	45.000,—	45.000,—	
Prunto al Eldona Fondaĵo de UEA .	9.994,—	9.994,—	
Bonhavo ĉe Centra Oficejo			
5.500,— guld.	7.270,—	7.270,—	
	<u>75.176,32</u>	<u>77.321,51</u>	

Pasivoj:

Kapitalo	75.176,32	77.321,51
(77.321,51 svkr. = proks. 57.300,— n.gld.)		

Stockholm 31 dec. 1959

E. Malmgren
Administranto de la Fondaĵo

Kontrolita laŭ komisiono de la Komitato de U.E.A.:
Harry Törnskog (subskribita) Jan Strönné

KONTOJ DE CED PRI 1959

Konto de la C.O. 1-I — 31-XII-1959

CED entute ricevis de UEA	684- 8-11	
Donacoj, kiujn UEA ricevis por CED		59-19- 8
Subvencio de la Propaganda Konto		624- 9- 3
	<u>684- 8-11</u>	<u>684- 8-11</u>

Spezoj de CED por la periodo 1-I J 31-XII 1959

Donacoj	78- 4-10	
Subvencio de la Propaganda Konto	624- 9- 3	
Negativa saldo de j. 1958		2-19- 6
Skribmaterialo		12-10- 1
Poŝtelspezoj		43- 3- 9

Oficejo	170-13-10
Salajro de la sekretariino	384- 0- 0
Aliaj elspezoj	66- 3- 2

702-14- 1 679-10- 4

Positiva saldo je finiĝo de 1959 23- 3- 9

702-14- 1 702-14- 1

La 31-an de decembro 1959.

Sekretariino: Ljuba Lapenna

Rimarko:

Laŭ la konteltiro de la C.O. de la 31.12.1959 la subvencio de CED estis £ 672-12-3. Efektive en ĝin eniris la sumoj de £ 50 kaj £ 5-3-0, prenitaĵ de CED en decembro 1958 (vidu enskribojn 97 kaj 107), kiujn la C.O. metis en la konton por januaro 1959 (vidu konteltiron de C.O. 28-I-1959). Sekve, la subvencio en 1959 estis £ 679.12.3 malpli £ 55.3.0, t.e. £ 624.9.3, kiel montrite supre.

Kopiite el la Kaslibro de C.E.D.:

Ni kontrolis detale la suprajn kontojn kaj rimarkon, kaj trovis ilin ĝustaj.

En la oficejo de CED, la 28-an de Februaro 1960.

N. R. Smith Fred Parker

BUĜETPROONO DE CED POR LA JARO 1961

	Enspezoj			Elspezoj		
	£	ŝ	p	£	ŝ	p
Donacoj	100-	0-	0			
Subvencio el Propaganda Konto	550-	0-	0			
El Zamenhof-Fondaĵo	100-	0-	0			
Skribmaterialo					50-	0- 0
Poŝtelspezoj					51-	0- 0
Oficejo					165-	0- 0
Aliaj Elspezoj (libroj, abonoj, imposto, ŝarĝo en la banko, asekuro)					100-	0- 0
Salajro de la Sekretariino					384-	0- 0
	<u>750-</u>	<u>0-</u>	<u>0</u>	<u>750-</u>	<u>0-</u>	<u>0</u>

Rimarko :

La antaŭviditaj elspezoj estas taksitaj kiel minimumaj. En la buĝetpropono ne estas antaŭviditaj, kompreneble, la elspezoj por eventualaj eldonoj de libroj. Tiuj elspezoj devus esti kovritaj el aliaj fondaĵoj. Aliflanke, en la buĝeto estas antaŭviditaj ankaŭ la elspezoj (poŝtelspezoj, skribmaterialo k.s.), kiujn havas la direktoro en sia funkcio de ĝenerala sekretario de UEA.

Londono, la 31-an de marto 1960.

La Direktoro

SERVA CENTRO Jarkalkulo 1959**Elspezoj :**

Luo (Oficejo, prizorgo, purigo)	300,—
Oficeja elspezaro	372,80
Afranko	115,15
Materialo	131,85
Biblioteko	74,50
Diversaj elspezoj (Interhelpo k.a.)	319,80
	<u>1314,10</u>

Enspezoj :

Antaŭa kassaldo 1958	121,70
Rentumo	288,05
Subvencio	1000,00
Aliaj enspezoj	36,75
	<u>1446,50</u>
Kassaldo, transportata en jaro 1960	132,40
	<u>1446,50</u> <u>1446,50</u>

Genève, la 31-an de decembro 1959.

Fondaĵo H. Hodler :

Definitiva bilanco 1959 laŭ letero de H. Jakob de la 4-a de marto 1960.

(Resume)

Svisaj valorpaperoj	7000,—
Radio Genève	2050,—
Valorpaperoj	<u>9050,—</u>
Kontanta mono	490,—
plus gajno el ATT	<u>400,—</u>
	890,—
Ŝparlibreto Kooperativa banko	5600,—
Kapitalo de UEA Serva Centro	15540,—

KOMBINITA BILANCO DE LA TUTA ASOCIO

JE 31.12.1959. Ĉio en ned.gld.

Aktivoj :**Monrimedoj**

Rotterdam	52.171,32	
Garantia Fondaĵo	10.989,74	
Genevo	<u>5.646,30</u>	68.807,36

Valorpaperoj

Rotterdam	276,20	
Garantia Fondaĵo	35.190,—	
Genevo	<u>7.873,50</u>	43.339,70

Ricevotaj enspezoj

Antaŭpagitaj elspezoj 2.938,—

Debitoroj

69.007,76

Provizoj

19.952,92

Inventario

7.658,78

Garantia sumo

300,—

221.516,71

Pasivoj :**Kreditoroj**

41.837,19

Antaŭricevitaj enspezoj

26.307,86

Pagotaj elspezoj

1.341,28

Fondaĵoj por specialaj celoj

Eldona Fondaĵo 7.530,48

Fondaĵo Universala Eksp. 188,91

Fondaĵo Oficeja Ilaro 434,02

Propaganda konto 16.063,45

Fondaĵo Zamenhof 3.540,49

Fondaĵo Filma Servo 8,47

27.765,82

Kapitalo konto :**Parto kapitalo destinita por aĉeti**

domon 33.159,18

Laborkapitalo

C.O. Rotterdam 18.565,63

Garantia Fondaĵo 59.019,90

Fond. H. Hodler 13.519,80

124.264,56

221.516,71

44-a Universala Kongreso de Esperanto
 Varsovio — Pollando
 1-8 aŭgusto 1959

BILANCO

Enspezoj :	Zlotoj
Kotizoj	360531.60
Krompago	29889.10
Liter. kaso	1303.12
Blind. „	2543.50
Adopta „	1138.56
Ekskursoj	166602.67
Loĝado	412718.33
Bankedo	58515.12
Infana Kongreso	5464.04
Kurso Cseh	15304.82
Glumarkoj	11949.—
Anoncoj	52337.50
Stata dotacio	808273.56
	<hr/>
	2016605.92

Elspezoj :	
Materialoj	41768.04
Salajroj	63341.73
Helplaboroj	59742.20
Poŝtelspezoj	61801.64
Transporto-Vet.	29918.35
Propagando	24650.51
Kongresejo	235470.80
Dekoracioj	17421.99
Glumarkoj	8084.—
Aliĝiloj	11279.—
I. Bulteno	18557.80
II. „	25610.19
Kongresa Libro	145579.14
„ insigno	33986.65
Ceteraj eld.	10952.43
Kult. aranĝoj	232970.50
Somera Univer	3500.—
Ekskursoj	161955.52

Infana Kong	30484.51
Ekspozicio	73649.77
Kurso Cseh	15782.14
Gazetara Servo	11923.70
Bankedo	60059.82
Loĝado	407386.47
Gastoj	57764.74
Antaŭkongreso	14440.38
Lupago por oficejo	8561.45
Licenco	108159.48
Krompago	29889.10
Diversaj	11908.87

2016605.92

Varsovio, 9.VII 1960.

Kasisto de LKK

S. Rudnicki

Prezidanto de LKK

A. Rajski

N.B. Ĉar la financoj de la Kongreso staris sub kontrolo de la pola ministerio de financoj, la bilanco ne povas porti la kutimajn subskribojn de la revizoroj nek de la K.K.S. La Komitato de UEA notis la bilancon kiel informon, sen akcepto aŭ malakcepto.

RAPORTO DE LA ESTRARO

pri la agado de

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

en la laborjaro 1959/1960

I. ENKONDUKO

Tiu ĉi Raporto estas kunmetita de la ĝenerala sekretario (art. 30 de la Statuto) kaj aprobita de la Estraro en la kunsido de la 8-a de aprilo 1960. Ĝi rilatas al la agado de la Estraro, oficejoj, komisiitoj kaj aliaj organoj de la Asocio en la periodo inter la 1-a de aprilo 1959 kaj la 1-a de aprilo 1960. Estas necese diri enkonduke, ke ĉiuj estraranoj kaj aliaj respondecaj funkciuloj estis petitaj — kelkaj plurfoje — sendi al la ĝenerala sekretario koncizajn informojn pri sia agado, por ke la Raporto estu kiel eble plej kompleta. Tiajn informojn ne sendis s-ro R. Llech-Walter pri sia agado kiel estrarano pri financoj. La financa raporto koncernas la kalendaran jaron 1959. Estas aldonita ankaŭ la Raporto de CED, pri kiu ĝia direktoro respondecas al la Komitato.

En la laborjaro 1959/60 la Asocio kaj la Esperanto-Movado ĝenerale faris plian konsiderindan progreson kaj atingis rimarkindajn sukcesojn, el kiuj estas aparte menciindaj: 32.588 membroj el kio 7.442 individuaj, cifero rekorda, neniam antaŭe atingita en la historio de la Asocio; plia disvastigo de la lingvo en Azio; apogo al Esperanto fare de Vinoba Bhave kaj lia ellerno de la lingvo; vastigo de la Esperanto-elsendoj per radio; la plej granda postmilita universala kongreso; plia — la dua sinsekve — financa jaro sen deficiito. Tamen, la plej granda evento estis la mondskala celebrado de la Zamenhof-Jaro, kies krono estis la novembro decido de la Plenuma Komitato de UNESKO, per kiu la monda organizo por edukado, scienco kaj kulturo oficialigis la 100-jaran datrevenon de la naskigo de Zamenhof. En la lastjara

raporto estis dirite, ke la celo de la Zamenhof-Jaro estas ne nur esprimi omaĝon al la aŭtoro de la Internacia Lingvo, sed ankaŭ doni fortan puŝon antaŭen al Esperanto ĉie tra la mondo. La celo estas grandparte atingita. Tio, kune kun la ĵus menciita decido de UNESKO, kiu devus esti tre abunde utiligata, garantias la pluan disvastigon de la lingvo kaj malfermas la vojon al la lasta etapo: la enkonduko de Esperanto en la lernejojn. La unuaj laboroj por realigi tiun grandan kaj malfacilan taskon estas jam entreprenitaj.

Kiel en la antaŭaj jaroj, la Raporto konsistas el pluraj partoj kaj subdividoj, sed ĝi estas unueca tuto, pri kiu respondecas kaj la Estraro kiel tia kaj, aparte, ĉiu unuopa estrarano pri tiuj branĉoj de agado, pri kiuj li estas ŝargita.

II. ĜENERALAJOJ

(1) **Estraro**: Dum la Kongreso en Varsovio la Komitato elektis novan Estraron. Jam antaŭe D-ro Azzi informis, ke li ne plu povos akcepti estrarfunkcion pro siaj ampleksaj profesiaj okupoj. La Komitato decidis ke la nova Estraro konsistu ne el 6, sed el 8 membroj. La rezulto de la elektoj kaj posta disdivido de la taskoj estas jena konsisto de la Estraro: Prof. D-ro G. Canuto, Prezidanto; Prof. D-ro I. Lapenna, Ĝenerala Sekretario kaj estrarano pri Kongresoj; H. W. Holmes O.B.E. kaj Prof. D-ro H. Yagi, Vic-Prezidantoj; D-ro W. Herrmann (Eŭropa kampanjo); R. Llech-Walter (Financoj); Ing. A. Rajski (Landaj, fakaj kaj neneŭtralaj asocioj); Norman R. Smith (Kulturaj aferoj). La (malnova) Estraro kunsidis je 3-5 aprilo 1959 en la Centra Oficejo dum entute 21 horoj. Dum la U.K. en Varsovio la sama Estraro kunsidis trifoje, dum entute 8 horoj kaj la nova Estraro kunsidis unufoje dum 2 horoj. Cetere okazis malgrandaj konferencoj inter kelkaj estraranoj, dum la Estraro regule laboris per leteroj kaj skribaj voĉdonoj. En decembro la Ĝenerala Sekretario havis kelkajn konferencojn en la C.O. kaj en la Kongresa Oficejo en Bruselo.

(2) **Komitato**: Ankaŭ la Komitato estis nove elektita en 1959. Ĝi konsistas nun el 59 komitatanoj, el kiuj estas

42 kom. A, 6 kom. B kaj 11 kom. C. Unu loko de komitato C vakas ankoraŭ. Al la Komitato apartenas ankoraŭ la samaj du observantoj de aliĝintaj asocioj kun malpli ol 150 membroj. Bedaŭrinde ne realiĝis la espero ke en la Zamenhof-Jaro aliĝos pliaj landaj asocioj. La Komitato havis dum la Kongreso en Varsovio 7 kunsidojn de la Pleno kiuj daŭris entute 19 horojn. Ĉeestis 38 komitatanoj aŭ anstataŭantoj. La Komitato elektis apartajn komisionojn nur por la elektoj kaj por la financoj. Ĉio cetera estis traktita en la Pleno.

(3) **Landaj Asocioj**: Peton pri aliĝo direktis al la Komitato nur la Madagaskara Asocio, kies akcepto estas aprobita en marto 1960. Tiu Asocio havas ne komitatanon, sed observanton en la Komitato. Pro granda falo de la membronombro en Maroko, kaŭzita de la enlandaj cirkonstancoj, tiu Asocio verŝajne ne povos resti aliĝinta. En la nuna jaro ĝi ne havas komitatanon. U.E.A. havas nun 27 aliĝintajn landajn asociojn. La raportoj de la plimulto el ili troviĝas en la aldono al tiu ĉi Raporto.

(4) **Faka Asocio Aliĝinta**: Restas kiel la sola ankaŭ en tiu ĉi jaro I.S.A.E.

(5) **Fakaj kaj Specialigitaj organizaĵoj kunlaborantaj**: Kontrakto pri kunlaboro estis en Varsovio aprobita kun la Esperanta Ŝak-Ligo Internacia. U.E.A. havas nun tiajn kontraktojn kun 19 specialaj organizaĵoj.

(6) **T.E.J.O.**: La junularsekcio de U.E.A. havis tre sukcesplenan kongreson en Gdańsk, Pollando, kiu estis konsiderata oficiala antaŭkongreso de la U.K. en Varsovio. La diverslandaj T.E.J.O.-sekcioj solidiĝis. "La Juna Vivo" regule aperas en "Esperanto". T.E.J.O. mem raportas aliloke.

(7) **Fondaĵoj**: Dum la tuta jaro la esperantistoj kontribuis al la Fondaĵo-Zamenhof. Ĝis 1.3.1961 kolektiĝis la sumo de 18064.49 gld. La pli granda parto estas foruzita por financi ĉiujn ekstrajn aktivecojn en 1959. Ĉar la agado en kunligo kaj sekve de la Zamenhof-Jaro ankoraŭ daŭras en 1960, pliaj kontribuoj estas daŭre bezonataj. Pro la agadoj de S-ro Sekelj kaj S-ino Haudebine por A.P.O., pri kio estis regule raportata en la revuo, multaj personoj

kontribuis por tiu celo. La aliaj Fondaĵoj: Oficeja Ilaru, Fondaĵo-Ekspozicio, ne plu ĝuas grandan atenton, kvankam ankaŭ ili estas ege necesaj. Ĉiuj kontribuoj estas regule kvitancitaj en la revuo.

(8) **Organiza Laboro**: Estus necese prizorgi fondadon de landaj organizaĵoj en ĉiuj ŝtatoj, kie ili ankoraŭ ne troviĝas, kvankam ekzistas kondiĉoj por tio; instigi la landajn asociojn, kiuj ankoraŭ troviĝas ekster UEA, aliĝi al la Asocio; instigi fondadon de pliaj fakaj organizaĵoj; kunligi ĉiujn fakajn organizaĵojn al la Asocio; vastigi la aplikon de Esperanto por fakaj celoj; pligrandigi la nombron de fakdelegitoj ktp.

III. ADMINISTRADO KAJ FINANCOJ

A. CENTRA OFICEJO

(1) **Stabo**: Ĝis oktobro 1959 laboris en la C.O. krom la Direktorino du tuttagaj oficistoj kaj tri duontagaj. Jam delonge montriĝis ke ne estas eble plenumi la daŭre ampleksiĝantajn laborojn en la normalaj oficejaj horoj kaj ke multaj aferoj suferis prokraston. Plia oficisto estis urĝe bezonata. Post anonco en la revuo kaj traktado kun pluraj proponintoj la 1-an de oktobro 1959 aldoniĝis al la stabo S-ro W. Schmid, sud-germano, kiu transprenis parton de la taskoj de la direktorino kaj ĝenerale enkondukigis en ŝiajn laborojn. Li estas la dua nederlanda oficisto en la C.O., tiel ke la Centro de la Asocio havas vere internacian karakteron. Unu el la duontagaj oficistoj, S-ro Ponti, forlasis la C.O. la 1-an de marto 1960, ĉar li atingis la aĝon por ricevi ŝtatan pension kaj ĉar la laboroj kaj la ĉiutaga veturado de lia loĝloko Hago fariĝis tro lacigaj al li. Ankoraŭ ne anstataŭas lin alia persono, sed liaj taskoj estas dividitaj inter la aliaj funkciuloj. La laboroj dum la Zamenhof-Jaro estis eksterordinare ampleksaj. Tajpitaĵoj en la kalendaro jaro 1959 estis 3072 leteroj kaj 333 stencililoj por cirkuleroj, kiuj lastaj estis senditaj meze al 300 adresoj. Al tio aldoniĝis tajplaboroj de protokoloj, oficiala materialo por la gazeto ktp.

(2) **Aŭto**: La privata aŭteto de la direktorino, uzita plurajn jarojn en ĉiutaga servo de la C.O., printempe 1959 estis plene eluzita. Ĉar rapida transportilo estas nepre

bezonata, aĉetita estis nova "Renault 4", duone de U.E.A., duone de la direktorino. Ĝi netakseble servas ne nur en la ĉiutagaj laboroj, sed ankaŭ dum estrarkunvenoj kaj dum kongresoj, kien ĝi transportas grandajn kvantojn da bezonataj materialoj.

(3) **Membraro** : La membronombro je 31.12.1959 montris la jenan staton : AM 25146, MJ 907, MA 5398, MS 528, Pat. 7, DM 340, HM 45, J-MJ 31, J-MA 186. Entute 32588 membroj en 80 landoj. Tiuj ĉi ciferoj iom diferencas de tiuj publikigitaj en la statistiko en la marta numero, ĉar post ĝia apero alvenis ankoraŭ kelkaj kotizoj por 1959. La jaro 1958 finiĝis per 27378, kio signifas kreskon de 5210 membroj dum la Zamenhof-Jaro.

(4) **Varba laboro** : Parto de la membrokresko ŝuldiĝas al la bona varba laboro de ĉefdelegitoj kaj perantoj, el kiuj kelkaj entreprenis laŭdindajn agadojn per cirkuleroj kaj artikoloj. La C.O. mem dum la jaro dissendis plurajn milojn da specimenaĵoj ekzempleroj de la revuo — precipe de la kongresa (septembra) kaj jubilea (decembra) numeroj — kun akompana cirkulero kaj aliĝilo al organizitaj esperantistoj nemembroj de U.E.A. La adresojn liveris landaj asocioj kaj ĉefdelegitoj, dum grandan parton la C.O. mem trovis laŭ membrolistoj de aliaj Esperanto-organizaĵoj. Laŭ takso, el tiu agado, en kiu kelkaj ĉefdelegitoj bonege helpis, rezultis pluraj centoj da novaj membroj.

(5) **Membroj-subtenantoj** : Ĉar la membraro en tiu kategorio ne kreskas, en la lastaj du jaroj estis farita aparta konkurso inter MS en tiu senco, ke inter ĉiu cento da MS estis lotumita librodono en valoro de 10.— gld. La rezultoj de tiu konkurso estis regule publikigitaj en la revuo. La efiko ne estas kontentiga. Kvankam en tiu ĉi jaro la nombro restis preskaŭ egala al la antaŭa, ne estas tendenco de kresko. Ne estis rimarkebla iu interesiĝo ĉe la membroj por tiu konkurso. Iuj gajnintoj eĉ ne reagis al la informo pri la premio.

(6) **Delegitoj** : En la fino de 1959 estis entute 2851 delegitoj en ĉiuj kategorioj (2771 en 1958). El ili estis 1305 delegitoj, 229 vic-delegitoj, 1274 fakdelegitoj kaj 43 junul-delegitoj. Estus dezirinde ke kelkaj ĉefdelegitoj pli energie

okupiĝus pri la ampleksigo de la delegita reto. Nepre T.E.J.O. trovu ankaŭ pli da junuldelegitoj.

(7) **Jarlibro** : La kompleta Jarlibro 1959 estis kun 814 paĝoj la plej ampleksa iam aperinta. La unua parto enhavis la Statuton kaj ĉiujn Regularojn de la Asocio. Tiu parto poste aperis ankaŭ en formo de aparta broŝuro kaj enhavas 50 paĝojn. Unuan fojon la Jarlibro enhavis ankaŭ apartan liston de la grupoj. Bedaŭrinde, ankoraŭ ne ĉiuj grupoj anoncis sin por tiu rubriko. La Dua Parto de la Jarlibro enhavis novan terminaron : la Teknika Terminaro pri Soseoj kaj Pontoj, de Ing. A. Broise. Ĝi plenigas 168 paĝojn kaj aperis ankaŭ kiel aparta libreto. La nombro da reklamoj en la Unua Parto kreskis de 98 en 1958 al 163 en la Zamenhof-Jaro, dank' al sindona agado de pluraj delegitoj kaj vasta varbado de la C.O. mem. Multe tro malaltaj estis la tarifoj por la reklamoj kiuj por 1960 devis esti altigitaj al 80.— por tutpaĝa reklamo.

(8) **Gazeto** : Dum la Zamenhof-Jaro la revuo "Esperanto" aperis en 8500 ekzempleroj. Ĉiu numero enhavis 20 paĝojn plus 4 de la kovrilo, kun la escepto de la decembra, kiu estis aparte prizorgita jubilea numero 24-paĝa.

(9) **Presejo** : En la pasinta jaro ĝi aĉetis novan kompostmaŝinon kaj ĉiujn matricojn de la lingvoj aperantaj en la Jarlibro, en 8-kaj 10-punktaj literoj. La kunlaboro kun la presejo-Zwagers estas bonega kaj ĝi multe kontribuis al akurata aperado de la gazeto komence de la monato.

(10) **Libroservo** : Ĝi kreskas kaj prosperas kaj estas ege bezonata helpo por sanaj financoj de la Asocio. Dekoj da libropakaĵoj ĉiutage forlasis la oficejon al ĉiuj partoj de la mondo. Ĝenerale ekzistas tre bonaj rilatoj kun la Esperanto-eldonejoj ĉie en la mondo.

(11) **Eldona Fako** : La sola eldonaĵo kiu aldoniĝis estas la Terminaro pri Soseoj. Ĉiuj antaŭaj eldonaĵoj, precipe Angla Antologio, tre kontentige vendiĝis.

(12) **Internaciaj Konkursoj** : Ankaŭ ĉi-jare okazis du Konkursoj. La unuan gajnis, dank' al grandaj streĉoj kaj penoj de nia ĉefdelegito, Hispanujo kun 141.92%.

granda estas tiu venko pro la okazinta malplivalorigo de la enlanda valuto, pro kio pluraj tieaj membroj ne plu povis pagi la kolizojn. La duan Konkurson ĝajnis Japanujo, kiu pro granda kresko de la asocia membraro jam de la komenco troviĝis neatingeble ĉe la supro kaj finis kun 214.78%. Ambaŭ landoj ricevis libropremiojn en valoro de 100.— gld.

(13) **Apogantoj** : La varbado malmulte progresis en tiu ĉi jaro, verŝajne ankaŭ pro la energia varbado por Zamenhof-Fondaĵo. F-ino Marjorie Boulton restas nevenkebla rekordulino en la varbado.

(14) **Orienteŭropaj landoj** : En la Komitato en Varsovio estis faritaj pluraj sugestoj pri havigo de niaj tieaj bonhavoĵoj pere de aĉetado de libroj kaj pagado de fakturoj el okcidento al la kontoj de tiuj landoj ĉe U.E.A. anstataŭ al orient-eŭropo. Kvankam la orienteŭropaj komitatanoj tre aprobis tiujn sugestojn, montriĝis poste ke la praktikan realigon malhelpas multaj en Varsovio ne antaŭviditaj faktoroj.

(15) **Heredaĵo Johns** : La multjara fidela membro de UEA Alfred E. Johns, kiu forpasis en 1955 en Usono, testamentis al UEA 20% de sia havaĵo. La ĝenerala sekretario traktis kun la koncerna instanco en Usono. En februaro 1960 UEA ricevis la sumon de 203,23 usonaj dolaroj kiel parton apartenantan al la Asocio. UEA konservis daŭran memoron pri A. E. Johns kaj lia nomo troviĝas en la Ora Libro de bonfarintoj.

(16) **Generale** : Estus necese havigi al la Asocio pliajn financajn rimedojn, precipe el fontoj ekster la Esperanto-Movado (diversaj fondaĵoj), por ke ĝi povu efike plenumi multnombrajn taskojn kaj kampanjojn. Ne estas konate ĉu la respondeca estrarano pri financoj entreprenis ion sur tiu kampo, ĉar li ne sendis raporton pri sia agado dum la jaro.

B. SERVA CENTRO

El la raporto de la honorofica administranto estas ĉerpitaj jenaj informoj :

(1) **Ekspozicia materialo** : "La aktiveco de la Serva Centro ne multe diferencas de la kutima laboro, reprezentado ĉe la internaciaj organizaĵoj, sendo, laŭ disponebla materialo, de ekspoziciaj objektoj, informado pri aliĝo en aro da landoj k.a."

(2) **Esperantista Interhelpo** : "Ĝi nun ree funkcias en pli vasta kadro".

(3) **Vizitoj** : "Eksterordinare multaj vizitoj allandaj, natura sekvo de la rolo kiun okupas Genevo en la internacia vivo".

(4) **Biblioteko** : Kvankam en la lastjara raporto de la administranto estis dirite, ke "ĉio estas preta por esti transportita al Rotterdame", tamen la biblioteko de UEA troviĝas ankoraŭ en Genevo.

Pri la p-toj 1-3 de tiu ĉi parto respondecas la honorofica administranto.

IV. GAZETO

(1) **Redaktoro** : Pro privataj kaŭzoj s-ro H. V. Rasmussen devis ĉesigi sian laboron kiel kunredaktoro la 1-an de aprilo 1959, tiel ke s-ino Kirsten Zacho sola daŭrigis la redaktadon. Nur la decembran numeron redaktis kune Prof. I. Lapenna kaj Kirsten Zacho, dum la teknikan aranĝon prizorgis f-ino M. Vermaas. La revuo regule aperadis en la komenco de la monato. La oktobra, novembro kaj decembra numeroj eĉ pli frue, tiel ke la decembra numero estis dissendita antaŭ la 20-a de novembro, por ke la materialoj publikigitaj en ĝi povus servi por la decembraj Zamenhof-festoj.

(2) **Formato kaj aspekto** : En 1959 la kovrilpaĝo aspektis same kiel en la antaŭa jaro, sed la decembra numero havis tutepaĝan reproduktadon de foto. Ekde tiu numero la kovrilpaĝo konsistas el reproduktado de foto, kiu koncernas iun gravan artikolon en la sama numero. En la angulo troviĝas la titolo kaj informo pri la numero, monato kaj jaro, por ĉiu numero sur fono de alia koloro. Pro la nova aspekto alvenis multaj gratuloj.

(3) **Amplekso kaj enhavo** : Dum la tuta Zamenhof-Jaro la revuo havis 20 paĝojn plus 4 kovrilpaĝojn, kaj tiu amplekso restas la sama ankaŭ en 1960. En 1959 aperis 11 numeroj kun entute 224 paĝoj, ĉar la decembra numero havis 24 paĝojn. Al tio aldoniĝas 44 kovrilpaĝoj. Do, ĉiu abonanto ricevis dum la jaro revuon kun entute 268 grandformataj paĝoj. El vidpunkto de la enhavo la materialo publikiga estis : 89½ paĝoj da artikoloj, 29 paĝoj da diversaj informoj, 26½ paĝoj da oficialaj informoj, 20½ paĝoj da raportoj pri la U.K., 20 paĝoj da literaturo kaj arto, 12½ paĝoj da recenzoj, 11 paĝoj por la rubriko "Tra la Mondo", 10½ paĝoj da oficialaj informoj pri la U.K., 8½ paĝoj da informoj de CED, 5 paĝoj de la rubriko "La Juna Vivo", 3 paĝoj de "Esperantista Vivo", 1½ paĝoj de "Radio-Babiloj", 1½ paĝoj de la "Ŝaka Rubriko", dum 1 paĝon okupis "Krucvorteniĝmo".

(4) **Presejo** : La firmao Zwagers plue presas la revuon kaj tre sindone kunlaboras por ke ĝi estu el teknika vidpunkto kiel eble plej perfekta. La materialoj estas sendataj al la presejo tra la C.O., kiu ankaŭ prizorgas la korektadon de la dua provaĵo.

V. KONGRESOJ

(1) **U.K. Varsovio**. La 44-a U.K., kiu okazis en Varsovio de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1959 sub la honora protektado de la Ministro-Prezidanto de Pollando Józef Cyrankiewicz, montras tri karakterizajn trajtojn :

(a) ĝiaj Zamenhofaj programoj sur la lokoj mem kie la aŭtoro de Esperanto naskiĝis aŭ kie li vivis kaj laboris; (b) la rekorda nombro da kongresanoj (3250 el pli ol 40 landoj); (c) la apogo de la pola registaro, kiu montriĝis, i.a., per disponigo al L.K.K. de granda subvencio, per malfermo de ĉiutagaj Esperanto-dissendoj ĉe Radio-Varsovio kaj per eldono de du memorigaj poŝtmarkoj.

Eksterordinaran sukceson havis la tradicia Cseh-

Seminario, persone gvidata de S-ro Cseh, al kiu aliĝis pli ol 270 kongresanoj. La Seminario okazis sub la oficiala aŭspicio de la Universitato de Varsovio kaj estis malfermita de ties Rektoro. Oficiala Antaŭkongreso estis la 15-a Kongreso de T.E.J.O. en Gdansk, kiu kunvenigis 250 partoprenantojn el 19 landoj.

La dumkongresaj Zamenhof-ceremonioj konsistis el jenaj punktoj : (a) publika malkovro de memortabulo sur la rekonstruita domo en la loko, kie D-ro Zamenhof vivis, (b) silenta preterpasado fare de la tuta kongresanaro antaŭ la tombo de Zamenhof en Varsovio, (c) vespera programo honore al la aŭtoro de Esperanto, (ĉ) vizito al lia naskiĝurbo Białystok, kie estis deponita fundamenta ŝtono sub la konstruotan monumenton al D-ro Zamenhof kaj kie estis inaŭgurita "Lernejo Zamenhof". Pri la Zamenhof-programoj speciale okupiĝis dum sia antaŭkongresa restado en Varsovio la vicprezidanto de U.E.A.

La Kongreso laboris en du sekcioj. La unua pritraktis la rolon de la Esperanto-Movado "en la realigo de la granda projekto de UNESKO pri interŝanĝo de okcidentaj kaj orientaj kulturaj valoroj". La sekcio, prezidata de S-ro Eizo Ito, akceptis tri rezoluciojn, kiuj aperis en la septembra numero de "Esperanto". La dua sekcio, kies prezidanto estis S-ro I. Dratwer, daŭrigis la pristudon de la lokaj problemoj de nia Movado. Ĝia rezolucio sintezas la edukajn, informadajn, programajn kaj instruadajn taskojn de la lokaj societoj : diskutbazo estis raporto de S-ino E. Lapenna. Okazis du ĝeneralaj kunvenoj. Dum la unua estis pritraktita la jarraporto de la Estraro; dum la dua okazis raportoj pri la kongresaj sekcioj kaj pri la fakaj asocioj.

Dudeko da fakaj kunvenoj (sciencistoj, studentoj, instruistoj, kuracistoj, arkitektoj, gefratoj, geografoj, veteranoj, katolikoj, protestantoj, framasonoj, budhanoj, ŝakludantoj, k.a.) okazis en la kadro de la U.K. Novaj iniciatoj estis la II-a Konferenco de Mondpaca Esperantista Movado kaj la virina kunveno. La Akademio okazigis publikan diskuton pri la geografiaj nomoj, vizititan de pli ol 500 kongresanoj. Estis celebrataj tri diservoj : katolika, protestanta kaj ekumenika.

La kulturaj programoj konsistis el : (a) 12-a sesio de I.S.U., dum kiu prelegis 9 prelegistoj el 6 landoj. En ĝia

sino por la lasta fojo prelegis Prof. H. Sirk en Vieno. Rektoro de I.S.U. estis la Prezidanto de la Pola Akademia de Sciencoj, Prof. T. Kotarbinski. (b) Tri teatraj programoj, prezentitaj de la Internacia Arta Teatro ("Friponaĵoj de Skapeno" de Molière), de la Verda Caro ("Pigmaliono" de Shaw) kaj de la Bulgara Esperanta Teatro (Casantioj de oficoj" de Vazov). (c) La Belarta Konkurso en kiu partoprenis 40 verkistoj per 88 konkursaĵoj. (ĉ) La Oratora Konkurso, kies unua premio estis asignita al S-ro Carlo Minnaja. D-ro Régulo Pérez estis proklamita "Aŭtoro de la Jaro" kaj ricevis la "Argentan spronon" de la eldonejo KOKO.

Bone sukcesis la Junula Vespero, kiun gajigis esperantista ĵaz-orkestro el Ljubljana. La 4-a Internacia Infana Kongreseto, gvidata de S-ino M. Madurowicz, grupigis 41 infanojn, el kiuj 34 polaj. Fokuso de ĝia tre riĉa programo estis la infana prezentado antaŭ pluraj centoj de kongresanoj. En la 29-a Blindula Kongreso partoprenis 62 personoj el 15 landoj: ĝia tagordo enhavis plurajn fakajn raportojn, vizitojn. Por la kvina fojo estis elmontrita la Universala Ekspozicio de CED, kiu restis du semajnojn malfermita al la publiko en la Palaco de Kulturo kaj Scienco. Ĝin aranĝis Ark. K. Tyminski. La tuta kongresanaro estis akceptita de la pola registaro, en ĉeesto de la vic-ĉefministro P. Jaroszewicz, kaj riĉe regalita. Pli ol 300 personoj aliĝis al la bankedo. La urbestro de Varsovio, Z. Dworakowski, bonvensalutis la kongresanojn per dulingvaj afiŝoj larĝe pendigitaj en la urbo.

La Kongresa Gazetara Servo dum unujara antaŭpreparo estis gvidata de du profesiaj ĵurnalistoj: S-ro J. Kosleniak (pola branĉo) kaj S-ro J. Uspienski (esperantista branĉo). La esperantista branĉo liveris varbetele al la esperantistaj gazetoj kaj radiostacioj 25 diversajn artikolojn pri Varsovio kaj Pollando kun pluraj bildoj. Dum la kongresaj tagoj ĝi eldonis ĉiutage bultenon (entute 33 paĝoj) sub la redaktado de S-ro M. Gjivoje. La pollingva branĉo dissendis sep komunikojn al telegrafagentejoj, gazetoj, radiostacioj kaj televidoj en periodo antaŭ la Kongreso. Dum ĝia disvolviĝo ĝi konstante informadis per ĉiutaga komunikoj. Rezulte de ĝia laboro en ĉ. 80 polaj gazetoj aperis 494 artikoloj kaj diversaj sciigoj pri la Kongreso,

kune kun 101 bildoj, parto el kiuj liverita de la kongresa Foto-Servo. Du gazetaraj konferencoj estis organizitaj kun partopreno de po ĉ. 30 ĵurnalistoj. Propaganda 20-minuta sonbendo estis mendita de pli ol 100 lokaj Esperanto-societoj el 23 landoj.

En la Kongresa Oficejo oficis dum unu jaro krom la Konstanta Kongresa Sekretario, S-ro G. C. Fighiera, du oficistinoj, S-inoj Z. kaj S. Zjawinska. Honorofice postenis ankaŭ la 82-jara kasisto de L.K.K., S-ro S. Rudnicki. La Kongresa Libro de 334 paĝoj enhavis, i.a., du originalajn kontribuojn de Prof. G. Waringhien kaj de Mag. W. Auld kaj seplingvan kongresfakan terminaron de la K.K.S. Pro la malebleco apliki kelkajn partojn de la Kongresa Regularo, speciala kontrakto estis farita inter UEA kaj LKK kaj inter UEA kaj la ŝtata vojaĝoficejo ORBIS. Dum la postkongresa ekskurso estis prezentita en Krakovo la pola klasika opero "Halka" en Esperanto. La prezidanto de la LKK estis S-ro A. Rajski.

(2) **U.K. Bruselo:** Bonaj perspektivoj antaŭvidiĝas por la 45-a U.K. en Bruselo, kiu okazos en la unua semajno de aŭgusto 1960 sub la honora protektado de Lia Reĝa Moŝto Baŭduino. Prezidanto de L.K.K. estas S-ro M. Jaumotte; Konstanta Kongresa Sekretario S-ro G. C. Fighiera. Plenaj raportoj aperos en la septembra kaj oktobra numeroj de "Esperanto" 1960.

(3) **U.K. 1961:** La Estraro sondis la eblecojn por U.K. en 1961 en pluraj lokoj. El Britujo alvenis invito de Londono kaj Harrogate. La Estraro decidis, ke la 46-a U.K. okazu en Harrogate.

(4) **Kongreso en Japanujo:** Jam en 1959 la Estraro sondis la eblecon de Kongreso ekster Eŭropo. Post plura korespondado kun Prof. Yagi el Japanujo kaj interkonsiliĝado inter la japanaj esperantistoj, estas antaŭvidita U.K. en Tokio por la jaro 1965.

(5) **Aliaj kongresoj:** Ankaŭ en 1959 kreskadis la nombro de diversfakaj internaciaj kongresoj, seminarioj, kursoj, feriaj aranĝoj kaj aliaj renkontiĝoj, kiuj uzis Esperanton kiel solan lingvon. La nombro da partoprenantoj estas takebla je ĉ. 12.000/13.000. Multnombraj estis ankaŭ la naciaj Esperanto-Kongresoj, kelkaj el kiuj okazis sub la

ŝildo de altnivela tutlanda Honora Komitato kaj enhavis tre bonajn programojn. Menciindaj tiukunlige estas la hispana kaj itala naciaj kongresoj, kiuj kunigis po pluraj centoj da kongresanoj kaj gastoj el eksterlando.

VI. EKSTERAJ RILATOJ

A. UNESKO

(1) **Konsultaj rilatoj**: Kiel organizaĵo en konsultaj rilatoj kun UNESKO, UEA daŭrigis sian efikan kunlaboradon. En tiuj rilatoj la Asocio estas reprezentita de la ĝenerala sekretario, kiu plenumas tiun taskon ĉefe per korespondado, kelkfoje per personaj vizitoj al diversaj funkcioj de UNESKO, aŭ tra la kunlaborantoj en diversaj landoj, el kiuj aparte menciinda estas s-ro Jean Thierry en Parizo. Nun UNESKO ellaboras novan principaron por la rilatoj kun la neregistaraj organizaĵoj. Laŭ la projekto de la nova principaro, pri kiu estis konsultita ankaŭ UEA, estos tri kategorioj de neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun UNESKO. Se la projekto estos akceptita, UEA klopodos atingi la kategorion A, aŭ B, depende de la difinoj, donotaj al la diversaj kategorioj. La afero estas daŭre sekvata kaj atente observata.

(2) **Oriento-Ocidento**: La Asocio dediĉis grandan atenton al tiu grava projekto de UNESKO, pri kiu aperis koncizaj informoj en la lastjara Raporto kaj plurfoje en la revuo. Menciinda estas la laboro de la Unua Sekcio de la U.K. en Varsovio kaj, tute aparte, la Kultursemajno, okazinta de la 9-16 de aŭgusto 1959 en Frostavallen sub la titolo "Landoj kaj Popoloj, kun Atento pri Orienta kaj Okcidenta Kulturaj Valoroj". Raporto pri tiu kultura aranĝo aperis en la oktobra numero de "Esperanto". Longa raporto estis sendita ankaŭ al la Sekretariato de UNESKO, kiu esprimis sian altan aprezon por tiu laboro. En la publikaĵo de UNESKO "Orient-Occident" de decembro 1959 aperis resumo de la raporto. La kultura aranĝo en Frostavallen multe helpis al firmigo de la rilatoj kun UNESKO. La organizan laboron prizorgis komitatano s-ro Jan Strønne, dum la programo estis fiksita en kunlaboro kun la ĝenerala sekretario.

(3) **Partiopreno en la konferencoj de NRO**: La Asocio estis reprezentita, pere de komitatano s-ro J. Thierry, en ĉiuj konferencoj kaj kunvenoj de la neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun UNESKO. La reprezentanto de la Asocio restis prezidanto de la subgrupo "Psikologiaj kaj Sociologiaj Faktoroj Influantaj la Internacian Kompreniĝon".

(4) **Index Translationum**: Kiel en la antaŭaj jaroj, CED liveris materialojn pri la Esperanto-tradukoj al la redakcio de tiu publikaĵo.

(5) **UNESKO-afiŝoj**: Publikigitaj en la antaŭlasta laborperiodo, tiuj afiŝoj de UNESKO estis plue distribuataj de UEA al diversaj organizaĵoj. La landaj asocioj kaj la lokaj grupoj devus multe pli vaste utiligi tiaspecajn publikaĵojn, kiuj ne nur helpas al pli bona kompreniĝo inter la popoloj, sed ankaŭ samtempe altigas la prestiĝon de la lingvo kaj kontribuas al fortikigo de la rilatoj kun UNESKO.

(6) **UNESKO-Novajoj**: UEA daŭrigis la publikigon de tiu Bulteno, kiun en la pasinta laborjaro redaktis s-ro E. Ockey (vidu sub Informado). Multaj Esperanto-gazetoj utiligis la informojn el la Bulteno. Laŭ la ĵus farita statistiko de CED pri tiu demando, entute en la Esperantogazetaro aperis 323 informoj ĉerpitaj el la Bulteno.

(7) **Zamenhof**: Komence de aprilo 1959 la ĝenerala sekretario kaj iom poste ankaŭ la prezidanto vizitis la Sekretariaton de UNESKO kaj la Ĝeneralan Direktoron por preparoli precipe la Zamenhof-Jaron. En la decembra numero de la tre grava ilustrita revuo **The UNESCO Courier**, kiu estas publikigata en la lingvoj angla, franca, hispana kaj rusa, aperis tre bona artikolo pri Zamenhof kun lia portreto. La administracio de la revuo proponis al UEA nedifinitan nombron da ekzempleroj je rabatita prezo de 50% kaj efektive UEA mendis 1.100 ekzemplerojn, informis pri tio la landajn asociojn kaj instigis ilin mendi kiel eble plej multajn ekzemplerojn ĉu de la C.O. ĉu de la Sekretariato. Necesas plue vaste utiligi tiun publikaĵon. En la Bulteno "UNESCO Features" n-ro 336 de julio 1959, aperis artikolo "Por la Unesco de la Homaro — la Verko de Zamenhof". Tiu Bulteno estas sendata al

pluraj miloj da gazetoj tra la mondo. La artikolo estis repesita en multaj gazetoj kaj revuoj de diversaj landoj. Fine, la novembra sesio de la Plenuma Komitato de UNESKO decidis oficialigi la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof en la jaro 1960. Tiu decido de UNESKO estas la plej alta honorigo, kiun iam ricevis la nomo de D-ro Zamenhof (pliaj detaloj en la aprila numero de "Esperanto" de la jaro 1960).

(8) **Esperanto en UNESKO publikaĵoj:** En la pasinta laborjaro la Internacia Lingvo aŭ la laboro de UEA estis prezentitaj aŭ menciitaj 14 fojojn en diversaj publikaĵoj aŭ dokumentoj de UNESKO. Entute, ekde 1956, 52 tiaj informoj aperis en la publikaĵoj de UNESKO.

(9) **Generala Rimarko:** Malgraŭ la atentigo en la pasintjara Raporto, ke estas tre neoportune malobservi la principojn, kiuj regas la rilatojn de UEA kun UNESKO, tamen plue okazas, ke tiu aŭ alia Esperanto-organizaĵo, aŭ eĉ unuopuloj, turnas sin rekte al UNESKO en formo neoportuna aŭ kun proponoj tute ne taŭgaj. Tiaspeca agado nur malutilas al la Esperanto-Movado kaj ĝenas la rilatojn de la Asocio kun UNESKO, kiuj cetere estas tre bonaj. UEA realigas sian kunlaboradon kun UNESKO surbaze de sia Statuto, de la reguloj regantaj la rilatojn inter UNESKO kaj la neregistaraj organizaĵoj, kiel ankaŭ surbaze de la personaj kvalifikoj, scioj kaj spertoj, kiujn posedas ĝiaj laŭstatute elektitaj reprezentantoj. La Estraro akcentas la nepran bezonon de interna disciplino precipe en tiu delikata sfero.

B. UNUĜINTAJ NACIOJ

(1) **Konsultaj Rilatoj:** UEA havas konsultajn rilatojn kun la Ekonomia kaj Socia Konsilo de Unuĝintaj Nacioj. Ankaŭ tiuj rilatoj estas realigataj de la ĝenerala sekretario, kiun reprezentas en New York s-ro J. L. Lewine.

(2) **Geneva Konferenco:** De la 22-26 de junio 1959 okazis en Genevo la Dua Konferenco pri kontraŭbatalado de Antaŭjuĝoj kaj Diskriminacio. La reprezentantoj de la Asocio estis s-ro Prof. D-ro E. Privat kaj s-ro Hans Jakob. Prof. Privat prezentis la starpunkton de UEA en elstara parolado dum la kunsido de la 22-a de junio. Resumo

aperis en la dokumento E/NGO/Conf.2/SR.1 de la 16-a de februaro 1960.

C. EŬROPA KAMPANJO

(1) **Evoluo de la laboro:** En la pasinta periodo la laboro baziĝis sur la rezulto de la enketo inter la urbestroj, pri kio aperis koncizaj informoj en la lastjara Raporto. En aprilo 1959 ĉefurbestro s-ro Stein kaj la komisiito por la kampanjo D-ro W. Herrmann veturis al Strasbourĝ kaj tie transdonis al la reprezentanto de la prezidanto de la Konsulta Asembleo 66-paĝan 4-lingvan raporton pri la enketo. La 13-an de julio 1959 la Kulturkomisiono de la Konsulta Asembleo decidis, ke ne ekzistas laŭstatuta ebleco por remalfermi la priraktadon de la afero. Tamen, dum siaj kunsidoj en Varsovio la Estraro decidis daŭrigi la kampanjon. D-ro Herrmann vizitis en oktobro kaj novembro plurajn gravajn personojn en Nederlando kaj Aŭstrujo. Laŭ lia peto Prof. Lapenna preparolis la aferon kaj la tutan lingvan problemon en Eŭropo kun la prezidanto de la Kulturkomisiono s-ro Kraft en Kopenhago. Rezulte, la prezidanto de la Kulturkomisiono, kompreninte la gravecon de la problemo, montriĝis favora al la ideo, ke la Kulturkomisiono esploru la demandon de la lingvo-diverseco en Eŭropo kiel obstaklo al la rilatoj inter la eŭropaj popoloj. La Kulturkomisiono decidis dum siaj kunsidoj de la 19-22 de januaro en Strasbourĝ, ke ĝi priraktos la aferon dum la kunsido de la 26-a de aprilo, kiam la reprezentanto de la Asocio havos la okazon prezenti ĝian vidpunkton.

D. UNIO DE INTERNACIAJ ASOCIOJ (U.I.A.)

(1) **Rilatoj:** UEA daŭrigis la kunlaboradon kun tiu organizaĵo kaj la rilatoj estas tre bonaj.

(2) **Kongreso de Lausanne:** De la 15-18 de marto okazis en Lausanne kongreso de kongresorganizantoj, iniciatita kaj organizita de UIA en kunlaboro kun pluraj aliaj specialigitaj organizaĵoj. UEA estis reprezentita de s-ro G. C. Fighiera, la KKS de la universalaj kongresoj. Li prezentis raporton pri la aĝo kaj profesioj de la partoprenantoj de U.K., precipe surbaze de la statistiko farita

pri la kongreso en Varsovio. Lia raporto aperis ankaŭ en la organo de UIA **Associations Internationales**, marto, 1960. La kongreso entute estis grava evento kaj la gazetaro dediĉis al ĝi multe da spaco. La ĉeesto de la reprezentanto de UEA kaj lia tre bona raporto ankoraŭ plifirmigis la rilatojn kun UIA kaj vastigis la kontaktojn de la Asocio kun diversaj internaciaj organizaĵoj.

(3) **Enketo pri Kongresoj de Internaciaj Orgnizaĵoj** : La ĝenerala sekretario respondis al tiu enketo de UIA kaj aldonis specialan raporton de la 16-a de julio 1959 pri la strukturo kaj diversaj organizaĵaj elementoj de la universalaj kongresoj kaj de diversaj aliaj Esperanto-kongresoj kaj konferencoj.

(4) **Jarlibro** : Estas senditaj informoj pri UEA kaj CED por la jarlibro de UIA 1960. La aliaj organizaĵoj estas atentigitaj fari la samon.

(5) **Associations** : Ĝi aperigas regule mallongajn informojn pri la datoj kaj tagordoj de la U.K. kaj aliaj internaciaj kongresoj kaj kunvenoj de Esperanto-organizaĵoj.

E. ALIAJ RILATOJ

UEA klopodas ĝis maksimumo vastigi la rilatojn kun la aliaj interŝtataj kaj neregistaraj internaciaj organizaĵoj. Tio okazas en formo de skribaj kontaktoj, sendado de dokumentoj de CED, sendado de bultenoj de la IGS, personaj kontaktoj dum konferencoj kaj kongresoj. Grava manko sur tiu ĉi kampo estas, ke la Esperantistaj fakaj asocioj, ĝenerale parolante, aŭ tute ne rilatas kun la samfakaj neesperantistaj organizaĵoj, aŭ tiuj rilatoj estas nekontentigaj. La fakaj Esperanto-organizaĵoj estas la solaj, kiuj povas establi efikan kunlaboradon kun samfakaj neesperantistaj organizaĵoj. Se iel eble, ili devus aliĝi al tiuj fakaj organizaĵoj kiel plenrajtaj membroj. Se tio ne eblas, ili devus klopodi, ke ilia membraro aliĝu multnombre al difinita faka neesperantista organizaĵo, partoprenu en ĝia laboro, ĉeestu ĝiajn kongresojn. Tra tiu partopreno precipe en la laboroj de la fakaj kongresoj oni povus relative facile atingi la oficialigon de Esperanto kiel unu el la lingvoj de la koncerna kongreso aŭ konferenco. Ĉiuj Esperantistaj fakaj organizaĵoj devus plej

serioze pritrakti tiun flankon de sia agado kaj atingi kiel eble ampleksan utiligon de la lingvo por fakaj celoj kaj en fakaj medioj.

VII. INFORMADO

(1) **Kunvenoj Frostavallen** : La unua kunveno pri informado okazis en Frostavallen la 11-an de aŭgusto 1959 kaj la dua kunveno estis la 14-an de aŭgusto. Ĉeestis 51 personoj el 13 landoj. La enkondukan raporton faris la ĝenerala sekretario surbaze de anticipe distribuitaj tezoj. La dua kunveno, post tre atenta pritrakto de ĉiu unuopa punkto, unuanime reaprobis la principaron, akceptitan en Frostavallen en 1956 kaj plurfoje publikigita, interalie ankaŭ en la Jarlibro 1959, p. 186. Pliaj sugestoj estas faritaj koncerne popularajn artikolojn, tradukojn, recenzojn, preskonferencojn, filmojn, ekspoziciojn, eltranĉaĵojn, afiŝojn, insignon, universitatojn, havenurbojn, Zamenhof-festojn kaj precipe rilate la kvaliton. Ĉiuj kunlaborantoj estis informitaj pri la decidoj per la cirk. let. 42/1959. Estas esence grave por la plua sukcesa disvastigo de la lingvo, ke ĉiuj personoj, kiuj agas sur la kampo de informado, rigore observu tiujn ĝeneralajn bazajn principojn.

(2) **Landaj I.F. kaj Kunlaborantoj** : Estis necese forstrekii el la listo de kunlaborantoj kelkajn personojn, kiuj montrigis plene neaktivajn. Aliflanke pluraj aliaj personoj fariĝis kunlaborantoj de la I.F. de UEA. Tiele, fine de la laborjaro la I.F. de UEA havis entute 90 kunlaborantojn en jenaj landoj : Argentino, Aŭstralio, Aŭstrujo, Belgujo, Bolivio, Brazilo, Britujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francujo, Germanujo, Gvatemalo, Hindujo, Hispanujo, Hungarujo, Islando, Italujo, Izraelo, Jugoslavio, Kanado, Kongo Belga, Kostariko, Nederlando, Norvegujo, Novzelando, Pollando, Portugalujo, Soveta Unio, Suda Afriko, Svedujo, Svislando, Urugvajo kaj Usono, do entute en 35 landoj. Krome, la I.F. de UEA rilatas kun ĉiuj landaj fakaj asocioj, aparte kun la landaj informaj fakoj, se ili estas organizitaj. Ili ĉiuj, same kiel la membroj de TEJA, regule ricevas ĉiujn cirkulerojn, bultenojn kaj artikolojn.

(3) **T.E.J.A.** : La materialoj de la I.F. estis en 1959 regule sendataj al 125 membroj de TEJA. Multaj estis aktivaj kaj tre helpis en la diskonigo kaj disvastigo de la lingvo per publikigo de artikoloj kaj informoj en la naci-lingva gazetaro. Tamen, enketo farita de la I.F. de UEA montris, ke 57 estis neaktivaj. Sekve, ili estis forstrekita el la listo kaj nun 68 membroj de TEJA ricevas la materialojn de la I.F. de UEA.

(4) **I.G.S.** : Aperis 12 pliaj bultenoj de la Internacia Gazetara Servo kun entute 61 novaĵoj. Ĝis nun la IGS aperigis 98 bultenojn kun precize 400 informoj. La bulteno estas sendataj al la landaj kaj fakaj asocioj, kunlaborantoj, komitatanoj, membroj de TEJA, entute en pli ol 300 ekzempleroj de ĉiu numero. La bulteno estis redaktata de s-ro G. C. Fighiera.

(5) **Angla-Franca Bulteno de la IGS** : Ĝi enhavas elektitajn novaĵojn pri Esperanto, kiuj povas esti speciale interesaj por landoj sen organizita Esperanto-Movado, precipe en Azio kaj Afriko. La bulteno estas publikigata en la angla kaj franca. La tradukojn prizorgas f-ino Suzanne Minault (por la franca lingvo) kaj E. P. Ockey (por la angla). Ĝi estas regule sendata al pli ol 200 gazetoj kaj revuoj de diversaj landoj en Azio kaj Afriko, plue al 74 presagentejoj de la mondo. Aperis pliaj 9 numeroj, tiel ke ĝis nun entute aperis 28 numeroj. La n-ro 28 estis presita kaj dorsflanke estis tupaĝa foto de Vinoba Bhave kaj Tibor Sekelj. Multaj gazetoj presigis informojn el la bulteno.

(6) **UNESKO-Novaĵoj** : Aperis 4 pliaj numeroj de tiu bulteno, tiel ke entute ĝis nun 16 numeroj estas publikigitaj. La bultenon redaktas s-ro E. Ockey surbaze de materialoj regule liverataj de la Sekretariato de UNESKO. La Esperanto-gazetaro, al kiu ĝi estas sendata, abunde utiligas la informojn, kiel montrite en VI/A/6.

(7) **Cirkuleroj kaj Artikoloj** : La kontaktoj kun la landaj asocioj, informaj fakoj kaj kunlaborantoj realiĝas ĉefe per cirkuleroj kaj korespondado. Estas senditaj 9 cirkuleroj, pluraj kun diversaj aldonoj, tiel ke entute ĝis nun la I.F. de UEA sendis 46 cirkulerojn. Estas senditaj

6 pliaj artikoloj en ligo kun la Zamenhof-Jaro, dum aliaj artikoloj aperis en la revuo "Esperanto". La rezultoj de tiu sistema agado estis tre kontentigaj, kiel vidiĝas el la ĉapitro VIII de tiu ĉi raporto.

(8) **Kongresa Gazetara Servo** : Kiel branĉo de la I.F. de UEA, la KGS plue evoluis kaj atingis tre bonajn rezultojn (vidu V/1).

(9) **Agado en neesperantistaj kongresoj** : Siatempo la Komitato decidis, ke la C.O. regule informadu la landajn asociojn pri la okazontaj neesperantistaj kongresoj en iliaj landoj. La C.O. tion faras. Estas je dispono ankaŭ la 6-lingva flugfolio, kiu povus esti bone utiligata por informado pri Esperanto dum tiaj kongresoj. Bedaŭrinde la grandegaj eblecoj, kiujn prezentas neesperantista kongreso, ne estas eluzataj por efika informado pri Esperanto. Kompreneble, ne sufiĉas nur disdoni flugfolion, sed estas necese ankaŭ utiligi aliajn formojn de taŭga informado (ekzemple ekspozicio de fakaj libroj en faka kongreso kaj, ĉefe, aŭdigi la lingvon mem por la raporto kaj en la diskutoj. Tiurilate la rolo de la Esperantistaj fakaj organizaĵoj estas decida (vidu VI/E).

(10) **Agado en Azio** : S-ino M. Haudebine daŭrigis sian instruon laboron en Hindujo. Ŝi gvidas tie plurajn kursojn kaj kreigis nombro da novaj esperantistoj. Rezulte de vizito de s-roj Matasin kaj Adhiya al Vinoba Bhave, la mondfama hinda socia aganto esprimis la deziron lerni Esperanton, se UEA havigos al li instruanton. Pri tio s-ro Matasin informis la ĝeneralan sekretarion kaj samtempe disponigis 100 pundojn por tiu celo. Komitatano Lic. Tibor Sekelj tuj akceptis la sugeston veturi al Hindujo. La Estraro decidis doni subvencion de pliaj 100 pundoj, kio helpis al s-ro Sekelj realigi la planon. Marŝante de vilaĝo al vilaĝo kun Vinoba Bhave, Tibor Sekelj donis al li 18 lecionojn de Esperanto, kio sufiĉis, por ke la hinda filozofo ellernu kontentige la lingvon. La fakto, ke Vinoba Bhave ellernis Esperanton, kiel ankaŭ liaj deklaroj pri la lingvo de Zamenhof, vekis grandegan interesiĝon ne nur en Hindujo, sed ankaŭ ekster ĝiaj limoj. La marta numero de "Esperanto" kun artikolo de T. Sekelj estis presita en 300 pliaj ekzempleroj, kiuj estis senditaj senpage al Hindujo. Aperis ankaŭ speciala eldono de la I.G.S. kun

la foto de Vinoba Bhave kaj Sekelj. Tiu numero estis sendita al ĉiuj konataj adresoj de gazetoj, presagentejoj, informaj bultenoj, UNESKO-instancoj, Naciaj UNESKO-Komisionoj tra la mondo. La pozitiva efiko de tiu grava evento jam nun sentiĝas. La apogo de Vinoba Bhave al Esperanto estas same grava, aŭ eble eĉ pli precipe en la landoj de Azio, kiel la siatempa apogo de Tolstoj. Lic. Sekelj donos pliajn detalojn pri sia agado dum la kongreso en Bruselo.

(11) **Resumaj ciferoj pri Informado** : Tabela trarigardo pri la informa laboro, farita en 1959, aperos en la julia-aŭgusta numero de "Esperanto". Ĉi tie estas donitaj nur la resumaj ciferoj kaj parenteze troviĝas, por komparo, la ciferoj por la jaro 1958 :

Entute alvenis respondoj de 31 (26) landaj asocioj aŭ kunlaborantoj. En 1959 aperis entute 5.307 (8.284) artikoloj kaj 9.313 (14.089) informoj pri Esperanto en la nacilingvaj gazetoj kaj revuoj. Okazis 1.383 (1.001) prelegoj pri Esperanto, kiujn ĉeestis 126.660 (69.920) personoj. Estis disaŭditaj 3.177 (2.383) nacilingvaj prelegoj aŭ prelegetoj per radio. Estis aranĝitaj 242 (238) ekspozicioj, kiujn vizitis 675.350 (661.260) personoj. Entute estis disdonitaj 442.000 (308.075) afiŝoj, flugfolioj, broŝuretoj kaj similaj propagandiloj. Ĝenerale en la mondo la interesiĝo pri Esperanto, precipe dank' al la agadoj okaze de la Zamenhof-Jaro, konsiderinde kreskis.

(12) **Generalaj rimarkoj** : Estas tute certe, ke la laboro sur la kampo de informado pliboniĝas kaj pliampleksiĝas de jaro al jaro. Grandparte dank' al tiu agado, en kiu aktive partoprenas preskaŭ 200 personoj en la mondo, ĉu kiel gvidantoj de la landaj informaj fakoj, ĉu kiel rektaj kunlaborantoj de la I.F. de UEA, la pozicioj de Esperanto multe pliboniĝis kaj la lingvo mem plue disvastiĝis. Estus, tamen, eraro pensi, ke nur la informado, eĉ la plej bona, per si mem sufiĉis, aŭ entute povus sufiĉi. La informado estas ligita al ĉiuj aliaj branĉoj de agado, subtenas ilin kaj mem estas subtenata de ili. Praktikaj utiligoj de la Internacia Lingvo en kiu ajn sfero — ekzemple en la radio, en iu kongreso, por sciencaj aŭ fakaj celoj ktp. — estas per si mem potencaj rimedoj por plua disvastigo de la lingvo. Tial, krom la rekta

informado, ankaŭ tiuj elementoj devas esti konsiderataj kiel gravaj faktoroj en la progresado de Esperanto kaj en la akirado de novaj pozicioj, precipe en la medioj de scienco, edukado kaj kulturo ĝenerale. Aliflanke, eĉ tiaj sendubaj valoroj povas atingi la vastan neesperantistan publikon sole tra diversaj formoj de taŭga informado. Ĝuste tial estas ankoraŭfoje necese emfazi la gravecon de la Baza Principaro pri la informado, kiun ĉiu devus atente trastudi kaj rigore observi.

VIII. ZAMENHOF-JARO

(1) **Baza Programo** : La tuta laboro en la Zamenhof-Jaro evoluis laŭ la plano fiksita de la IOK en la Baza Programo, publikigita unue en "Esperanto", decembro 1958. La Baza Programo, kune kun la Deklaracio, nomaro de la IPK kaj IOK aperis, krom en la Internacia Lingvo, ankaŭ en la angla, franca, hispana, nederlanda, germana, flandra, portugala, komplete, dum unuopaj partoj aperis en tuta aro da aliaj lingvoj.

(2) **Verko de Prof. Privat** : La verko de Prof. Privat pri la Vivo de Zamenhof aperis en la angla, eldonita de Esperanto Press en Kanado, kaj en la norvega lingvo.

(3) **Aliaj Verkoj** : En Varsovio aperis la verko "D-ro Esperanto" de Maria Ziółkowska, originale en la pola lingvo kun paralela traduko de Isaj Dratwer en Esperanto. La sama verko aperis en la franca traduko de S-ro André Ribot. La studo de Prof. Waringhien "Lazaro Ludoviko Zamenhof", eldonita de CED, aperis en la Internacia Lingvo, en la franca, angla kaj, poste, en nombro da aliaj lingvoj. Artikoloj, verkitaj de diversaj kunlaborantoj de CED (vidu la Raporton de CED) estis senditaj tra la I.F. de UEA al ĉiuj partoj de la mondo kaj aperis en multaj lingvoj en gazetoj kaj revuoj, entute en pluraj milionoj da ekzempleroj. Ĉio ĉi diskonigis la personecon de D-ro Zamenhof kaj de lia verko.

(4) **Radio** : La materialoj menciitaj sub (3) estis vaste uzataj dum la tuta jaro, sed precipe en decembro, por radio-programoj pri Zamenhof.

(5) **Festoj en Pollando**: Elstaraj aranĝoj okazis en Varsovio kaj Bjalistoko okaze de la Universala Kongreso (vidu V/1 la revuon "Esperanto", septembro, 1959).

(6) **"Esperanto"**: Dum la tuta jaro aperis en la revuo artikoloj pri Zamenhof kaj la Internacia Lingvo, verkitaĵoj de diversaj kunlaborantoj de CED. La decembra numero de "Esperanto" estis plene dediĉita al la memoro de D-ro Zamenhof. La materialoj publikigitaj en "Esperanto" estis poste utiligitaj por nacilingvaj studoj, artikoloj kaj prelegoj, kiel ankaŭ, grandparte, por la decembraj numeroj aŭ nacilingvaj numeroj de la cetera Esperanto-gazetaro.

(7) **Esperanto-gazetaro**: Preskaŭ la tuta Esperanto-gazetaro dediĉis la decembran numeron al la memoro de D-ro Zamenhof. Pluraj Esperanto-gazetoj enhavis nacilingvajn artikolojn pri Zamenhof, aŭ estis komplete eldonitaj en la nacia lingvo en pli granda nombro da ekzempleroj ol kutime. Tiuj specialaj numeroj estis distribuitaj ankaŭ al neesperantista publiko, precipe al diversaj edukaj, sciencaj kaj ĝenerale kulturaj instancoj.

(8) **Jubileaj Poŝtmarkoj**: Pollando, Bulgarujo kaj Brazilo eldonis memorigajn poŝtmarkojn.

(9) **Stratoj kaj Placoj**: Multaj urboj nomis en 1959 placojn aŭ stratojn laŭ la nomo de D-ro Zamenhof. La preciza nombro ankoraŭ ne estas konata, sed verŝajne ĝi turniĝas ĉ. la cifero 100.

(10) **Memorigaj Glumarkoj**: 300.000 ekzempleroj de la memoriga glumarko, eldonita de UEA, estas disvenditaj kaj distribuitaj.

(11) **Gravuraĵo kaj Fotokartoj**: Ankaŭ la gravuraĵo de Zamenhof, ellaborita de Prof. R. Rossetti, kaj la 8.000 ekzempleroj de la poŝtkarto kun la portreto de Zamenhof, estas distribuitaj.

(12) **Aliaj Formoj de Memorigo**: En diversaj landoj estis aplikitaj ankaŭ aliaj formoj, kelkfoje tre originalaj, de memorigo. Granda pola ŝipo, konstruita en la ŝipkonstruejo de Split (Jugoslavio) ricevis la nomon "Zamenhof". En kelkaj parkoj de britaj urboj florbudoj en formo de verda stelo aŭ kun la nomo Zamenhof memorigis la preterpasantojn pri la Zamenhof-Jaro. En Bournemouth

(Britujo) benko donacita de Gesinjoroj Laurie ricevis memorigan tabuleton pri la 100-jara datreveno. Memorigaj kalendaroj, poŝtkartoj, broŝuretoj k.s. aperis en multaj landoj.

(13) **Publikaj Aranĝoj**: Kiel sugestite en la Baza Programo, pluraj landaj Esperanto-kongresoj — bedaŭrinde ne ĉiuj — memorigis per specialaj aranĝoj la datrevenon. Ekde septembro 1959, sed precipe en decembro, okazis en diversaj urboj solenaj publikaj aranĝoj, dediĉitaj al la 100-jara datreveno. Laŭ la informoj ĝis nun ricevitaj precipe elstaraj estis la aranĝoj en Varsovio, Oslo, Helsinki kaj Kopenhago. La sekretario de la IOK akceptis inviton de pluraj urboj kaj inter la 2-15 de decembro faris paroladojn dum la aranĝoj en Bruĝo, Bruselo, Antverpeno, Hago, Arnĥemo, Essen, Hamburgo kaj Kopenhago. Pri ĉiuj aranĝoj, kiuj havis elstaran karakteron, la gazetaro kaj radio abunde raportis. Estas tre bedaŭrinde, ke multaj lokaj grupoj ne utiligis tiun unikan okazon kaj ne organizis unuarangajn publikajn aranĝojn kun bonaj programoj, en belaj salonoj kaj kun persona ĉeesto de edukaj aŭtoritatoj, ambasadoroj kaj kulturaj ataŝeoj, kiel tio okazis en Kopenhago.

(14) **IOK**: Ĝi havis sian duan kunsidon en Varsovio dum la U.K. Plenuminte sian laboron, ĝi ĉesis funkcii la 31-an de decembro 1959.

(15) **Oficialigo**: Kiel montrite en VI/A/7, la Plenuma Komitato de UNESKO oficialigis la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof. La Ĝenerala Direktoro de UNESKO sendis al ĉiuj Registaroj kaj neregistaraj organizaĵoj leteron CL/1406 de la 15-a de februaro 1960, por kiu ĝi invitis ĉiujn Registarojn partopreni en la memorigo de grandaj personecoj de la homaro, inter kiuj de D-ro Zamenhof, en la jaro 1960. En la nova situacio, kreita per tiu ĉi decido, estas necese plue celebri la 100-jaran datrevenon en ĉiuj lokoj kaj instancoj, en kiuj ankoraŭ ne okazis celebrado. Da tiaj eblecoj ekzistas multege. Pri la afero aperis artikolo en la aprila numero de "Esperanto". Speciala cirkulero kun sugestoj pri la estonta agado estas sendita al la landaj kaj fakaj asocioj, komitatoj, kunlaborantoj, ĉefdelegitoj, perantoj, redakcioj de la Esperanto-revuo kaj gazetoj.

(16) **Teknike Organiza Laboro**: Plej koncize ĝi povas esti resumita jene: 2 kunsidoj de la IOK; 19 cirkuleroj nur pri la Zamenhof-Jaro kun multaj aldonoj; 11 cirkuleroj pri la temo kun multnombraj aldonoj, senditaj de la I.F. de UEA (entute pli ol 200 paĝoj da stencilita teksto); pli ol 500 korespondadoj nur de la sekretario de la IOK.

(17) **Memorlibro**: Ĝi aperos antaŭ la Kongreso en Bruselo (vidu la raporton de CED).

(18) **Generala Rimarko**: Ankoraŭfoje montriĝis, ke per bone planita kaj konsciencie efektiviĝata laboro estas atingeblaj, eĉ nur per la minimumaj financaj rimedoj pri kiuj disponas la Movado, vere bonaj rezultoj. La grandaj realigoj atingitaj en la Zamenhof-Jaro estas ŝuldataj al tiuj du esencaj faktoroj: atente kaj realece plani, konsciencie kaj sindone realigi. Se oni komparas la planon entenitan en la Baza Programo kun la realigoj dum la Zamenhof-Jaro, oni facile konstato, ke absolute ĉiu punkto estas efektiviĝinta. La Bibliografio pri la Internacia Lingvo ne povis aperi en 1959 pro la plurmonata malsano de s-ro Auld, sed ĝi espereble aperos en 1960. Aliflanke estas faritaj kelkaj aliaj laboroj, kiuj ne estis antaŭviditaj en la Baza Programo, kaj atingitaj pliaj rezultoj, ekzemple la oficialigo de la Zamenhof-Jaro fare de UNESKO, la eldono de la Memorlibro kaj pluraj malpli gravaj. La financa bazo de tiu tuta agado estis la Zamenhof-Fondaĵo (vidu la Financan Raporton), por kiu entute ĝis la 1-a de aprilo 1960 estis kolektitaj 18212,07 guldenoj.

IX. SPECIALAJ KULTURAJ AKTIVECOJ

(1) **I.S.U.**: La 12-a Laborperiodo okazis en Varsovio de la 2-7 de aŭgusto. Kiel rektoro funkciis Prof. D-ro Tadeusz Kotarbiński, Prezidanto de la Pola Akademio de Sciencoj. Kiel sekretario plue funkciis Marjorie Boulton, M.A., B.Litt., D.B.E.A. Prelegis: Prof. D-ro Giorgio Canuto pri "Praktikaj Aplikadoj de la Seksa Diagnozo en Ĉeloj"; Prof. D-ro Paul Neergaard pri "La Lukto Kontraŭ Malsato — ĝia Internacia Organizado"; Prof. D-ro Hugo Sirk pri "La Centjara Jubileo de la Spektralanalizo en 1959"; Prof. D-ro B. Popović pri "Eblecoj kaj Malfacilaĵoj de Interplaneda Vojaĝado"; D-ro Andreo

Grebečki pri "Mezepoka kaj Renesanca Pola Arkitekturo"; Prof. Josip Vrančić pri "Estetika Analizo de Urbanisme-Arkitekturaj Karakterizoj de la Urbo Dubrovnik"; Marjorie Boulton pri "Joseph Conrad — Polo kiu iĝis Granda Angla Verkisto". — La morto de Prof. D-ro Hugo Sirk, je la tago mem de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, la 15-an de decembro 1959, pro strataĉcidento, forigis de la I.S.U. unu el ĝiaj plej erudiciaj prelegantoj. Lia memoro restos daŭre kara por ĉiuj kolegoj en la I.S.U. kaj por ĉiuj, kiuj havis la okazon konatiĝi kun li aŭ sekvi lian laboron.

(2) **Belartaj Konkursoj**: La ĉi-jaran konkurson partoprenis 40 verkistoj el 20 landoj per 88 konkursaĵoj. La unuajn premiojn ricevis: Albert Samyn (originala poezio), Clelia Conterno-Guglielminetti (originala prozo), Horst Michling (tradukita poezio), Albert Samyn (originala dramo). Sandor Czaszar ricevis premion por originala poemo kiel nova talento. Kiel sekretario plue funkciis s-ro Gerald C. Jervis. La juĝkomisiono konsistis el 6 elstaraj verkistoj. Raporto en "Esperanto", septembro 1959, p. 150.

(3) **Oratora Konkurso**: La temo estis "La Personeco de D-ro L. L. Zamenhof". La unuan premion gajnis Carlo Minnaja. La juĝa komisiono konsistis el s-roj Ivo Rotkvić, D-ro Ing. G. Azzi kaj G. Becker.

(4) **Frostavallen**: La Sveda Esperanto-Instituto, Sveda UNESKO-Konsilantaro kaj Sveda Instituto por Kultura Interŝanĝo kun Eksterlando organizis kulturen semajnon sub la ĝenerala titolo "Landoj kaj Popoloj — kun Atento pri Orienta kaj Okcidenta Kulturaj Valoroj". La ĉefa organizanto, komitatano Jan Strönnne, fiksas la programon interkonsente kun la ĝenerala sekretario, por ke tiu ĉi elstara kultura arango estu samtempe konforma al la Granda Projekto de UNESKO pri la Reciproka Apezado de la Orienta kaj Okcidenta Kulturaj Valoroj. Prelegis Prof. D-ro Ivo Lapenna, s-ro Eizo Itoo (kiu legis la prelegojn de Prof. D-ro N. Kawasaki), Lic. Tibor Sekelj kaj Docento S. Pragano. Ekster la programo prelegis f-ino Aafke Laverman. En la neoficiala parto de la programo estis detale pritraktitaj la tri ĉefaj aspektoj de la agado

por Esperanto: informado, instruado kaj praktikaj aplikoj. Entute ĉeestis pli ol 100 personoj el 13 landoj. Pli detala raporto en "Esperanto", oktobro 1959.

(5) **Magnetofona Servo:** Tiu ĉi servo estas bonege gvidata de s-ro R. Eichholz. La nombro de programoj kreskis de 65 al 82. Dum la pasinta laborperiodo estis entute kopiitaj 220 programoj. Mendoj de kopioj alvenis pli kontentige ol en la pasinteco. Dank' al la evoluo de la servo, ĝi povis montri en la pasinta jaro etan profiton. La servo estas gvidata je plena financa respondeco de la komisiito, kaj sekve ĝiaj elspezoj kaj enspezoj ne eniras en la Financan Raporton de la Asocio. La Estraro varme rekomendas al ĉiuj Esperanto-organizoj kaj unuopuloj utiligi la servon ankoraŭ pli abunde en la estonteco. Bona surbendigita programo povas prezenti tre interesan punkton de la programo en kunveno de loka societo.

(6) **Koresponda Servo:** La plurjara komisiito, s-ro Daniel Luez, devis bedaŭrinde ekŝiĝi el sia ofico pro privata troa okupiteco. La Estraro nun klopodas trovi alian komisiiton por tiu grava servo.

(7) **Filma Servo:** S-ro G. C. Fighiera, kiu gvidis ĝin ĝis la fino de la laborperiodo, sentis sin devigita ekŝiĝi por povi dediĉi pli da atento al la organizado de la U.K. La Estraro klopodos komplete reorganizi tiun servon kaj starigi ĝin sur solidan bazon.

(8) **Belarto:** La dua numero de tiu revuo, redaktata de Mag. W. Auld, aperos antaŭ la Kongreso en Bruselo.

(9) **Eldonaĵoj:** Ili estas menciitaj aliloke (vidu II/11 kaj la Financan Raporton). La Estraro planas pliajn eldonojn tuj kiam estos rehavigitaj la financaj rimedoj, elspezitaj por la publikigitaj eldonaĵoj. La Asocio ne deziras profiti per siaj eldonaĵoj, sed la enspezita mono estos utiligita por pliaj altvaloraj publikaĵoj, unuavice antologioj kaj tradukaj verkoj.

(10) **Libroserio "Okcidento-Oriento":** Estas pritraktita la ebleco eldoni serion da libroj en la kadro de la projekto de UNESKO "Oriento-Okcidento". La Estraro decidis, ke tiu serio nomiĝu "Libroserio Oriento-Okcidento". Ĉiuj

libroj devus havi la saman formaton, kvankam ili estus eldonitaj de diversaj Esperanto-eldonejoj. Tiu serio aperus sub la aŭspicioj de UEA. Estas farita principa interkonsento pri la afero kun la Sveda Eldona Societo pri eldono de "Kolekto de Rabindranath Tagore" kaj kun s-ro V. Setälä pri eldono de "Kalevala". La verko de Tagore verŝajne baldaŭ aperos, dum la eldono de Kalevala povos aperi nur kiam troviĝos solvo por la financa problemo.

(11) **Lingva Komisiono:** La Komitato akceptis en Varsovio ĝian regularon. Ĝis nun Doc. Pragano, Prof. Neergaard, Prof. Kawasaki, Doc. Régulo Pérez kaj Prof. Lapenna akceptis la proponon fariĝi membroj de la Ekzamena komisiono. Ĝi funkcios la unuan fojon dum la Kongreso en Bruselo. Kiel provizora sekretario funkcias s-ro N. Smith.

(12) **Lernejoj:** Rezulte de la decido de la Komitato de la 15-a de decembro 1959, estas entreprenitaj la unuaj paŝoj de agado por interŝtata akordo rilate enkondukon de Esperanto en la lernejojn. La unua cirkulero pri la afero kun pluraj aldonaj dokumentoj estas sendita al ĉiuj landaj asocioj kaj komitatanoj. Ĉar la afero troviĝas nur en la komenca stadio, ne estas eble doni ĉi tie pliajn detalojn. Pri la evoluo la landaj asocioj kaj komitatanoj estas regule informataj per cirkuleroj. (Vidu ankaŭ ĉap. X)

(13) **Kontrolkomisiono de lernolibroj:** Ĝi ne ricevis demandojn aŭ manuskriptojn en la pasinta jaro. Verkantoj de lernolibroj bonvolu noti, ke ili ĉiam povas turni sin al tiu komisiono por interkonsiliĝo.

X. ESPERANTO KIEL BAZA KAJ KOMPLEMENTA LINGVO

(1) **Necesa distingo:** La klopodoj menciitaj sub IX.12. havas kiel elirpunkton ĉion, kio ĝis nun estas atingita sur la kampo de instruado de Esperanto en la lernejoj. Tamen, tiu nova klopodo devas esti klare distingita de la kampanjo "Esperanto kiel baza kaj komplementa lingvo", kiun jam plurajn jarojn gvidas S-ro E. Malmgren kiel

komiŝito de UEA kun aro da kunlaborantoj en diversaj landoj. La klopodoj de S-ro Malmgren donis jam tre kontentigajn rezultojn. El lia raporto, kiu estas komplete prezentita al la Komitato, estas ĉerpitaj la sekvantaj plej gravaj faktoj.

(2) **Finlando**: La 28-an de oktobro 1959 la lernejoj aŭtoritatoj de tiu ĉi lando faris pioniran decidon, laŭ kiu kelkaj blindaj lernantoj ricevis la rajton anstataŭigi la latinan lingvon per Esperanto dum la gimnaziaj studoj kaj je la abiturienta ekzameno. Tiu decido havas precedencan karakteron kaj ebligis similan ekzamenigon ankaŭ al aliaj lernantoj. La eksperimenta instruado de Esperanto en la lernejo de Somero daŭre okazas kun ses lecionoj ĉiusemajne en la unua klaso kaj instruo per la lingvo de 18 geografiaj lecionoj ĉiusemajne dum 4 jaroj. Montriĝas, ke la lernantoj, kiuj komencis studi Esperanton en aŭtuno 1958, kapablas kun rimarkinda facileco studi geografion, kiu nun estas instruata nur en Esperanto. S-roj Setälä kaj Vilkki meritas gratulon pro la sukcesoj en Finnlando.

(3) **Danlando kaj Norvegujo**: Dum tiu ĉi studjaro Esperanto estas instruata en la kadro de la hortabelo en du lernejoj (en Fredrikshavn kaj Kopenhago) kaj nedevige en kvin aliaj lernejoj. Estas jam donita permeso por instruado de Esperanto en Odense por la jaroj 1960-1962, eksplacite kiel bazo por la studoj de fremdaj lingvoj. — En Sarpsborg (Norvegujo), post pluraj klopodoj de S-ro J. H. Rosbach, venis la permeso pri instruado de la lingvo en la lasta klaso de la gimnazio, nome du jarojn post la ekstudo de la franca. Esperanto do aperas ne kiel ponto al io alia, sed kiel memstara temo.

(4) **Francujo**: Deviga instruado de la lingvo nun okazas en du seminarioj por instruistoj en Perpignan. Ekde de aŭtuno 1959 Esperanto estas instruata, laŭ la raporto de S-ro Petit, en ĉiuj lernejoj kaj liceoj de Versailles en po unu klaso. Tiaj kursoj nun okazas en 16 klasoj de elementaj lernejoj kaj du klasoj de liceoj.

(5) **Jugoslavio**: Ĝis la fino de marto 1960 estas raportitaj entute 62 kursoj kun 1864 gelernantoj, sed ankoraŭ mankas raportoj de grandaj partoj de Serbio kaj Kroatio.

Malgraŭ tiu granda sukceso kaj la ĝenerale favora sinteno de la aŭtoritatoj, Prof. Rakuša tamen ne estas kontenta, ĉar la Esperanto-instruado pro la multaj klasoj preskaŭ eglitis el la manoj de la gvidantoj. Por la venonta jaro ĉio estas preparata ankoraŭ pli sisteme: lerniloj, programo kaj instruistoj.

(6) **Nederlando**: S-ino C. M. Burger, direktorino de la "Oficejo Esperanto en la Instruado", konsideras la pasintan jaron kiel preparan periodon. La Oficejo pretigis peticion, prezentitan al la kompetentaj aŭtoritatoj kun jena enhavo: a/ la Esperanto-diplomo havu la saman valoron kiel diplomoj pri aliaj lingvoj por instruado en elementaj lernejoj; b/ estu permesita la instruado de Esperanto en la programo de la elementaj lernejoj; estu faritaj eksperimentoj kun Esperanto kiel baza lingvo por la instruado de aliaj lingvoj en mezlernejoj. Ĝis la fino de marto 1960 estis kolektitaj 810.000 subskriboj, el kio pli ol 25.000 de unuopuloj. La ĉefinspektoro de la seminario instruado turnis sin al la Oficejo kun la peto, ke kelkaj esperantistoj estu nomitaj membroj de komisiono, kiu studos la egalrajtigon de Esperanto kun aliaj lingvoj en oficialaj ekzamenoj.

(7) **Nov-Zelando**: Post multaj klopodoj la Nov-zelandanoj atingis tre belan sukceson: la nova lerneja leĝo permesas eksplacite, ke Esperanto estu instruata precipe en la klasoj I kaj II de la lernejoj, se ili havas apartan kapablon kaj intereson por studi alian lingvon.

(8) **Bulgarujo**: Laŭ la informoj de la S-ro Boris Simeonov, la lingvo nun estas instruata en pli ol 50 lernejoj ekster la lerneja horaro. En januaro 1960 komenĉiĝis kurso por 20 geinstruistoj.

(9) **Britujo**: Laŭ la raporto de F-ino V. C. Nixon, en 22 britaj lernejoj Esperanto estas instruata. El tiuj, en 13 ĝi estas devige instruata.

(10) **Aliaj landoj**: En pluraj aliaj landoj okazas Esperanto-kursoj en la lernejoj, sed pri ili bedaŭrinde mankas pli precizaj informoj. (Vidu ankaŭ la raporton de CED. p. 10 kaj B.9 kaj C.7).

XI. JUNULARO

La Estraro nove elektita en la Internacia Junulara Kunveno en Gdańsk (la 15-a de la serio komenciĝinta en Groet en 1938-a, kaj la lasta kun tiu ĉi nomo, ĉar ek de la nuna jaro la renkontiĝoj de la esperantista junularo nomigis Kongresoj) respegulas en sia konsisto la gravecon akiritan en la junulara esperantista movado de multaj landoj, kiuj nur en la lasta periodo enviciĝis en la kadrojn de TEJO. Ĝi fakte konsistas el: Günther Becker, prezidanto, Marek Pietrzak kaj Richard Reuchlin, vicprezidantoj kun la respektivaj taskoj de disvastigo de Esperanto inter la orientlandaj junularoj kaj de organizado de servoj por la junularo per kunlaboro inter la diverslandaj sekcioj de TEJO, Nicola Minnaja, ĝenerala sekretario, Adriaan den Haan, kasisto, Ivo Osibov, redaktoro de la oficiala bulteno "La Juna Vivo", Nikolaj Nikolov, komisiito por kontaktoj kun ne esperantistaj organizaĵoj, kaj Heinrich Reiter, komisiito por organizo de vintra internacia renkontiĝo.

Inter la sekcioj de TEJO (el kiuj bedaŭrinde malfondiĝis Franca Esperanto-Junularo), vikle antaŭenpaŝas Junularo Esperantista Brita, dum estas anoncita la fondo de junulara sekcio en Belgujo.

La pasintjara Internacia Junulara Kunveno, okazinta en Gdańsk en la semajno antaŭ la Universala Kongreso, estis brila sukceso, pro la multenombra partopreno (proks. 300 gejunuloj) kaj pro la sindona laboro de la organizintoj sub la gvido de Marek Pietrzak. Same brile sukcesis la jam ne malpli tradiciaj vintraj renkontiĝoj, nome la Skiferio en Aŭstrujo (kun Skikonkurso kaj Vintra Universitato), la Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo (ĉiam pli internaciiganta pro la amplekso de la problemoj pritraktataj: ĉi tiun jaron oni konsideris la rilatojn inter Oriento kaj Okcidento, en la kadro de la granda projekto de UNESKO), la Skisemajno de Esperanto-Junularo de Svislando. Rimarkindaj estas ankaŭ la Someraj Esperanto-Tendaroj en Ĉeĥoslovakujo kaj la semajnfinoj en Svislando kaj Nederlando.

La organizo de la 16-a Internacia Junulara Kongreso estas en la manoj de la nederlanda sekcio de TEJO, kaj

la gastiganta urbo estas Rotterdam, en sia mondfama konferencejo "De Tempel".

XII. GENERALA TRARIGARDO

(1) **Literaturo**: En la periodo 1958-1959 entute aperis 161 libroj kaj broŝuroj, el kiuj aparte menciindaj estas "Virino ĉe la Landlimo" kaj "Eroj" de M. Boulton, "Lingvo kaj Vivo" de G. Waringhien, "Plena Gramatiko", Vol. I, tria eldono de K. Kalocsay kaj G. Waringhien. Entute inter 1945-1959 aperis 1.233 libroj kaj broŝuroj.

(2) **Revuoj kaj Gazetoj**: Ankaŭ la nombro de la Esperanto-periodaĵoj plue kreskis. Nun regule aperadas preskaŭ 100 revuoj, gazetoj kaj bultenoj en Esperanto. Aparte menciindaj estas "Esperantologio", kiu komencis reaperadi en 1959, kaj la malnovaj "La Nica Literatura Revuo", "Norda Prismo", "Scienca Revuo", "La Praktiko", "La Suda Stelo", "Heroldo de Esperanto". Plue aperadis ankaŭ la grandaj revuoj "El Popola Cinio" kaj "Nuntempa Bulgario". Same "Bulgara Filmo". La redakcio de "Pollando" eldonis unu numeron de tiu luksa periodaĵo en Esperanto. En Japanujo estas speciale menciinda la tre bone redaktata "Oomoto". Bedaŭrinde ĉesis aperadi "Internacia Pedagogia Revuo". Kelkaj organoj de la landaj asocioj pliboniĝis. Pluraj, tamen, ankoraŭ estas sur malalta nivelo kaj enhavas tro da naĝilingvaj tekstoj. Kompleta listo de la plej gravaj periodaĵoj estas publikigita en la Jarlibro, 1960.

(3) **Lernolibroj**: Aperis 15 novaj lernolibroj de Esperanto kaj 8 vortaroj. La nombro de lernolibroj publikigitaj de 1945-1959 estas 128 kaj tiu de vortaroj 58, plus 23 legolibroj, entute 209. Efektive nun ekzistas sufiĉe da lernolibroj. Estas farita speciala aranĝo kun Vilho Setälä, la aŭtoro de la tre bona lernolibro "Privilegia Vojo", por ke ĝi povu esti uzata en lingvoregionoj, por kiuj ankoraŭ ne ekzistas lernolibroj de Esperanto.

(4) **Radio**: En 1959 22 radio-stacioj elsendis 1959 Esperanto-programojn kompare kun 17 stacioj kaj 1.560 programoj en 1958. Varsovio elsendas ĉiutage en la Internacia Lingvo. En marto 1960 "Voĉo de Ameriko"

komenciĝis elsendi ĉiusemajnan duonhoran programon en Esperanto.

(5) **Resumoj, Rubrikoj kaj Kursoj en Gazetoj**: Laŭ la enketo de CED, ĉ. 180 sciencaj kaj fakaj periodaĵoj publikigas artikolojn aŭ resumojn en Esperanto. Al dudeko da verkoj estas aldonita resumo en la Internacia Lingvo. Ĉ. 50 nacilingvaj gazetoj havas regulajn rubrikojn kun nacilingvaj informoj pri Esperanto. Laŭ la esploroj de CED, 59 nacilingvaj gazetoj kaj revuoj (plej multaj en Jugoslavio kaj Nederlando) havis kursojn de Esperanto. El tiuj aparte menciinda estas la sensacia kurso de la nederlanda gazeto "De Posthoorn", gvidita de s-ro Kervers, kiun aktive partoprenis ĉ. 1.500 gelernantoj. Imitinda ekzemplo por la aliaj landoj. La ĉefa manko de tiaj pergazetaj kursoj estas, ke kutime la lernantoj ne estas prizorgataj persone, nek oni atentis al la bezono aliri ilin en la organizitan movadon post la finiĝo de la kurso. Escepto estas la menciita kurso en Hago.

(6) **Trafiko kaj Komercio**: Ankaŭ sur tiu ĉi kampo la lingvo ĉiam pli vaste aplikiĝas. Sufiĉas kompari la nombron de komercaj kaj turismaj reklamoj en la Jarlibro kaj en la Esperanto-gazetaro por konstati tion. Aperis kvar pluaĵgvidlibroj kaj 15 turismaj prospektoj. Inter 1945 kaj 1959 entute aperis 15 gvidlibroj kaj 292 prospektoj (laŭ CED). La esperantistaro devus pli multe utiligi la lingvon en komercio kaj turismo. Precipe dum la vojaĝoj ĉiu esperantisto devus konstante utiligadi nur Esperanton por interkompreniĝo en fremdaj landoj.

(7) **Prelegvojaĝoj**: F-ino Joŝiko Kaĵino entreprenis grandan vojaĝon tra eŭropaj landoj. La prelegvojaĝo komenciĝis en 1958 kaj finiĝos en junio 1960. Ŝi faris tre grandan nombron da prelegoj en preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo kaj atingis bonegan sukceson. Miloj da personoj aŭskultis ŝiajn prelegojn, ĉiam kun nacilingva traduko, kaj centoj da gazetoj raportis. Ankaŭ s-ro Eizo Ito, same el Japanujo, faris multajn prelegojn en diversaj eŭropaj landoj. Menciindaj estas ankaŭ la profesia rondvojaĝo de docento D-ro R. H. Osborne el Skotlando kaj la prelegoj pri Italujo, kiujn faris S-ro G. C. Fighiera en Pollando.

(8) **Junularo kaj Infanoj**: Tiurilate ekzistas grandega diferenco inter unuj landoj kaj la aliaj. Dum en kelkaj — precipe en la slavaj — la Movado ĉefe konsistas el junaj homoj, en aliaj landoj la junularo ankoraŭ ne estas kontentige altirita al la Esperantismo. Ĝenerale parolante, tamen, dank' al la laboro ĉefe de la junulara sekcio de UEA — TEJO — kaj pluraj ĝiaj landaj branĉoj la laboro inter la junularo montris plian progreson. La ĉiam pli bone organizata Infankongreseto, la Bulteno Gepatra kaj unuavice la gepatroj, kiuj ekuzis Esperanton kiel paralelan lingvon en la familia vivo, kontribuis kaj plue kontribuas al la disvastigo de la lingvo inter la infanoj. La vere unika eldonaĵo "Grajnoj en Vento", kiun sindone kaj admirinde organizis kaj gvidas s-ro M. Erbetta kun aro da same sindonaj kunlaborantoj en diversaj landoj helpis al kunligo de infanoj kiuj lernas la lingvon en diversaj lernejoj. La nova kampanjo "Esperanto en la lernejojn" tute certe multe helpos al la plua disvastigo de la lingvo en la lernejoj, kio devos doni junajn kaj freŝajn fortojn al la Esperanto-Movado.

XIII. KONKLUDO

Tiu ĉi raporto, kvankam sufiĉe longa laŭ la nombro de paĝoj, tamen nur plej mallonge kaj plej koncize formulas la ĉefajn atingojn de la Asocio kiel rezultojn de ĝia multflanka agado. La konkludo altrudiĝas per si mem: UEA kaj la Esperanto-Movado ĝenerale faris en la Jubilea Jaro 1959 plian paŝon antaŭen el ĉiuj vidpunktoj. Tiu progreso ne estas io, kio okazas hazarde aŭ per si mem, sed rezulto de bone pripensitaj ĝenerala laborprogramo kaj detale ellaboritaj planoj por diversaj branĉoj de agado, tute speciale por la grandaj kampanjoj. Ĝi estas rezulto de sindona kunlaborado de ĉiuj organizaĵoj kaj unuopuloj, el kiuj konsistas la Asocio, sed unuavice de tiuj funkciuloj, kiuj estas respondecaj por unuopaj branĉoj aŭ ŝargitaj pri specialaj taskoj ĉu en la centraj organoj de la tutmonda Movado, ĉu en la landaj asocioj aŭ lokaj grupoj. Oni komencas kompreni ĉiam pli kaj pli bone, ke UEA estas ni ĉiuj de la ordinara membro ĝis la prezidanto de la Asocio. Tiu kompreno de unueco ne nur organiza, sed ankaŭ unueco de la celo, unueco de la agado

kaj fortostreĉoj, estas unu el la ĉefaj elementoj de la sukcesoj atingitaj kaj de la plua progresado en la estonteco.

Prof. D-ro G. Canuto,

Prof. D-ro Ivo Lapenna,

Prezidanto

Generala Sekretario

RAPORTO PRI LA AGADO

de la

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

por la periodo de 1-IV-1959 ĝis 1-IV-1960

A. ORGANIZAJ DEMANDOJ

(1) **Oficejo** : Ĝi troviĝas, same kiel en la antaŭaj jaroj, en 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, proksime al la centro de Londono. Ĝi estas bone ekipita kaj provizore kontentigas la bezonojn de la laboro.

(2) **Kunlaborantoj** : CED nun havas 94 kunlaborantojn el 22 landoj. La kunlaborantoj akurate plenumas la laborojn, kiujn ili prenas interkonsente kun la direktoro. La sekretario plenumas la tutan teknikan laboron de la oficejo.

(3) **Kunveno en Frostavallen** : Okaze de la kultura aranĝo en Frostavallen (vidu la Raporton de la Estraro IX/4) kelkaj kunlaborantoj de CED, troviĝintaj tie, plurfoje diskutis diversajn problemojn ligitajn al la laboroj de CED.

(4) **Financa Situacio** : El la konto de CED, publikigita aliloke, vidiĝas, ke la elspezoj entute estis £ 679.10.4, do malpli ol en la jaro 1958, kvankam la agado en la pasinta jaro estis vere ampleksa. La donacoj estis entute £ 78.14.10, konsiderinde malpli ol en la antaŭaj jaroj, kio verŝajne estas kaŭzita de la fakto, ke pluraj personoj, kiuj kutime helpis finance al CED, donis konsiderindajn sumojn al la Fondaĵo-Zamenhof. Estus necese, ke ĉiuj komitatoj kaj la gvidantoj de la landaj asocioj diskonigu la laboron kaj gravecon de CED por la Movado, kaj klopodu havigi al ĝi multe pli da financaj rimedoj.

B. PLENUMITAJ LABOROJ

Agante laŭ la speciala laborplano, kiun ĉiujare aprobas la Komitato, CED plenumis en la pasinta laborperiodo jenajn taskojn :

(1) **Dokumenta materialo** : Ĝis la 1-a de aprilo 1960 estas entute kolektitaj, ordigitaj kaj registritaj 1.529 dokumentoj pri Esperanto kaj pri la lingva problemoj en la internaciaj rilatoj. Krome, estas registritaj almenaŭ 3.000 eroj el diversaj gazetoj kaj revuoj. Ĉio, kio povas esti utila por la laboro de CED, estas sisteme notata.

(2) **CED-dokumentoj** : La dokumenta materialo menciita sub (1) servas kiel bazo por verkado de specialaj dokumentoj, ĉefe en la angla, sed kelkfoje ankaŭ en la franca, hispana kaj aliaj lingvoj, laŭ la plano ellaborita en 1952. Ĝis nun CED publikigis 119 tiajn dokumentojn. La plej gravaj estis tiuj, kiuj koncernis la Zamenhof-Jaron. Ili aperis en la serio CED/6 (angle aŭ france RDC/6). En tiu serio aperis la studo de Prof. Waringhien kaj la studoj aŭ artikoloj de Prof. Lapenna, Marjorie Boulton, John Francis kaj William Auld. Nur tiuj dokumentoj havis 73 stencilitajn paĝojn.

(3) **Artikoloj** : Okaze de la Zamenhof-Jaro 24 kunlaborantoj de CED verkis artikolojn, kiuj aperis parte en la revuo "Esperanto" kaj parte estis senditaj de la Informa Fako de UEA al ĝiaj kunlaborantoj. Preskaŭ ĉiuj artikoloj estis tradukitaj en diversajn naciajn lingvojn kaj publikigitaj en nacilingvaj revuoj. Ili aperos denove en la Memorlibro.

(4) **Universala Ekspozicio**. La kvina elmonro de la Universala Ekspozicio estis en Varsovio dum la Universala Kongreso kaj ĝi vekis grandan interesigon de la publiko. La sesa elmonro estis en unu el la salonoj apartenantaj al la parlamenta konstruaĵo en Hago. Ekde sia unua elmonro en Montevideo, la Universala Ekspozicio fariĝis grava elemento en la laboro de CED. Pri ĝia daŭra kompletigo nun zorgas s-ro J. Calado kiel komisiito de CED. La materialoj nun troviĝas en Rotterdam.

(5) **Bibliografio** : La kunlaboranto de CED por tiu branĉo, Mag. W. Auld, finis la Bibliografion por la jaroj 1958 kaj 1959. Nun li kompletigas la Bibliografion por la periodo 1929-1945. Kiam tiu laboro estos finita, CED klopodos presigi monumentan kompletan verkon "Bibliografio de la Internacia Lingvo".

(6) **Index Translationum** : Plia materialo estas sendita al la redakcio de tiu publikaĵo de UNESKO.

(7) **Radio** : La kunlaboranto por tiu fako, s-ro G. Largentier, ellaboris statistikon pri la Esperanto-elsendoj en 1959. La nombro de elsendoj estis 1959 (kompare kun 1.560 en 1958) kaj ili daŭris precize 660 horojn (kompare kun 459,35 horoj en 1958). Aliaj detaloj troviĝas en la rubriko de CED, "Esperanto", n-ro 3/1960.

(8) **Eminentaj Esperantistoj** : S-ino Emilija Lapenna, kunlaborantino de CED pri statistikaj demandoj, entreprenis enketon kun la celo registri ĉiujn esperantistojn, eminentajn precipe sur la kampo de scienco kaj kulturo. Tiu laboro estis finita en 1959 kaj la rezultoj publikigitaj en la novembro numero de "Esperanto".

(9) **Lernejoj** : Pere de sia kunlaboranto por lernejaj aferoj, s-ro D. Kennedy, CED entreprenis du novajn enketojn sur tiu kampo (vidu la pasintjaran raporton). Bedaŭrinde multaj geinstruistoj tute ne respondis malgraŭ la insistaj petoj de CED. La enketo tial devis esti pli-longigita al la nuna jaro kaj ĝi finiĝos en junio. Espereble almenaŭ nun la instruistoj-esperantistoj — ĉiuj — respondos per poŝtkarto al tiu vere grava enketo, kiu estos unu el la ĉefaj elementoj en la agado por enkonduko de la lingvo en la lernejojn.

(10) **Societoj** : Fine de 1959 CED entreprenis, pere de sia kunlaborantino s-ino Emilija Lapenna, plian enketon rilate la Esperanto-societojn. La demandfolioj estis ĝustatempe senditaj. La enketo kontentige progresas. Espereble, post ĝia finiĝo, oni havos klaran bildon pri la nombro de la lokaj Esperanto-societoj, pri ilia karaktero, laboro kaj forto.

(11) **Ekonomiaj Malavantaĝoj de Multlingveco** : Pro la granda laboro okaze de la Zamenhof-Jaro, tiu ĉi tasko bedaŭrinde ne povis esti plenumita. Estas kolektitaj kelkaj pliaj dokumentoj. Se iel eble, speciala studo estos farita en 1960.

(12) **Memorlibro** : Antaŭ la Kongreso en Bruselo aperos la Zamenhof Memorlibro. Ĝi enhavos nombron da artikoloj verkitaj de eminentaj esperantistoj, preskaŭ eksklud-

zive kunlaborantoj de CED. En la libro troviĝos ankaŭ dokumentoj pri la Zamenhof-Jaro, multaj fotoj, parte ankoraŭ nepublikigitaj, kaj trarigardo de la ĉefaj eventoj en la Zamenhof-Jaro. La libro, redaktita de la direktoro de CED, estas jam kompostita kaj nun presata. Ĝi aperos kiel publikaĵo de CED.

(13) **Fotoservo pri Zamenhof**: CED iniciatis novan laboron: kolektadon de fotoj el la vivo de Zamenhof kaj de ĉio en ligo kun lia laboro. Tiun taskon proprainciate komencis s-ro Henk Thien el Amsterdam, kiu sukcesis jam havigi belan kolekton. Nun s-ro Thien fariĝis konstanta kunlaboranto de CED sur tiu kampo kaj gvidanto de la servo.

(14) **Laboro de la kunlaborantoj**: Pluraj kunlaborantoj de CED estas tre aktivaj ankaŭ ekster la kadroj de la laboro de CED en la senco de ĝia programo. Tiurilate aparte menciinda estas la laboro de D-ro A. Bormann, fondinto de la Societo por Internacia Lingvo kaj redaktoro de ĝia bonega Bulteno. En tiu bulteno aperas tre bonaj dokumentaj materialoj, kiujn ofte utiligas CED por siaj eldonaĵoj. Menciindaj estas ankaŭ la leteroj — kelkfoje veraj studoj — kiujn sendas diversaj kunlaborantoj de CED al fakaj revuoj pri la lingva problemo.

(15) **Raportoj**: Koncizaj raportoj kaj informoj pri la agado de CED regule aperis en la organo de UEA.

C. LABORPLANO POR 1960/1961

(1) **Kunlaborantoj**: Estos necese forstrekii el la listo de kunlaborantoj kelkajn personojn, kiuj montriĝis neajmaj. Aliflanke CED volonte akceptos la kunlaboradon de kvalifikitaj specialistoj, kiuj pretas kontribui per siaj studoj aŭ alimaniere al la laboro de CED.

(2) **Dokumenta Materialo**: Daŭrigi la kolektadon kaj registradon de gravaj dokumentoj.

(3) **Eldonado de Dokumentoj**: Daŭrigi la regulan eldonadon. Se iel eble, eldoni kelkajn pli grandajn dokumentojn almenaŭ kun presita kovrilo, ĉar la spertoj montris, ke ĝuste tiaj dokumentoj havas plej grandan efikon.

(4) **Dokumentoj CED/6**: Konsiderante la decidon de UNESKO pri la oficialigo de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, eldoni, se iel eble, ĉiujn studojn el la serio CED/6 en la angla, en presita formo.

(5) **Bibliografio**: Eldoni la verkon "Bibliografio de la Internacia Lingvo" tuj kiam la manuskripto estos preta, verŝajne en 1960. Preni la financajn rimedojn por tiu ĉi eldonaĵo el unu el la fondaĵoj.

(6) **Radio**: Enketo pri la elsendoj en 1960 kaj eldono de speciala dokumento.

(7) **Lernejoj**: Fini la enketon kaj publikigi la rezultojn.

(8) **Universitatoj**: Daŭrigi la enketon surbaze de la rezultoj jam publikigitaj de Prof. Neergaard en Esperantologio, 1959.

(9) **Esperanto-Societoj**: Fini la enketon kaj publikigi la rezultojn.

(10) **Ekonomiaj Malavantaĝoj de Multlingveco**: Kompletigi la dokumentaron kaj, se eble, verki studon pri la afero.

(11) **Faktoj pri Esperanto**: Prepari la manuskripton por la dua eldono de la verko "La Internacia Lingvo — Faktoj pri Esperanto", tiel ke la dua eldono — korektita kaj konsiderinde kompletigita — povu aperi tuj post kiam elĉerpiĝos la unua eldono.

Prof. D-ro Ivo Lapenna,
Direktoro de CED

Raportoj de Landaj, Neneŭtralaj kaj Fakaj Asocioj

La sekvantaj notoj estas kompilitaj de raportoj de la koncernitaj organizaĵoj.

I ALIĜINTAJ LANDAJ ASOCIOJ

1) **Aŭstrujo.** Aŭstria Esperantista Federacio. Nombro de membroj: 609; grupoj, sekcioj: 34; kursoj en 1959: proks. 15, partoprenantoj: proks. 180. Aperis 8 numeroj de informa bulteno por la gazetaro; Artikolaro en la gazetaro laŭ individua iniciato; konstanta E-kurso; Radio-prelegoj ĉiusemajnaj Vieno II; Radio-intervjuoj; Pli-multigo de la fervojstacioj kun E-Servo-tabuloj; Turisma prospekto pri Salzburg; Varbado en popolaj altlernejoj; Pliintimigo de la kontakto kun SERVAS-movado per komitatano de la afergvidanto de AEF; Kontaktigo de la komisiito por la Eŭropa Lingvo-Kampanjo, D-ro Herrmann, kun kompetentaj instancoj aŭstriaĵ.

En Graz okazis la aŭstria E-Konferenco (230 partopr.). La japano Eizo Ito prelegis en 6 aŭstriaĵ urboj. Parolis laŭ diapozitivaj antaŭ lernejaj klasoj, gepatra societo, en popola altlernejo, al vastigitaj E-rondoj, kun intervjuoj por gazetistoj, en radio, kun vastskala eŭro en la gazetaro loka. Estis eldonita la III-a volumo de Aŭstria E-Antologio. Okazis IFEF-kongreso en Linz, postkongreso en Vieno; Internacia Esperantista Renkonto en Graz; Skiferioj en Kitzbühel kaj Filzmoos (junularo); feriosemajno en Ebensee (naturamiko); Havis lokon prezento de la E-sonfilmo pri Aŭstralio en 3 urboj de Aŭstrio. Zamenhof-Matineo kun arta programo okazis en Vieno. Zamenhof-Jubileo-Festo en Graz en solena kadro kun int. publiko. En Linz estis nomita Zamenhof-strato. Aŭstria Zamenhof-Festo okazis ankaŭ en Vieno kun digna programo. Zamenhof-festoj en multaj lokoj (6 sendis raportojn). E-tabulo estis fiksita en la Esperanto-parko de Wiener Neustadt. Oni enmurigis memortabulon pri Zamenhof en Florianigasse, sub tabulo pri Albert Schweitzer (hotelo Hammerand), inaŭgurita de s-ano urbestro Jonas.

Aniĝis al la Internacia Patrona Komitato: Federacia

Kanceliero Ing. D-ro h. c. Julius Raab; Prez. de Nacia Konsilantaro D-ro Felix Hurdas; Prez. de Rechnunghof (plej alta kontrol-instanco de la ŝtato) eksministro Dipl.-ing. D-ro mag. Hans Frenzel; Min. D-ro h. c. ing. Leopold Figl; urbestro de Vieno Franz Jonas; Prez. de la Eŭropa Virina Asocio Lola Solar kaj akad. skulptisto Gustinus Ambrosi, Vieno.

Estis kreita premiso por la pilargigo de la societo "Amikoj de Esperanto" per ŝanĝo de la societnomo: "Societo por internacia kontakto (Esperanto-Amikoj)", estis eldonita germanlingva bulteno. Aperis en Aŭstrio dum 1959 pli-malpli regule 10 E.-organoj. Aktivado en popolaj altlernejoj. Reokazis printempe kaj aŭtune ŝtataj E-ekzamenoj. En kadro de la Aŭstria Esperanto-Instituto estis daŭrigata la kampanjo kontraŭ senkonsciencia neologismo de aŭtoroj kaj redaktoroj. Stipendio "Slimbanejo Neydharting": kiel ĉiujare 5 kunlaborantoj de la E-movado internacia gastis en la internacie fama kuracbanejo de s-ano Otto Stober, direktoro de la instituto, dum 14 tagoj tute senkoste, eĉ ricevis poŝmonon. La aŭstria E-movado ricevis subvenciojn de diversaj ŝtataj instancoj kaj korporacioj, ekz. de la Instru-Ministerio, de la urbo Vieno, de Laborista Ĉambro, Sindikata Ligo, Sparkaso ktp. La fervojista Esperantistaro en sia Centro en Linz sukcesis instal belan E-hejmon kun div. aparatoj (ekz. projekciilo, magnetofono, radio-aparato). Notinda leviĝo de nia movado en la federacia lando Karintio (fondo de landa societo kaj aplaŭdinda aktivado). Ekaktivigo de junulara movado.

2) **Belgujo.** a. Flandra Ligo Esperantista. Dum la Zamenhof-jaro niaj ok kluboj organizis 5 kursojn kun proksimume 50 gelnantoj kiuj finis la lernadon. Kompreneble ke la Zamenhof-jaro konsiderinde influis la movadon en nia teritorio, i.a. pro la abundeco de la informoj, artikoloj kaj gvidaj ideoj kiujn ni ricevis de CED kaj de la Centra Oficejo. Plejparte estis nia revuo "Flandra Esperantisto" kiu respeguligis tion pro la transpreno de diversaj artikoloj, post traduko en la nederlandan (-flandran) lingvon. Kelkaj de tiuj artikoloj estis transprenitaj de naci-lingvaj gazetoj. Meze de la jaro ni eldonis la Zamenhof-broŝuron kaj sendis ĝin al multaj

oficialuloj de nia lando. En decembro, la ĉefa kulmino de la Zamenhof-jaro, ni gastigis D-ron Ivo Lapenna en la urboj Brugge, Brussel kaj Antwerpen, kie la Generala Sekretario majstre paroladis pri la eminenta D-ro Zamenhof. Dum la sama monato, la Nederlandlingva Televido de Bruselo elsendis intervjuon kun S-ro Debruyne L., pri la celo de la Zamenhof-Jaro.

Ni mencias ankoraŭ kelkajn aliajn raportendajn okazintaĵojn: Fl.L.E. partoprenis en la 8-a Beneluksa Kongreso en Haarlem, Pentekosto 1959; Ni instigis niajn gemembrojn sendi uzitajn poŝtmarkojn al S-ro P. Zacho Kopenhago, kiu forvendis ilin profite al UEA, kaj tiel Fl.L.E. atingis la duan lokon en la kolektado. En Bernem nia loka kerno aranĝis ekspozicion kaj disdonis faldfoliojn al 11.000 personoj. Kelkaj estraranoj faris rondvojaĝon al diversaj lokoj por instigi la sekciojn al organizo de kursoj kaj pli vigla grupa vivado.

b. Reĝa Belga Ligo Esperantista (R.B.L.E.) En la Ligo estis registritaj, je la fino de 1959a, 467 membroj en 7 lokaj grupoj, kiuj aranĝis entute 20 kursojn kun 238 lernantoj. La lernolibro "Initiation à l'Espéranto" de D-ro P. Denoel estis eldonita kaj disvendata. La dumonata gazeto "Belga Esperantisto" regule aperadis dum la tuta jaro. Ĉiusemajne komunikaĵoj, kelkfoje kun artikolo, estis sendataj al la ĉefaj ĵurnaloj. En Verviers, pli ol 50 afiŝoj pri la "Troja Ĉevalo" staras ĉe montrofenestroj en la urbo. Radio kaj Televido organizis priesperantan elsendaĵon.

La 42-a Belga Kongreso, samtempe la 6-a Beneluksa, okazis je Pentekosto en Haarlem, Nederlando. En Lieĝo okazis internacia Trilanda Renkontiĝo (landlimaj regionoj germanaj, nederlandaj, belgaj) kun 100 partoprenantoj kiuj estis solene akceptitaj de Provinca Estraro. Ok gazetoj raportis. Gravaj ekspozicioj okazis en Bruselo (Centra Stacidomo), en Verviers (Grand Bazar) kaj en Charleroi. Tiu ĉi lasta estis vizitata de 616.864 personoj. La Ligo organizis kvar gravajn prelegvojaĝojn, nome por Prof. D-ro Lapenna, por S-ro Fighiera, por S-ro Eizo Itoo el Japanujo kaj por S-ro Jaumotte, kiu prelegis en diversaj urboj okaze de la Zamenhof-jaro.

Pri Kongolando, ni citu paroladon pri Esperanto kaj aperigon de artikoloj pri nia lingvo en du gazetoj de

Stanleyville. Dum la tuta jaro oni ĉie ankaŭ multe laboris antaŭvide de la estonta 45-a Universala Kongreso, en Bruselo.

3) **Brazilo**, Brazila Esperanto-Ligo. 5.313 membroj, 45 grupoj. Novaj grupoj aŭ kluboj fondiĝis en Feira de Santana (Baia), Uberaba, Ituiutaba kaj Monte Alegre (Minas Gerais), Campinas (São Paulo) Santa Maria (Rio Grande do Sul), Campo Grande (Mato Grosso). Dum 1959 estis 4.000 lernantoj (tamen ne ekzistas precizaj nombroj). Kelkmiĵoj da flugfolioj estis disdonitaj ne nur de BEL, sed ankaŭ de diversaj filiaj grupoj, speciale de Esperanto-Asocio de Itabuna. Radistacioj en Natal, Salvador, São Paulo, Rio de Janeiro kaj aliaj urboj disradias regulajn Esperanto-programojn. Kelkaj eventuale tion faras. Okazis ankaŭ du programoj de Televidado. Ĵurnaloj en Maceió, Juiz de Fora, Natal, Santa Maria, aperigas konstantan rubrikon pri E. 10 ekspozicioj estis organizitaj; rimarkindaj estas tiuj de Salvador, Rio de Janeiro, Nilopolis, kaj Tupaciguara.

XVI Brazila Kongreso de Esperanto (18/25 Oktobro, en Salvador) atingis plenan sukceson de ĉiuj vidpunktoj. Ĝin apogis la registaroj, federacia, ŝtata kaj komunuma. Grandan helpon donis la Universitato de Bahia, kiu i.a. eldonis tradukon de fama poeto Castro Alves, sub la titolo "Elektitaj Poemoj". Tre plaĉis ludado de "La Maskoj", teatraĵo de alia konata poeto Menotti Del Picchia. III-a Esperanto Kunveno de Ŝtato Rio de Janeiro okazis en Nilopolis (2/3 Aŭgusto) kun inaŭguro de Ŝtato Esperanto. BEL eldonis en portugala lingvo la libron "Zamenhof - Inicijato de Esperanto", de A. Lopez Luna, traduko de Carlos Domingues, interesa biografio de Z. Ĝi ankaŭ aperigis en dua eldono la lernolibron "Metodo Elementar de Esperanto", de Torres Pastorino. Dank'al la kunlaboro de la Biblioteko de la Armeo, aperos en E. "Inocencia" de Taunay, kiu estas la patrono de tiu biblioteko, kaj same pro la kunhelpo de Ŝtata Presejo de Minas Gerais aperos "Rekremento", de José Americo: temas pri du famaj brazilaj romanoj.

En pluraj urboj okazis brilaj solenaĵoj kun granda publiko, memorige al la Zamenhof-Jaro. En Rio de Janeiro faris belan paroladon la konata verkisto Malba

Tahan en kunsido prezidata de la Rektoro de la Universitato de Brazilo, kaj en artefesto realigita en Nacia Lernejo de Muziko, aŭdiĝis kanto kaj deklamado en Esperanto. Ĝuste en 15/12 la Ministro de Edukado kaj Kulturo faris saluton per "Voĉo de Brazilo", programo, kiu estas disradiata de ĉiuj centoj da stacioj en la tuta lando. Gravaj programoj estis la XVI-a Brazila Kongreso, jam preparolita; la eldono de memoriga poŝtmarko, fare de la Departamento de Poŝtoj kaj Telegrafoj kaj kiu estas la sepa poŝtmarko rilatanta al E. en Brazilo; la oficiala uzado ankaŭ de memoriga poŝtstampo, farita de tiu Departamento; la starigo de monumento al Z. en Rio de Janeiro, fare de ties urbestrejo mem. En la Komunuma Lernejo "Pollando" oni inaŭguris bibliotekon sub la nomo de Zamenhof kaj kun lia portreto, donacita de BEL. Pli ol 20 stratoj kun la nomo Z. aŭ E. ekzistas en Brazilo. La lastaj aperintaj situacias en Natal (Rio Grande do Norte), Feira de Santana (Baia) Nilopolis (Stato Rio de Janeiro), Campinas kaj Sorocaba (São Paulo) Soledade kaj Santa Maria (Rio Grande de Sul). La grava V-a Brazila Kongreso de Komunumoj rekomendis al la Komunumoj, ke ili honorigu Z. per stratoj, kaj tre kredeble rezultos pluraj stratoj novaj. KURSOJ — Krom la kursoj tenataj de la grupoj estas menciindaj la kursoj per korespondado, farataj de BEL mem en la tri gradoj: elementa, supera kaj profesora. Tiaj kursoj plene floras. Konsiderante, ke la diplomoj de Esperanto devas havi internacian karakteron BEL transpagas al la Akademio de Esperanto parton de la ricevitaj diplomkotizoj.

4) **Britujo.** Brita Esperantista Asocio. — The British Esperanto Association. Ĉe la fino de 1959 la Asocio havis 1513 individuajn membrojn (inkl. 594 individuajn membrojn de UEA), 12 regionajn federaciojn kaj 55 grupojn. Dum la jaro disvendigis aŭ disdonigis preskaŭ 19 mil flugfolioj kaj prospektoj, inkl. preskaŭ 700 ekzemplerojn de la seslingva flugfolio de UEA. Aperis centoj da artikoloj pri Esperanto kaj pri Zamenhof en naciaj, urbaj kaj fakaj gazetoj.

La Kongreso de BEA okazis en Londono dum Pentekosto, kun la ĉeesto de 300 Esperantistoj. En ĝia kadro okazis Zamenhof-festo, dum kiu paroladis D-ro Julian

Zamenhof, nevo de D-ro L. L. Zamenhof. Okazis dum la jaro tri prelegvojaĝoj de eksterlandaj esperantistoj kaj dek ekspozicioj pri Esperanto, organizitaj de lokaj grupoj. La Asocio daŭre reklamadis en diversaj periodaĵoj kaj regule aperigis sian monatan organon, "The British Esperantist". Ĝi represigis kaj dissendis 5000 ekzemplerojn de anglalingva eldono de la UEA-broŝuro pri la Zamenhof-Jaro.

Komercaj eldonistoj (neesperantistoj) eldonis novan lernolibron por anglalingvanoj ("Essential Esperanto") kaj aperigis novan eldonon de alia lernolibro ("Teach Yourself Esperanto"). Estis organizitaj multaj kursoj, fare de la grupoj kaj de la urbaj magistratoj, kaj krome la Asocio daŭre disponigis siajn skribajn kursojn.

5) **Bulgarujo.** Bulgara Esperantista Asocio. Nombro de la membroj 3.500; lokaj societoj 110 (75 urbaj, 35 vil.). Dum la jaro 1959 estis organizitaj 200 kursoj por komencantoj kun 3000 partoprenantoj. Por progresintoj estis malfermitaj 25 kursoj kun 300 partoprenantoj. Korespondajn kursojn partoprenis 650 komencantoj kaj 160 progresintoj. En la gazetaro aperis 84 diversaj propagandaj artikoloj kaj 74 mallongaj informoj. "Kurso de Esperanto" de Ivan Sarafov kaj Simeon Hespapčiev estis eldonita en 10.000 ekz.

La organo de la Asocio "Bulgara Esperantisto" aperis en 3000 ekz. ĉiumonate. La ilustrita riĉenhava revuo "Nuntempa Bulgario" estis eldonita en 18.000 ekz. ĉiumonate kaj bone akceptata en pli ol 60 landoj. La revuo "Bulgara filmo", eldonata de la Direkcio de la Bulgara kinematografio (multobligita en 500 ekz.) estas disvastigita en 70 landoj. La ŝtata turisma entrepreno "Balkanturist" eldonis 8 belegajn ilustritajn prospektojn en Esperanto: Sofio — kun plano de la urbo kaj ĝiaj vidindaĵoj, Pirin montaro, Rila montaro, Rodopi montaro, Varna, Nesebâr, Târnovo, Plovdiv. Esperanto-societo en Trojan eldonis glumarkon (80.000 ekz.). Radio Sofia daŭrigas la 25-minutajn disaŭdiĝojn en Esperanto ĉiudimanche — dufoje en la sama tago.

Dum 1959 la turisma fako ĉe la Asocio organizis reciprokajn interŝanĝojn de esperantistoj el Pollando, Rumanujo kaj Hungario. Multaj gastoj el diversaj landoj vizitis nian landon, ekz. el Ĉeĥoslovakio, Aŭstrio, Fin-

lando, Ĉinio, Vietnamio, Danlando, DDR, Svedio ktp. En 1959 la Asocio organizis departementajn konferencojn en vil. Rozino, en la urboj Popovo, Dimitrovo, Miŝajlovgrad, Pleven, Tolbuhin, Burgas, Blagoevgrad, kiuj kontribuis por pli bona organizado kaj disvastigo de la movado. La 34-a nacia kongreso okazos en Tárnovo, 9-12-an de julio 1960. La jubilean kongreson en Varsovio vizitis 220 bulgaraj geesperantistoj. La Bulgara Esperanta Teatro prezentis la komedion "Casantoj de oficoj" de Ivan Vazov kaj oni aranĝis bulgaran vesperfeston.

Prof. D-ro Osborn el Edinburgh, Britujo, vizitis nian landon kaj faris sciencajn prelegojn en Esperanto en la universitataj medioj en Varna, Sviŝtov kaj Sofia. Dum la jaro estis organizitaj 5 Esperantaj ekspozicioj kaj 37 vitrinoj en la pli grandaj urboj. En 1959 la Fremdlingva eldonejo eldonis la romanon "Bofilino" de la elstara bulgara verkisto Georgi Karaslavov, la informlibron "Bulgario", la broŝuron "15 jaroj da popola regado en Bulgario". La Asocio eldonis la romanon "Sub la jugo" de la bulgara verkisto Ivan Vazov kaj la vortarojn Esperanto-bulgara kaj Bulgara-Esperanta de Asen Grigorov.

Okaze de la Zamenhofa jaro estis nomitaj: en Varna: str. D-ro L. L. Zamenhof kaj aŭtobushaltejo "Esperanto"; en Asenovgrad — placo "Esperanto"; en Kubrat — str. "Esperanto"; "D-ro L. L. Zamenhof"; en vilaĝo Slavjanovo, reg. de Pleven — str. "Esperanto"; vil. Polski Trámbeŝ, reg. de Tárnovo — parko "Esperanto"; en Pazarĝik — aleo "Esperanto" en la urba parko; en vil. Govedarci, reg. de Samokov — loko en la ĉirkaŭaĵo "Esperanto"; en Jambol — str. "Esperanto"; en Sofia — str. "L. L. Zamenhof" kaj "Esperanto"; en Plovdiv — str. "D-ro L. L. Zamenhof"; en Kazanlák — str. "D-ro L. L. Zamenhof", dolĉaĵejo "Esperanto" kaj aŭtobushaltejo "Esperanto"; en Stara Zagora — str. "Esperanto". Apud la urbo Orjahovo sur Danubo estas insulo "Esperanto".

Dum la jaro estis organizitaj 89 publikaĵaj prelegoj, 28 vesperoj okaze de la jubilea Zamenhofa jaro. Estis eldonita Zamenhofa gazeto en 11.000 ekzempleroj.

6) **Danlando.** Centra Dana Esperantista Ligo. 1959 estis kontentiga jaro por la dana Esperanto-movado kaj Centra

Dana Esperantista Ligo, kies membronombro kreskis iomete al 1100 en 39 kluboj. La monata membrogazeto Dansk Esperanto-Blad aperis en 1100 ekzempleroj kun 124 paĝoj. La gazetara servo elsendis 18 dokumentojn kun 38 paĝoj en entuta amplekso de 2257 ekzempleroj al la ĵurnaloj. La dana gazetaro publikigis 800 artikolojn aŭ informojn pri Esperanto. Centra Dana Esperantista Ligo eldonis du novajn propagandilojn. La granda ĵurnalo Politiken aranĝis informprelegon pri Esperanto. En du urbetoj Centra Dana Esperantista Ligo sendis reklamilojn al ĉiuj familioj per la poŝto. En du Rotario-kluboj okazis prelegoj pri Esperanto. Danaj Statfervojoj reeldonis reklamilon en Esperanto, kaj la ministerio pri eksterlandaj aferoj decidis eldoni 36-paĝan informbroŝuron pri Danio en Esperanto en 5.000 ekzempleroj. La dana radio dufoje havis elsendojn pri Esperanto. La kursagado estis kontentiga; Centra Dana Esperantista Ligo eldonis korespondan kurson por daŭrigantoj. En Danio ni havas grandajn planojn pri enkonduko de Esperanto en la lernejoj; Centra Dana Esperantista Ligo kaj Esperanto-Asocio de Danaj Instruistoj oficiale turnis sin al la instruistaro pri la afero. Libro-Servo de Centra Dana Esperantista Ligo eldonis la libron "Tiel profunda estas la nokto" de Villy E. Risr en 1000 ekzempleroj. Pluraj eksterlandaj esperantistoj faris prelegvojaĝojn al la danaj Esperanto-kluboj, kaj du eksterlandanoj gvidis Ĉe-kursojn. La Kongresvojaĝa Sekcio de Centra Dana Esperantista Ligo aranĝis sukcesan karavanvojaĝon al la Universala Kongreso en Warszawa. En 1959 okazis la dana jarkongreso en Fåborg kun partopreno de inĝeniero Ludoviko Zamenhof; en 1960 okazos la dana kongreso paske en Frederikshavn. Zamenhofvesperoj okazis en multaj danaj urboj; plej brila estis la festo en Kopenhago kun 200 partoprenantoj, inter ili pluraj danaj ministroj kaj parlamentanoj kaj eksterlandaj diplomatoj.

7) **Francujo.** Informado: En la kadro de la Zamenhofa Jaro, estis uzita la Baza Dokumentoj de I.O.K. Ni presigis ĝin en franca lingvo je 10.000 ekzempleroj. Ni sendis ilin al niaj grupoj por la diversaj urbaj instancoj kaj instruista medio. Tiamaniere ili kontaktis favorajn personojn kaj tio estos tre utila por la estontaj agadoj. UEF sendis tiun

materialon al parlamentanoj, inspektoroj de lernejoj, akademiianoj ktp. Pro la politikaj ŝanĝoj, la peticio al la franca ministerio de Edukado, planita de André Ribot, ne havis ĝis nun sekvojn, sed ni esperas reuzi ĝin dank' al kelkaj favoraj politikistoj.

Paroladoj: Nia ĝenerala sekretario André Ribot faris 260 paroladojn en 95 urboj por 16.000 lernantoj kaj 250 instruistoj. Tio estas mirinda laboro, kiu certe efikas al nia propagando dum la proksimaj jaroj. Jam ni konstatis, ke la instruista medio pli kaj pli estas favora al Esperanto.

Popoluniversitatoj: S-ro Pierre Petit tre lerte kaj diplomate montris la mirindan utilecon de la Internacia Lingvo en neesperantistaj movadoj. Li interesigis diversajn gravajn personojn, kiel Prezidanton André Marie, iaman francan ĉefministron kaj, pro la fakto, ke P. Petit estas prezidanto de la Eŭropaj Popoluniversitatoj, li rilatas kun eminentuloj kaj ricevas ĝenerale simpatian aprobon.

Stratoj Zamenhof: Francujo havas la rekordon de la Zamenhofaj stratoj en la mondo kaj en 1959 du aliaj urboj inaŭguris straton: Baugé dank' al S-ro Micard, kaj Bourges-dank' al la grupo.

Instruado: Konforme al la decido de la Komitato de UEA kaj rezolucio de la Kongreso de Varsovio, UEF sukcesis organizi du oficialajn provojn de deviga instruado de Esperanto en lernejoj. Dank' al niaj klopodoj en Perpignan okazas deviga kurso de Esperanto en la seminarioj por instruistoj kaj instruistinoj. Plie, en Versailles, post klopodoj de S-ro Omont, kiun ni speciale gratulas, okazas 10 kursoj devigaj por infanoj 11-jaraĝaj kaj partoprenataj de 680 ĝelernantoj kaj pluraj ĝeinstruistoj. Fine, okazas en multaj urboj nedevigaj kursoj kaj inter ili ni deziras menci tiun de S-ino Vincent, kiu starigis klubon en sia lernejo kaj interesigis la gepatrojn de la knabinoj.

Unesko: U.E.F. havas konstantajn rilatojn kun UNESKO. Ni ricevas afiŝojn kaj artikolojn. Cetere UEF estas membro de la Komitato de la francaj branĉoj de la Neregistaraj Asocioj kaj S-ro Rougetet reprezentas nin en la laborkunsidoj.

Eldonaĵoj: U.E.F. eldonis nur informilojn en 1959 kaj ni estas tre dankaj al S-ro A. Ribot, kiu regule aperigas librojn kaj belajn afiŝojn.

Membraro: Por U.E.A. nia membraro ne multe ŝanĝiĝis: 2.074 anstataŭ 2.082 en 1958. Sed ni konservas la unuan lokon ĉe la delegitaro. Ni havas 274 delegitojn.

Nacia kongreso: 110 personoj aliĝis al la kongreso de Tours, kiu estis bone organizita de S-ro Motillon. Okazis pola vespero kun filmo kaj folkloro festo de Poloj, kiuj loĝas en la regiono. Ni serioze laboris kaj planis por la estonteco.

8) **Germanujo.** Germana Esperanto-Junularo, La Germana Esperanto-Junularo (GEJ) aranĝis dum 1959 jenajn renkontigojn: 4-an Internacian Junularkunvenon sur Feldberg (Nigra Arbaro), 6-an Interzonan Renkontigon en Berlin, Internacian Junularkunvenon en Scheveningen (Nederlando) kaj Internacian Seminarion pri Afrikaj kaj Aziaj Problemoj en Limburg/Lahn. En du grandaj internaciaj junularaj kongresoj neesperantistaj, okazintaj dum 1959 en Germanujo, GEJ organizis vastan informadon pri Esperanto.

9) **Hispanujo.** Hispana Esperanto-Federacio. La nombro de la membroj estas 678 kaj en la lando ekzistas 12 kluboj. La sekcioj, kiuj dependas de la Asocio estas 4. Funkcioj dum la jaro 23 kursoj kun 249 partoprenantoj. La hispanaj esperantistoj aranĝis 15 prelegojn; kaj unu landan kongreson en la urbo Malaga. Oni eldonis la Vortaron Esperanto-Hispanan de D-ro Ernesto Tudela, kaj S-ro J. Régulo Perez eldonis jenajn gravajn librojn: "Songe sub pomarbo" de Baghy, "Esperanta Antologio" de Auld, "Eroj kaj aliaj poemoj" de Boulton, "Lingvo kaj vivo" de Waringhien, "Nepalo malfermas la pordon" de Sekelj, "Pinta krajono" de Rossetti, "La bela subtera mondo" de Tell kaj "Ŝtupoj sen nomo" de Ragnarsson. Ĉi tio estis grava kontribuado en la Zamenhof-jaro de niaj laboremaj samideanoj D-ro Tudela kaj S-ro Régulo Pérez. Okazis kelkaj inaŭguroj de tabuloj por nomigo de Zamenhof-stratoj en Sabadell, Cheste kaj Valencia, kaj kiel kutime en ĉiuj jaroj oni solenis en multaj lokoj la tagon de la

naskiĝo de D-ro Zamenhof. S-ro Pérez Sempere opupiĝas pri la Libro-servo, grava fako de la Asocio, kiu klopodas alvenigi al ĉiuj anguloj de la lando la necesan materialon por la esperantistigo kaj distro de ĉiu interesulo.

10) **Italujo.** Itala Esperanto-Federacio. Ĝis la fino de 1959: 1.726 membroj en 58 grupoj. Sub la aŭspicio de Itala Instituto de Esperanto, estis organizitaj, dum la jaro 1959, en 33 urboj, 66 kursoj, el kiuj 41 ĉe lernejoj sidejoj, kiujn partoprenis 957 enskribiĝintoj. Krome, estas grupetoj kaj unuopuloj studentaj la lingvon, kiuj ne sendas informojn, pro kio ĝusta raporto estas malfacila. La informa laboro en Italujo, kiel kutime, disvolviĝis precipe en la gazetara kampo, kie ankoraŭfoje ni havis kreskon da bonsukceso, ĉar la tuto da artikoloj kaj informoj publikigitaj de la landaj gazetoj sumas je preskaŭ 1.200, el kiuj pli ol 330 pritraktas la Zamenhof-Jaron, kaj 97 parolas pri la Varsovia U.K. Ni insistis ĉe la urbaj E-grupoj por ke oni diskonigu E-afiŝojn kaj broŝurojn; multaj grupoj efektivigis tion. Plie, ni utiligis diversajn sistemojn por informi pri E., kiel la filmojn kun Esp-lingva sonoro (en 1959, projekciitaj tiuj de Nov-Zelando, Oslo, Mainz); projekcioj okazis precipe ĉe ŝtataj lernejoj kaj kulturaj societoj. Ni klopodis kontakti precipe kun "landaj" asocioj, kulturaj kaj "helpaj" por laboristoj, kaj tiucele ni bonsukcesis precipe kun Popolaj Universitatoj kaj kun laborista tutlanda asocio E.N.A.L.

En septembro okazis XXX Nacia E.-Kongreso en Florenco; tre bonsukcesa. En majo, jara Nacia Kunveno de E.-Grupestraroj, en urbo Mirandola, kie okazis samtempe internacia E.-renkontiĝo, okaze de ĝemeliĝo inter Mirandola kaj jugoslavia urbo Novi Sad. El la gravaj okazintaĵoj, ni ĉerpas: prelegvojaĝo de japana s-anino J. Kajino, tre bonsukcesa, tiel, ke okazis starigo de novaj E-kursoj en medioj ĝis tiam neinteresiĝintaj pri E.; multaj ekspozicioj estas aranĝitaj, precipe kun la temo "Z.-Jaro" (bonega tiu de Bologna), kaj multegaj montrofenestroj. Okaze de la naskiĝdatreveno de Zamenhof (decembro), Ministerio pri Publika Instruado sendis al ĉiuj italaj lernejoj (al ĉiuj provincaj studestroj, por ke oni diskonigu la aferon en ĉiuj lernejoj duagrada) telegramon, kun invito rememori D-ron L. L. Zamenhof.

Por la festo de Z-Jaro, oni precipe insistis, per aparta grandskala kampanjo, ke urbestroj donu la nomon de Z. aŭ de E. al loka strato kaj ni bonsukcesis ĉe 5 magistratoj, nome de urboj Alessandria, Mirandola, Ragusa, Reggio Emilia, Roma (ĉefurbo). Centoj da prelegoj okazis tiuteme, ankaŭ en Universitatoj, en Popolaj Universitatoj, ĉe landaj sekcioj de tutmondaj organizaĵoj. Radio kaj TV plurfloje raportis pri la datreveno de naskiĝo de Zamenhof.

11) **Jugoslavio.** Jugoslavia Esperanto-Federacio. Nombro de la membroj 6500, lokaj grupoj, kluboj, societoj 74. Jugoslavia Esperanto-Federacio konsistas el ses landaj ligoj (Kroatia, Zagreb, Poŝtfako 213; Slovenia Esperanto-Ligo, Ljubljana, Poŝtfako 275; Bosnia kaj Hercegovina, Sarajevo, Poŝtfako 163; Vojvodina Esperanto-Ligo, Novi Sad, Zmaj Jovina 4.II; Makedonia Esperanto-Ligo, Skopje, Poŝtfako 284). Oni taksas la nombron de esperantistoj en la lando je pli ol 10.000, sed estas organizitaj kaj pagas kotizon nur 6500. Ekzistas fakaj asocioj de junularo (JEJA), pedagogoj (JAPE), fervojistoj (JAFE), ĵurnalistoj (JEJA), medicinistoj (JEMA), kaj krom tio JEF havas jenajn komisionojn KKK (Komisiono por Kultura Kunlaboro kun aliaj popoloj), BID (Buroo por Informado kaj Dokumentado) kaj Lerneja Komisiono. Pri la instruado zorgas la Institutoj en la kadro de unuopaj ligoj. Dum la jaro 1959 estis gvidataj en la tuta lando 60 kursoj en la kadro de societoj kaj popolaj universitatoj al 1200 kursanoj, kaj krom tio Esperanto estis instruata en 84 lernejoj al 2300 gelernantoj. En la tuta lando ekzistas 74 kluboj aŭ societoj. Aperas jenaj gazetoj: "La Suda Stelo", socia, kultura kaj literatura revuo, "Jugoslavia Esperantisto", la oficiala organo de JEF, "La Propreso", junulara gazeto (kiu en la jaro 1960 kunfandiĝos kun JE), kaj "Jugoslavia Fervojisto", monata organo de JAFE. Dum la jaro 1959 aperis 440 artikoloj kaj 240 mallongaj informoj en la gazetoj, estis aranĝitaj 30 prelegoj pri Esp. aŭ Zamenhof kun 5000 ĉeestantoj por neesperantista publiko, 90 nacilingvaj radio-prelegoj aŭ informoj pri Esp. aŭ Zam. kaj 17 ekspozicioj kun 40.000 vizitantoj (de tiuj la vojaĝantan vizitis 30.000 personoj en 8 urboj). Aliaj metodoj de informado estis: artikoloj pri Esp. kaj Zam. en kalendaroj, kulturaj festivaloj respublikaj en Kragujevac kaj Ljubl-

jana, kaj la tutlanda en Opatija-Rijeka la 1-an de majo 1959 kun 650 partoprenantoj, el kiuj 350 en la programo, poste 2 koncertoj honore al Zamenhof-Tago (Novi Sad, Split kun 400 resp. 300 ĉeestintoj), ĝemeliĝoj kaj reciprokaĵoj vizitoj de E.-societoj Novi Sad kaj Mirandola, kunlaboro en la lanĉo de ŝipo "Zamenhof" k.s. Oni dediĉis apartan atenton al la junularo, instruistoj, gestudentoj, fervojistoj. Esperantlingvaj 20-minutaj jaŭdaj elsendoj de Radio-Zagreb en Esperanto daŭre okazas. Grava aŭdienco okazis ĉe reprezentanto de Jugoslavio en Honora Patrona Komitato por solenigo de Zamenhof-Jaro Krste Crvenkovski, ministro por kulturo en Federacia Registaro, la 8-an de junio 1959. Du gazetoj ekgvidis E.-kurson (IFJUSAG, SLOGA) honore al Zamenhof-Jaro, kaj Serbia Esperanto-Ligo eldonis la libron "Tempesto super Akonkagvo" de T. Sekelj kun aparta dediĉo al tiu jubileo. Eldona sekcio de SLEL eldonis la 200-paĝan libron "Esperanto kaj ĝia instruado en lernejoj" kun valoraj artikoloj de 10 eminentaj prelegantoj kaj fakuloj. Ĝi grave helpis la plialtigon de la nivelo de instruado en lernejoj, kiu plivastiĝis. Okazis prelegvojaĝoj de japana ĵurnalistino s-anino Joŝiko Kafino, S-roj Tibor Sekelj kaj Zeljko Takaĉ.

12) **Monako.** Esperantista Grupo de Monako. En Monako ekzistas nur unu grupo, 30 membroj. Unu kurso, 6 partoprenantoj.

13) **Nederlando.** Nederlanda Asocio Esperantista "La Estonto Estas Nia". Nombro de la membroj 972 (fine de 1959). Nombro de la sekcioj 28 (fine de 1959). Nombro de la kursoj ktp. en 1959: 12 kursoj por komencantoj 114 partoprenintoj; 7 kursoj por progresantoj, 37 partoprenintoj. Krome diversaj gazetkursoj kun entute 2800 part. Estis eldonita la Baza Dokumento: 5000 ekz. Senditaj al la parlamentanoj, lernejoj, lernejoj inspektoroj, komunumaj estraroj ktp. 6000 ekz. de la organo (Nederl. Esp.) en la ned. lingvo. Disdonitaj kaj senditaj al granda nombro da personoj. Artikoloj en diversaj grandaj ĵurnaloj (221 komunikoj, 83 artikoloj pri D-ro Zamenhof kaj Esperanto ĝenerale.

La Beneluxa Kongreso okazis en 1959 en Haarlem. Studkonferenco en Oosterbeek. Zamenhofa Kongreso en

Utrecht. Eroj de tiu kongreso estis disaŭditaĵoj de "Wereld Omroep" (P.C.J. monda disaŭdiga societo). Okazis prelegvojaĝoj de D-ro Mildwurf, kaj S-ro Ito. Krome vizito al div. sekcioj de S-ro Fethke kaj Prof. Lapenna. Diversaj sekcioj aranĝis Zamenhofajn vesperojn.

14) **Norvegujo.** Norvega Esperantista Ligo. Je la fino de 1959 Norvega Esperantista Ligo havis 22 lokajn grupojn kaj siume 731 membrojn. La Ligo havas apartajn komisiitojn aŭ komisionojn por korespondaj kursoj (E. P. Naess), por blinduloj (s-ino Aa. Sletterød), por ekzamenoj (C. Støp-Bowitz), por turismo (J. Selbekk), por instruistoj (K. S. Sandbekk), por Lerneja Kampanjo (J. Matland), por gazetara servo (s-ino E. Marland), por propagando kaj informado (L. Anjer), por radio (R. Bugge—Paulsen), por skoltoj (L. K. Hunnes), por interŝtataj organizaĵoj (R. Bugge—Paulsen), por junularo (V. Vik), por ekspozicioj (J. Matland).

La Ligo havas sliparon pri ĉiuj personoj, kiuj lernis Esperanton en nia lando. La sliparo estas preskaŭ komplete post 1930 kaj enhavas nun 9072 slipojn pri personoj en 624 lokoj en la lando. La monata gazeto "Norvega Esperantisto" aperadis regule dum la jaro en 600 ekzempleroj. Okazis en la lando 20 kursoj kun 180 partoprenantoj. La korespondaj kursoj havis proks. 100 novajn lernantojn. 4 personoj plenumis la elementan ekzamenon. Okazis 1 radioelsendo pri Esperanto. S-ro Eizo Ito faris dusemajnan prelegvojaĝon tra la suda parto de la lando. La kluboj festis la tagon de la Homaj Rajtoj.

La Gazetara Servo dissendis 26 artikoletojn kaj artikolojn al ĉiuj norvegaj taggazetoj kaj registris 718 aperojn en 140 gazetoj. Oni registris 4 propagandajn prelegojn kun proks. 200 aŭskultintoj, en ne-esperantistaj medioj (varbprelegoj antaŭ kursoj ne estas enkalkulitaj). Oni aperigis la unuajn numerojn de nova informgazeto nacilingva "Esperanto-nytt" (kvar 4-paĝaj numeroj jare), dissendata en 10.000 ekzempleroj. La Novembro-December numero de "Norvega Esperantisto" estis nacilingve redaktita kaj dediĉita al la Zamenhof-jubileo. Okaze de la Zamenhofa jaro aperis ankaŭ norvega traduko de la verko de Edmond Privat "Vivo de Zamenhof" (trad. Trygve Raimar). Pluraj kluboj efektivigis pli-malpli grandajn

aranĝojn okaze de la Zamenhof-jubileo. La plej granda kaj impona aranĝo okazis en la universitata aŭlo en Oslo en ĉeesto de 700 personoj; pri Zamenhof paroladis C. Stjep-Bowitz, festparoladon faris Ivo Rotkvić el Zagreb, cetera kunagis konataj artistoj k.a. La jarkunveno de N.E.L. okazis en Trondhejmo dum Junio.

15) **Nov-Zelando.** Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. Je la fino de 1959 la membraro de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio nombris 240 kaj aliĝintaj grupoj 11. Ekzistas ankaŭ pluraj malgrandaj studgrupoj, kaj multaj unuopaj esperantistoj en kamparaj lokoj tra la lando. Ĉiu grupo aranĝis almenaŭ du kursojn kaj la pli grandaj kluboj ĝis sep kursoj dum la studjaro de februaro ĝis novembro. Du semajnfinaj kursoj okazis — unu en Christchurch sub la aŭspicio de la Laborista Eduka Asocio, kaj alia en Palmerston North kiu pritraktis instruistajn aferojn en la kluboj.

Iom post iom la edukaj aŭtoritatoj favore rigardas la instruadon de Esperanto en la mezlernejoj. Dum la jaro kursoj por estontaj instruistoj okazis en la instruistaj kolegioj de Wellington kaj Auckland. Almenaŭ ok instruistoj gvidis kursojn en staj klasoj dum la flankokupa periodo. Okazis almenaŭ ses vesperaj kursoj en la lernejoj por plenkreskuloj. Aperadis regule en 500 ekzempleroj la dumonata organo de NZEA "The New Zealand Esperantist". La gazetaro bone raportis pri Esperanto dum la Zamenhof-Jaro, kaj almenaŭ 200 artikoloj kaj informoj aperis.

Okazis 15 ekspozicioj, kiujn proksimume 240.000 personoj vidis. Pli ol 20.000 folietoj, prospektoj kaj paĝindikiloj estis disdonitaj al interesitaj homoj. Ekspoziciojn de libroj NZEA organizis en ĉiu klubo dum la jaro. Je la 15-a de decembro, la diversaj kluboj kaj grupoj aranĝis fest-vesperojn, kaj NZEA apartigis unu vesperon dum la 25-a Nov-Zelanda Kongreso por memorigi la naskiĝon de nia majstro. La kongreso, kiun partoprenis 40 gesamideanoj, okazis en New Plymouth de la 28-a de decembro 1959-a ĝis la 1-a de januaro, 1960-a.

16) **Pollando.** Pola Esperanto-Asocio. La nombro de la filioj de Pola Esperanto-Asocio kreskis en 1959 ĝis 54

kun ĉirkaŭ 4500 membroj. En la Asocio ekzistas jenaj sekcioj: junulara, fervojista, instruista, ĵurnalista, kooperativista, katolika, kristana. Okazis 192 elementaj kaj daŭrigaj kursoj kun ĉirkaŭ 2350 kursanoj. Plue funkciis la koresponda kurso, al kiu aliĝis 250 novaj kursanoj. Funkciis tri lektoradoj ĉe superaj lernejoj. La Asocio por Ĝenerala Klerigado (TWP) estigis en Varsovio trijaran Esperantan studejon kun surloka kaj koresponda studado. Aliĝis 285 personoj. Rilato de la gazetaro estas tre favora. Multaj gazetoj aperigas konstantajn ĉiusemajnajn Esperanto-anguletojn kun informoj pri E-movado. En ĵurnaloj kaj revuoj aperis 135 artikoloj pri Esperanto, Zamenhof aŭ Zamenhofa Jaro kaj ĉirkaŭ 600 diversaj notoj. La Pola Radio kaj la Pola Televido donis 26 prelegojn en pola lingvo kaj 10 en Esperanto, dediĉitajn al Zamenhof-Jaro aŭ Esperanto. Dum la jaro okazis 48 publikaj kunvenoj en kiuj partoprenis ĉirkaŭ 8000 personoj. Estis aranĝitaj 9 ekspozicioj, kiujn vizitis ĉirkaŭ 7500 personoj.

La 1-8.VIII. 1959 okazis en Varsovio la 44-a Universala Kongreso de Esperanto kun 3256 partoprenantoj el 45 landoj. Dum la 44-a UK unu tago estis dediĉita al Zamenhof, okazis enmurigo de memortabulo ĉe la strato Zamenhof, funebra ceremonio ĉe lia tombo kaj solena vespero. Dank' al la Kongreso nia movado fariĝis vaste konata. Preskaŭ ĉiu plenkreskulo de nia lando eksciis pri la ekzisto de la lingvo internacia. Vekiĝis ĝenerala interesiĝo pri la problemoj. Okazis tri prelegvojaĝoj de s-ano Kho Khwatliat el Indonezio, de s-ano S. Hesapčiev el Bulgarujo kaj de s-ano G. Griniatsos el Grekujo.

Kaj jen mallonge aliaj niaj atingoj: La Pola Radio disaŭdigas ĉiutage duonhoran programon en Esperanto. Okazis konkurso de projektoj por Zamenhof-monumento starigota en Bjalistoko. En la Konkurso partoprenis 21 elstaraj landaj skulptistoj. Pluraj stratoj ricevis nomon de Zamenhof (Toruń, Radom, Siedlce, Slupsk, Góra Słaska) kaj Esperanto (Varsovio). Pola ŝipkompanio (Polaj Oceanaj Linioj) nomis novkonstruitan ŝipon (12.800 BRT) "Zamenhof". Estas farita filmo pri la 44-a UK en pola kaj Esperanta versioj. La Ministerio de Poŝto emisiis du Esperantajn poŝtmarkojn en kvanto 5.000.000 kaj 500.000 ekz. Diversaj ŝtataj eldonejoj eldonis: Albumon "Varsovio" — 5000 ekz.; "Pollando", informo libro, — 5000 ekz.;

"Pollando", monata revuo, — aŭgusto 1959; turismaj prospektoj kaj faldfolioj: "Warszawa", "Tatroj kaj Zakopane", "Nia belege Szczecin", "Karków" politika broŝuro: "Polaj Okcidentaj kaj Nordaj teritorioj". Ĉiu kongresano ricevis tiujn ĉi eldonajojn senpage. La ŝtata eldonejo "Wiedza Powszechna" eldonis: M. Ziolkowska "Doktoro Esperanto" pole kaj esperante — 8000 ekz.; T. J. Michalski "Esperanto-pola vortaro" — 10.000 ekz.; A. kaj I. Dratwer "Polaj-Esperantaj konversacioj" — 20.000 ekz.; J. kaj E. Fethke "1000 vortoj de Esperanto" — 10.000 ekz.; M. Guterman "Pola-Esperanta vortaro" — 4.000 ekz.; Jan Zawada "Fundamenta vortaro" — 5.000 ekz.; Medalo de Zamenhof (bronza kaj arĝenta) — 1.000 ekz.; Esperanta gramofondisko — 2000 ekz.; "Język Esperanto", unufoja gazeto en pola lingvo — 18000 ekz.

17) **Svedujo.** Sveda Esperanto-Federacio. 2018 membroj apartenas al 58 kluboj, kaj ili havas eblecon elekti inter diversaj sekcioj laŭ intereso. La nombro de kursoj estis 114 kun 1.225 partoprenantoj.

La informa fako registris ĉ. 1.000 artikol(et)ojn pri Esp. en la sveda gazetaro kaj notis pli ol 200 prelegojn pri Esp. antaŭ 11.000 neesperantistoj. Pluraj broŝuroj, afiŝoj ktp. estis distribuitaj, kaj pere de 4 ekspozicioj preskaŭ 200.000 personoj estas informitaj pri E. Nova naciilingva revueto "Esperanto-novaĵoj" aperas 4-foje jare kaj donas sciigojn al gravaj aŭtoritatuloj. Krom la federacia jar-kongreso okazis specialaj kunvenoj de la sveda sekcio de KELI kaj la junulara sekcio de SEF. Prelegvojaĝoj de A. S. Brockie, Skotlando, kaj S-ro Eizo Itoo, Japanujo, bonsukcesaj. Eldona Societo pretigis la bonan malgrandan vortaron de doc. E. Vilborg. "La Espero", la federacia gazeto, prezentis tre altnivelajn numerojn.

La Zamenhof-Jaro festita pere de 22 aranĝoj. Inter ili speciale gravaj la federacia en Lidköping kaj la urbaj en Stockholm kaj Malmö. Radioprezentado okazis en decembro. Sveda Esperanto-Instituto kunlabore kun Sveda Unesko-Konsilantaro kaj Sveda Instituto aranĝis en Frostavallen sukcesan prelegsemajnon pri "Landoj-Popoloj kun atento pri Orienta kaj Okcidenta kulturaj valoroj". Prelegis eminentaj I. Lapenna, N. Kawasaki, S. Pragano, T. Sekelj. Unesko kaj pluraj Unesko-

komisionoj informitaj.

18) **Svislando.** Svisa Esperanto Societo. Nombras 350 membrojn, ekzistas 13 lokaj grupoj, aktivas: EES (Esperanto-Edukistaro de Svislando), Junular-Sekcio de Svislando, Esperantistaj Fervojistoj de Svislando. Okazis 12 kursoj kun proks. 100 partoprenantoj. La jaro 1959 estis sub la jubilea stelo. En Svislando okazis pluraj manifestacioj neforgeseblaj. Okaze de la SES-Tagoj en Bielo ni honorigis D-ron L. L. Zamenhof. Svislando havis la plezuron gastigi japanan samideaninon, F-inon Joŝiko Kajino, kiu faris belegajn prelegojn kun lumbildoj pri Japanujo en 15 lokoj de nia lando.

En Bazelo okazis tre impona Zamenhofa festo, vizitita de eksterlandanoj el Francujo, Germanujo, organizita sub la iniciativo de S-ro D-ro Bader. Zürich same festis la datrevenon de Zamenhof en la Konservatorio; ĉeestis 60 personoj; la feston aranĝis la Prezidanto de la Zuriĥa grupo, S-ro Giannini. La plej multo de niaj grupoj aranĝis vesperon honore al D-ro L. L. Zamenhof dum la jubilea jaro. En Neuchâtel okazis grava kontakto-kunveno kaj ekspozicio en la kantona gimnazio, organizita de la Esperanto-Edukistaro, kies Prezidanto estas s-ro Gacond.

Pliaj prelegoj kaj ekspozicioj okazis en Berno, Interlaken, Frutigen, Flims, Konolfingen, Ländern. Prelegantoj estis: gesamideanoj Fischer, Hohl, Zuber Schmidheiny, gimnaziano Baur (filo de nia redaktoro) kaj Kuchen, kaj Krenger. En la svisaj radio-stacioj aŭdigis, krom la ĉiusemajnaj kutimaj sendaĵoj, specialaj prelegoj okaze de la 100-jara datreveno de D-ro Zamenhof de S-roj Prof. Edmond Privat kaj ĉef-redaktoro D-ro Arthur Baur.

Pli ol 300 artikoloj pri Esperanto aperis en la svisa gazetaro. Ni kredas, ke nia celo, sciigi al ĉiu sviso, kio estas Esperanto, estas preskaŭ atingita per la granda kampanjo de tiu jaro. Nia gazeto "Svisa Espero" aperis 7-foje dum la jaro. La Esperanto-Instituto en Berno laboregis dum la jaro kaj forsendis pli ol 2300 poŝtaĵojn. La librovendejo majstrita de S-ro Otto Walder en Romanshorn atingis rekordvendociferon, do bona signo por la svisa legantaro. Ekzamenoj okazis dum la somera feria kurso en Münchenwiler. 14 ekzamenatoj sukcesis, 6 ricevis la superan diplomon kaj 8 la ateston pri lernado.

La SES-Arĥivo estas daŭre zorge prizorgata de nia samideano S-ro Fritz Schwarz en Thun. S-ro Marcel Erbetta ĉiam laboregas kaj estas ĉiam granda entreprenanto en la tutmondaj interlernejaj randoj pere de "Grajnoj en Vento". La sekcio "Esperanto per Post" eldonis kurson de s-ro D-ro Baur enhavantan 20 lecionojn, kaj vendis 53 kursojn en 1959. SES ankaŭ mendis la germanan tradukon de la gazeto Jubilea Jaro por propagandi Esperanton.

19) **Urugvajo.** Urugvaja Esperanto-Societo. La Urugvaja Esperanto-Societo dum 1959 tenis sian antaŭan pozicion de agado sen rimarkindaj ŝanĝoj, krom en tio ke la celebrado de la Zamenhof-Jaro estis motivo aparta. Do, okazis 3 kursoj en la ĉefurbo (Instituto de Superaj Studoj, Instituto Artigas kaj Real de S. Carlos); funkciis regule la Informa Fako, kiu aperigis ĉ. 35 informojn en la gazetaro; la junula sekcio estis vige aktiva per diversaj aranĝoj; la organo "Boletín Uruguayo de Esperanto" aperis en 4 numeroj, la lasta de decembro dediĉita al Zamenhof.

3 ekspozicioj de E-aĵoj, 4 prelegoj aŭ paroladoj al ĝenerala publiko, 6 informoj aŭ intervjuoj per radio kaj televido kaj distribuo de proks. 1.200 flugfolioj kaj aliaj presajoj pri E. donas ideon de la ĝenerala aktiveco. Krome, la ĉefurba gazetaro estis atenta al la Zamenhof-Jaro per pluraj intervjuoj kaj aperigo de eĉ longaj artikoloj kun ilustraĵoj inter kiuj estas rimarkindaj tiuj aperintaj en la ĵurnalo El Día kaj en la oficiala organo de la ŝtata popola instruado "Anales de Instrucción Primaria". Artvespero en la salonego de la Universitato kun paroladoj de profesoroj Fernandez M., R. Reyes kaj C. Sabat Ercasty (beletra akademiano) fermis la aranĝojn de la Zamenhof-jaro sur nivelo de digneco. En la lasta semajno de 1959 oni prezentis panelon en la Internacia Ekspozicio de Turismo kaj distribuis proks. 1.000 propagandilojn al la vizitantoj; S-ro Grab paroladis pri Esperanto kaj Turismo.

20) **Usono.** Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko (ELNA). 400 membroj konstantaj. Ni ankoraŭ ne povas fondi reton de grupoj aŭ filioj lokaj kaj regionoj. S-ro Harmon servas

por kolekti adresojn de informpetintoj, kiujn ni konstante sendas al li ĉiunonate, sed ankoraŭ ne sukcesis ellabori planon por efika utiligo ilia. Estro kaj instruanto de nia per-poŝta kurso estas s-ro Louis Dormont, en Bruklino (Brooklyn), N.Y. Ni ankoraŭ dependas precipe de la laborado de s-ino Mary J. Gibson en Riverdale, Kalifornio, kiu konstante skribas kaj sendadas leterojn al redaktoroj de la plej gravaj ĵurnaloj tra la lando, kaj tie faras specialan kampanjon regione. La ĉiutaga fluado de informpetleteroj kaj -kartoĵoj, kaŭzita de ŝiaj leteroj, estas ege kontentiga.

Nia nacia kongreso sukcese okazis en St. Louis, Misouri, la pasintan jaron laŭkutime. La ELNA-Ekspozicion uzis efike la grupoj en Greenfield, Massachusetts kaj Meadville, Pa., kaj en Ĉikago. Grandaj Zamenhof-festaj publikaj kunvenoj okazis en Novjorko kaj en Los-Anĝeles. Okazis pluraj aliaj, sed pro la vasteco de la lando mankas informoj. Tri grandaj kaj dignaj artikoloj aperis en la New York Times pri Zamenhof kaj Zamenhof-Jaro.

II NEALĜINTAJ LANDAJ ASOCIOJ

1) **Ĉeĥoslovakujo.** Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato (CSEK). La preparaj laboroj por fondo de CSEK estis komencitaj en la dua duono de 1958; en 1959 la statuto de CSEK estis aprobita kaj publikigita en Bulteno de Ministerio de Lernejoj kaj Kulturo el la 31 Marto 1959. CSEK estas kunordiga organo kaj ĝia tasko estas helpi al la ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj (organizitaj en Esperanto-rondo ĉe kulturaj institucioj kaj entreprenaj kluboj kaj aliaj organizaĵoj) precipe ĉe la idea kaj faka edukado, prepari kaj certigi la eldonadon de Esperanto-materialoj kaj literaturo, organizi interŝanĝon de spertoj kaj labor-konferencojn, kaj reprezenti la ĉeĥoslovakajn Esperanto-movadon antaŭ la publiko kaj la aŭtoritatoj.

CSEK havas detalajn informojn pri ekzisto de 70 Esperanto-rondetoj kun 3.500 membroj. CSEK eldonas depost 1959 sian gazeton "Zprávy ČSEV" (Informoj de CSEK), kvarfoje en la jaro, en la ĉeĥa kaj slovakaj lingvoj. En 1959 aperis en ĉs. gazetoj 70 informoj, kiuj senescepte pozitive taksis Esperanton aŭ la laboron de la ĉs. esperantistoj. La memoro de Zamenhof estis honorata en

preskaŭ ĉiuj rondetoj. La ĉeĥoslovakaj stacioj Praha I, kaj Praha III elsendis en decembro 30-minutan scenfilmon pri Zamenhof. Laŭ nekompletaj informoj okazis en la nuna jaro 50 kursoj kun proksimume 800 lernantoj.

Granda malhelpo estas manko de lernolibroj kaj vortaroj; ĈSEK transdonis por presado ĉeĥan lernolibron kaj poŝvortarojn Esperanta-ĉeĥan kaj ĉeĥa-Esperantan. Samtempe ĝia vortara komisiono preparas la eldonon de grandaj vortaroj ĉeĥaj kaj slovaka. Prespreta estas la broŝuro pri Ĉeĥoslovakio sub la titolo "Juĝu vi mem!", ĝi aperos en printempo 1960.

Post kelkajara paŭzo estis renovigita la tradicio de someraj kursoj. La Esperanto-kolegio okazis en julio en banloko Lázně Bělohrad. La junularaj Someraj Esperanto-Tendaroj estis aranĝitaj ankaŭ en 1959. ĈSEK ĉeestis oficiale la jubilean kongreson en Varsovio; ĝin partoprenis ankaŭ nombra karavano ĉeĥoslovaka. La teatra kolektivo Verda Ĉaro el Praha prezentis tie en Esperanto "Pygmalion" de G. B. Shaw. La ĉefa tasko de ĈSEK por 1960 estas: organizi ĉiujn esperantistojn, unuigi ilian laboron kaj konformigi ĝin al la novaj kondiĉoj. En la dua etapo: renovigi la internacian kontakton kaj pliintensiĝi la propagandan laboron.

2) **Israelo.** Esperantista Ligo en Israelo. La israela esperantistaro ankoraŭ ne povas fieri pri tre vigla agado. Tamen oni povas aserti, ke post multjara stagnado, la esperantista vivo en la lando sendube plivigligiĝis. La membroj de Esperantista Ligo en Israelo, omaĝe al la Zamenhof-Jaro montris renovigitan aktivecon kaj, dank' al tio ni povas nun raportiti pri certaj atingoj. ELI estas jam lauleĝe agnoskita landa organizaĵo. ELI posedas jam kunvenejon (str. Kaliŝer 48, Tel. Aviv), kun propra ŝranko-biblioteko kaj kun 2 ŝildoj. Ni interligis kontakton kun ĉiuj konataj esperantistoj pere de leteroj, cirkuloj kaj bultenoj, dank' al kio revenis al la movado pluraj iamaj aktivuloj de Palestino Esp. Ligo. Dank' al oftaj sciigoj pri nia agado en la gazetaro kaj radio, troviĝis konekta rinda nombro de malnovaj sed antaŭe nekonataj en la lando s-anoj, estintaj aktivuloj eksterlande. Multaj el ili aliĝis al ELI.

Ni aranĝas ofte kunvenojn kun specialaj programoj.

Speciale menciindaj estas: La 7-a Landa Konferenco, okazinta en aprilo 1959, partoprenita de ĉ. 70 ges-anoj, el kiuj 40% partoprenis ĝin je la unua fojo. La Jubilea Zamenhofa solenaĵo okazis la 15-an de decembro 1959, vespere kun ĉ. 70 partoprenantoj el nur Tel Aviv kaj ĉirkaŭaĵo. Prezidis D-ro J. Beĥar, kaj prelegis s-anoj J. Ben Alter, K. Perlman, A. Geršater kaj reprezentanto de la "Franc Kurski" — biblioteko. Okazis riĉenhava arta parto, konsistanta el deklamoj, kantoj kaj speciala muzik-koncerto de 10 gelernantoj de muziklernejo sub la gvidado de ges-anoj Svarsenski.

Estas gvidataj elementaj kursoj en 7 lokoj: Jafo, Kfar Saba, Ejn Karmel, Petah Tikva, Hajfa, Saar Hagolan kaj Tel Aviv. Estis aperigitaj dulingvaj (hebr. kaj esp.) kovertoj kun la portreto de D-ro Zamenhof. Sentiĝas konkreta helpo de oficialaj kaj duonoficialaj institucioj, ekz.: a) La estraro de la biblioteko "Franc Kurski" permesis al ni uzi senpage la kunvenejojn. b) La estro de la lernejo "DOV-HOZ" en Jafo iniciatis fondi tie Esperanto-rondon, aranĝinte kurson kun 25 partoprenantoj. c) La Loka Konsilantaro de KFAR SABA aranĝis prelegon pri Esp. kaj elementan kurson. La Radio "Kol Israel" aŭdigas ofte favorajn elsendojn pri Esp. kaj D-ro Zamenhof. En nia kunveno okazis multaj intervjuoj de ĵurnalistoj el la diverslingva israela gazetaro. Preskaŭ ĉiuj gazetoj aperigis unu aŭ plurajn artikolojn pri nia lingvo. Ĉ. 50 personoj el diversaj lokoj (plejparte junuloj) skribis al ni pri sia deziro lerni Esperanton kaj postulis aranĝi skriban kurson.

La Zamenhof-Jaro en Israelo ne finiĝis kun la novjaro 1960, ĉar laŭ la hebrea datilsistemo D-ro Zamenhof naskiĝis en la jaro 5620, do la tutan jaron 5720 (ĝis oktobro 1960) ni konsideras Zamenhofa.

3) **Kanado.** Kanada Esperanto-Asocio. Nombro da membroj: Ordinara kaj grupaj: 75, Komencantoj 60. Lokaj grupoj aliĝintaj al K.E.A.: La Esperanto-Klubo de Toronto, Toronto, Ontario; la Centro de Esperanto en Montrealo, Montreal P.Q.; Regina Esperanto-Grupo, Regina, Saskatchewan; Esperanto-Klubo de Spy Hill, Spy Hill, Sask.; Sekcio de la Esperanto-Asocio de la Maurice, Trois-Rivières, P.Q. Lokaj grupoj ne-aliĝintaj: La Esperanto-Asocio de la Maurice, Trois-Rivières, P.Q.; la Kebeka Esperanto-Klubo, Quebec, P.Q. Precizaj statistikoj

mankas rilate la nombron de kursoj dum la jaro, sed certe ĉiu grupo okazigis po unu kurson, almenaŭ. La Asocio de la Mauricie, en kunlaboro kun la tiea seminario donis diplomojn al la sukcesaj kursanoj.

La 1-a Kongreso de la K.E.A. okazis en junio en Montrealo. 27 gesamideanoj ĉeestis. Estis aprobite okazigi plian kongreson en 1960 ĉe Oakville, Ontario. La Kongreso ankaŭ instigis la ŝanĝadon de la nomo de la organo de la Asocio de "La Kanada Lumo" al "Kanada Esperanto-Revuo"; la oficialigon de Esperanto Press kiel la Libro-Servo de la Asocio kaj favoran voĉdonadon por la eventuala aliĝo de K.E.A. al U.E.A. Dum la jaro "The Commonwealth", ĉiusemajna gazeto eldonita en Regina, Sask., daŭre eldonis reklamojn pri K.E.A. kaj bone helpis diskonigi la lingvon en la okcidentaj provincoj. Someron, la Esperanto-Domo, posedado de G-roj R. Eichholz, malfermis sian pordon al la Esperanta mondo per impona ceremonio. Tie, la G-roj Rüdiger kaj Vilma Eichholz presadis diversspecajn presaĵojn en kaj pri Esperanto, zorge klopodis pri la Magnetofono-Servo de U.E.A. kaj Libro-servo. Aldone, per intensa kampanjo en la Oakville-regiono, ili ankaŭ sukcese fondis "La Oakville Esperanto-Klubon" antaŭ la fino de la jaro. Ĉe "Esperanto Press" oni eldonadis la revuon "Bulteno Gepatra" kaj la organon de la kanada fako de la Mondfederalistoj.

En oktobro, dank' al la instigo de la Esperanto-Asocio de Mauricie, la urbaj instancoj oficialigis la nomigon de strato en Trois-Rivières — "Rue de l'Esperanto". Tia sukceso reprezentas la unuan tian "Esperanto-Straton" en Kanado. La Toronto-Klubo aranĝis sukcesan "Zamenhof-feston" kie pli ol 30 gesamideanoj ĝuis longan programon de paroladoj, muzikaĵoj ktp.

4) **Suda Azio.** Sudazia Esperanto-Federacio. Dum 1956-59 la Esperanto-Movado revigligis kun la alveno de S-ro T. Sekelj, la speciala sendito de la Universala Esperanto-Asocio je Roterdamo en Nederlando, kaj de Svami Aniruddha. Svami Aniruddha, grandanima budhana monaĥo kaj sperta, entuziasma esperantisto, fondis la Bombajan Esperanto-Societon kaj gvidis ĝin kiel ĝia sekretario. Post lia foriro el Bombajo al Hoshiarpur en la Pungab-Stato de Hindujo li estasdas vigla ankaŭ tie. S-ro T. Sekelj laboris tre multe, prelegvojaĝante en la vasta

regiono de Hindujo, fondante Esperanto-grupojn kaj societojn, intervjuante eminentulojn kaj ŝtatestrojn, konigante Esperanton en ĉiuj eblaj manieroj. Fine la 2-an de majo 1958 li fondis la Sudazian Esperanto-Federacion por krei iun ligilon inter ĉiuj unuopaj sudaziaj esperantistoj kaj Esperanto-grupoj kaj societoj. Postnelonge alvenis la Cseh-instruistino S-ino M. Haudebine je la sugesto de S-ro T. Sekelj kaj kun helpo de la U.E.A. Tiu ĉi malofta Esperanto-misiisto faris multon por kreskigi kaj fortigi la Esperanto-Movadon en Hindujo. Konsekvence de revigligo de la Esperanto-Movado kun la alveno de la alilandaj esperantistoj, speciale de S-ro T. Sekelj, iĝis tre viglaj iuj hindaj Esperantistoj, inter kiuj menciindaj estas jenaj: D-ro Rama Hegde, S-ro H. B. Audich, kaj Prof. Sinha. Inspirita de Svami Aniruddha D-ro Hegde pri organiza agado kaj S-ro H. B. Audich pri instrua agado estas viglaj je Bombajo.

5) **Venezuelo.** Venezuela Esperanto-Asocio. La Asocio nombras 50 membrojn. En 1959 okazis: 2 kursoj kun entute 60 partoprenantoj. Ĉiusemajne aperas en la plej grava ĵurnalo de la lando artikolo aŭ informoj pri Esperanto. Okaze de la Zamenhof-Jaro oni honorigis en diversaj radicelesendoj la aŭtoron de Esperanto.

III FAKAJ ASOCIOJ KUNLABORANTAJ

1) **Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj.** Dum 1959 la Asocio daŭrigis la klopodojn arigi la juristojn-esperantistojn en IAJE, kiel erojn de vasta reto tra la mondo, tute speciale kiel jurajn fakdelegitojn de UEA (nun entute 20). Je la fino de 1959 IAJE havis 84 membrojn — ordinaraĵojn aŭ eksterordinaraĵojn — en 23 landoj. La kontakto inter la Plenum-Komitato kaj la membroj okazis pere de cirkuleroj, enhavantaj interalie kompletan adresoliston de la membroj.

IAJE havas tre bonajn rilatojn kun la Unuiĝo de Internaciaj Asocioj en Bruselo. Ĝi daŭre kunlaboras kun UEA kaj petis la akcepton de la Asocio kiel sekcio de ISAE.

Dum la jaro 1960 la Asocio daŭrigos la laboron arigi la juristojn, aranĝos diskuton kunvenon kaj ĉefkunvenon en Bruselo, klopodos trovi definitivan solvon de la problemo pri aperigo de jura terminaro en la Internacia

Lingvo, kaj cetera laboros por la celo de la Asocio per celtaŭgaj rimedoj.

2) **Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (L.I.B.E.)** La Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE), havas ĉ. 700 membrojn. Dum la jaro ĝi ekhavis delegiton en plia lando: Kanado. Registritaj estas nun 10 landaj asocioj aliĝintaj, sed individuajn membrojn la Ligo havas en ĉ. 30 landoj, inkluzive de Japanujo, Hindujo, Aŭstralio.

La instruado de esp. al blinduloj okazas ĉefe pere de la kursoj, plej ofte perkorespondaj, de la landaj asocioj. LIBE konsilas, harmoniigas kaj laŭpove helpas. Tamen laŭ enketo farita de la Helpsekretariino (en kunlaborado kun ILEI), Esperanto estas instruata ankaŭ en blindul-lernejoj, devige en "Royal Normal College for the Blind", Anglujo, "Institut Benjamin Constant", Brazilo; "Dalen Off. Skole for Blinde", Norvegujo, kaj nedevige en la blindul-lernejoj de Villeurbanne apud Lyon, Francujo kaj Tomteboda apud Stockholm, Svedujo. Certe ankaŭ en aliaj lokoj, pri kiuj mankas informoj ĝis nun. La ĉefa tasko de LIBE dum la jaro estis daŭrigi la publikigon de sia organo "Esperanta Ligilo", blindulfaka kaj kultura monata revuo en brajla skribo. Tio estis grava tasko, post la morto de nia pioniro H. Thilander. En Varsovio dum la U.K. la blinduloj havis plurajn laborkunsidojn, kaj kvankam en Belgujo ni havas nur malmultegajn, disajn membrojn, LIBE organizas en Bruselo la 30-an Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj.

Kiel kontribuon al la Zamenhof-Jaro, LIBE aperigis en sia organo dum la tuta jaro artikolojn pri D-ro Zamenhof kaj lia verko. Tiujn artikolojn ĝi reprodiktis el diversaj gazetoj kaj publikigaĵoj. Pere de siaj landaj sekcioj, ĝi eĉ sukcesis publikigi kelkajn tiurilatajn artikolojn en neesperantistaj blindulgazetoj. Krome, malgraŭ multaj malfacilaĵoj pro la morto de ĝia fondinto kaj gvidinto, LIBE sukcesis reakiri la "Internacian Esperanto-Brajan Bibliotekon". Nun tiu grava fako funkcias en kunlaborado kun la "National Library for the Blind" en Londono. Fine oni povis reeldoni kelkajn verkojn en brajlo, kaj la franca sekcio, en kunlaboro kun tiea porblindula presejo, publikigis, unuafoje en brajlo, la verkon de Zamenhof "Proverbaro Esperanta".

La ĉefa evento en 1959 por la blindaj Esperantistoj estas

la unuanima alprenado, fare de la Tutmonda Konsilantaro por Bono de la Blinduloj (internacia organizo neesperantista) de grava rezolucio.

3) **Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.** La membroj de I.L.E.I. estas la membroj de la membro-asocioj. En landoj, kie ne estas membro-asocio, individua instruisto povas esti membro, kondiĉe ke li abonas "Edukado Internacia"-n, la organon de I.L.E.I. En la fino de la oficiala jaro, julio, 1959, la membro-asocioj estis: Aŭstrujo, Britujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Italujo, Japanujo, Jugoslavio, Svedujo, kaj Svislando, kun proksimume 2252 membroj. Krome en Bulgarujo, Hispanujo, Israelo kaj Usono, niaj reprezentantoj raportis 252 geinstruistojn. Do, en 14 landoj, almenaŭ 2504 geinstruistoj. De kelkaj reprezentantoj ni ne havas statistikon. Laŭ informoj de niaj respondintaj reprezentantoj estis minimume 207 lernejoj kursoj en 16 landoj, kun ĉ. 6616 gelernantoj ĝis la aĝo de 21 j. De post la fino de nia oficiala jaro, Bulgarujo, Nederlando kaj Pollando aliĝis, kiel membro-asocioj.

Niaj publikaj kunvenoj en Varsovio dum la U.K. estis elstaraj kaj pro entuziasmo kaj nombroj (ĝis 160). La unuan fojon reprezentanto de la Ministerio de Edukado ĉeestis kaj salutis. Nacia Instruista Sindikato akceptis nian komitaton. Evidentiĝas, ke pli da gekolegoj kun pozitivaj spertoj partoprenas la diskutojn. Tre grava estis la invito de la Mondkonfederacio Organizaĵoj de la Instruista Profesio al I.L.E.I. sendi observanton al ties Konferenco en Washington, D.C.31/VII - 7/VIII. Nia reprezentanto en Usono, S-ro George Falgier, bonvole akceptis, kaj pere de taktoplena, energia kaj sindonema agado, ludis gravan rolon. Altvaloraj librodonaĵoj de S-roj Falgier kaj Setälä estis publike agnoskitaj kaj restas en la Sidejo de la Konfederacio. Nia partopreno nepre bone efikos ĉe la eminentaj partoprenintaj asocioj.

Nia organo "Edukado Internacia", redaktoro S-ro Oskar Svantesson, daŭre publikigas niajn farojn individuajn kaj grupajn, tiel kunligante nin kaj plifortigante nian komunan agadon. La "Geonkla Skemo" funkciis kun 77 geonkloj kaj 105 genevoj el 21 landoj. Por daŭre sukcesigi la projekton, estas necese, ke lernejoj kapablas mem skribi leteron. Ni daŭrigas nian subtenon al "Grajnoj en

Vento* kaj kunlaboras kun multaj organizaĵoj kaj unuopuloj tra la tuta mondo.

4) **Skolta Esperantista Ligo.** En 1959 Skolta Esperantista Ligo aktive laboris en Naciaj Sekcioj en Aŭstralio, Belgujo, Britujo, Danlando, Nederlando kaj Usono, kie oni eldonas landajn bultenojn. Ankaŭ el Norvegujo kaj Svisujo oni raportis pri aktiva agado. Nova Nacia Agento por Sud-Afriko estis nomita. La Ligo nun havas 19 Agentojn en 17 landoj. Elstara aktiveco raportigas el la Usona Sekcio, kiu organizas fakojn kun apartaj estroj por informo, instruado, eldono, propagando ktp. La sekcio jam havas 60 anojn kaj esperas, ke en 1960 oni atingos 100. La sekcio organizas Mondan Trupon en kiu la Patrolanoj venas de apartaj landoj. La Patrolanoj interkomunkigas per leteroj, sonbendoj ktp.

"La Skolta Mondo" aperis en februaro kaj enhavis artikolon "40 Jaroj de Esperanto en la Skolta Movado" de nia Prezidanto, S-ro T. L. Van Gulek. Enketo pri Esperanto kaj la Ligo venis de estrarano de la Skolta Asocio de Brita Kolumbio. La Centra Komitato organizas kunvenon en 1960 dum la U.K. en Bruselo.

5) **Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio.** Antaŭ la Jubilea Kongreso T.E.K.A. iam forta kaj vigla organizaĵo, en lastaj jaroj, ekzistis nur laŭnome. La partoprenintoj de dumkongresa fakunveno, decidis reorganizi la Asocion kaj vigligi ĝian agadon. Oni elektis novan estraron. La nuna jaro estas dediĉita por la organizado de la Asocio. Estas fiksita konstanta adreso de Sekretario, kiu ricevas vadas dekojn da leteroj. Jam reaparis, post kelkajara paŭzo, la oficiala organo de T.E.K.A. "Medicina Revuo", eldonata en Japanujo, kaj estas jam presitaj du numeroj.

Estas kreita la Terminologia Centro, kies kunlaborantoj prilaboras ampleksan medicinan vortaron Esperantan (se eble multlingvan). Vic-Prezidanto de ĉeĥoslovakaj invalidoj komencis en T.E.K.A. — kadroj la sociale sanitaran laboron. En kelkaj fakaj revuoj aperadas esperantaj resumoj. El aliĝkotoj enpagitaj de polaj TEKA-anoj oni aĉetis librojn, revuojn k.t.p. kaj sendis ilin al Japanujo por rekompenci almenaŭ parte la kostojn de la presado de "Medicina Revuo".

6) **Universala Ligo.** La Universala Ligo estas Asociita

Membro de la "Mondasocio de Mondfederalistoj" (World Association of World Federalists), kies internacia centro estas en Hago, Nederlando. Burgemeester Patijnlaan 49. La nombro de la membraro de U.L. kreskis al 12450 membroj. En la jaro 1959 aliĝis 18 novaj Dumvivaj Aktivaj Membroj.

La jarkunveno de U.L. okazis la 30-an de majo 1959 en Arnhem, Nederlando, en la kadro de la "Semajnfina Renkontiĝo" de la "Loka Esperanto-Kunlaborkomitato". Post la pritrakto de la tagordo F-ino D-ra C. M. Burger, direktorino de la Nederlanda Oficejo "Esperanto ĉe la Instruado", parolis pri "La homaj rilatoj en la ŝtato Israelo kaj la lingvoproblemo".

U.L. estis reprezentata en la 10-a Internacia Kongreso de la Mondasocio de Mondfederalistoj, okazinta en Oosterbeek, apud Arnhem, Nederlando, de 17-22 aŭgusto 1959. Por la unua fojo montriĝis granda interesiĝo pri Esperanto dum ĉi tiu kongreso, verŝajne, ĉar ne okazis samtempa tradukado. Estis nur du traduklingvoj, la angla kaj la franca. Ke la germanoj protestis, estas komprenebla afero. La parolado de nia japana samideano S-ro Eizo Ito en Esperanto kun traduko en anglan lingvon multe impresis la ĉeestantaron. Entute ni povas konstati, ke la ideoj de mondfederalismo kaj Esperanto, kiuj estas tre interigitaj, pli kaj pli populariĝas.

Por faciligi la pagojn, U.L. nun havas proprajn poŝtkontojn en la sekvantaj landoj : Danujo : Kopenhago n-ro 4916, Germanujo : Kolonjo n-ro 161031, Italujo : Romo n-ro 1/35112, Nederlando : Den Haag n-ro 408826, Svedujo : Stokholmo n-ro 74175. La organo de U.L. "La Praktiko" aperis ĉiumonate. En ĝi aperis detala raporto pri la Jubilea Universala Kongreso, okazinta en Varsovio kaj pluraj artikoloj pri D-ro L. L. Zamenhof. Konstante disvastiĝas la uzo de la internacia mono de U.L., la "Stelo" (Premikupono).

7) **Veterana Esperantista Klubo.** V.E.K. daŭre funkcias en Dunstable, Britujo, registrante Veteranojn kun pli ol 40-jara scio de Esperanto por sia kartoteko, kiu enhavas pli ol 600 nomojn de fruaj batalintoj. Aldona listo de novaj VEK-anoj kiuj registriĝos antaŭ la unua de julio estos publikigata antaŭ la jarkunveno kiu kutime okazas ĉe la

U.K. (Kosto de registrado 1 rpk.) Dum pasinta Pentekosto kunvenis la Britaj VEK-anoj en Londono.

La fondinto de VEK, Mauricio Lewin, ankoraŭ agas kiel Sekretario sed pro sia alta aĝo li deziras trovi volontulon kiu transprenos tiun taskon kiam li ne plu kapablos ĝin plenumi.

IV. NENEŬTRALAJ ASOCIOJ KUNLABORANTAJ

1) **Kristana Esperantista Ligo Internacia** (K.E.L.I.) havis dum la jaro 1959 landajn sekciojn en Britujo, Danlando, Finnlando, Francujo, Germanujo, Japanujo, Jugoslavujo, Nederlando, Norvegujo, Polujo, Svedujo, Svislando kaj Usono. Krom en tiuj estas ankoraŭ anoj en diversaj aliaj landoj. Entute la nombro de la membraro estas proksimume 950. Ni bedaŭras, ke la kontakto kun niaj anoj en la landoj malantaŭ la fera kurteno ĝenerale ne estas facila. Koresponda adreso de K.E.L.I. estas ĉe la sekretario F-ino T. Putto, Bennekomsweg 20, Ede (Gld), Nederlando. Prezidanto estas s-ro H. A. de Hoog, Archimedesweg 68, Amsterdam, Nederlando. Kasisto estas s-ro Ingvar Lagerström, Kungsgatan 33, Alingsås, Svedujo.

La celo de nia ligo ankaŭ en la pasinta jaro estis persvadi la anojn de la reformitaj eklezioj pri la valoro de la lingvo Esperanto en la internaciaj rilatoj. I.a. ni serĉis kontakton kun "La Mondkonsilantaro de la Eklezioj" en Genevo, Svislando. Nia ligo kunlaboras en la elsendoj de radiaj stacioj Hilversum Nederlando kaj IBRA, Svedujo.

Antaŭ la U.K. en Varsovio K.E.L.I. organizis kongreson en kastelo Nijenrode, Nederlando. La kongrestemo estis: "La Atomepoko koncernas nin ĉiujn". La kongreso estis tre sukcesplena. Dum la U.K. en Varsovio K.E.L.I. organizis kaj prizorgis la kongresan diservon en la antikva reformita preĝejo "La Sankta Triunuo". Predikis nia ano pastoro Fritz Renheim, Djura, Svedujo. Post la diservo okazis renkontiĝo kun la anoj de la Varsovia protestanta komunumo.

La organo de K.E.L.I. "Dia Regno" aperis monate. Redaktoro estas s-ro C. P. Brakké, Karel Doormanlaan 24, Uithoorn, Nederlando. Ankaŭ en 1959 la sveda sekcio profitis pro la multaj prelegvojaĝoj de s-ino Anna Sandgren-

Alamo en Svedujo. Same en la aliaj sekcioj K.E.L.I. daŭre atentigis la neesperantistajn kristanojn pri la neceso de internacia kontakto. La kunlaboro kun U.E.A. estis tre bona kaj ni kune profitis pro tiu ĉi interhelpo.

2) **Kvakera Esperantista Societo**. Nombro de la membroj: 120. Informa kaj propaganda Laboro: Eldono de 200 bultenoj, "Kvakera Esperantisto", kvaronjara; sendita al 21 landoj. Jarkunveno okazis je Pentekosto en Londono. Administra Kunveno, en julio 11a en Ventnor, I.W. Estis eldonita flugfolio "Kiu estas la Kvakeroj?"

Kompilis A. Rajski, Estrarano pri Landaj, Fakaj kaj Neneŭtralaj Asocioj.



Aliĝu kun viaj amikoj kiel M.A. aŭ M.S. por ke vi ĉiuj ricevu la

INTERNACIAN REVUON

„**ESPERANTO**”

KIAL?

Ĉar ĝi

- ★ pritraktas problemojn de Esperantismo;
- ★ alportas valorajn artikolojn de ĝenerala intereso;
- ★ enhavas literaturajn kontribuojn de elstaraj verkistoj;
- ★ donas informojn el la tuta Esperanto-Movado;
- ★ helpas vin orientiĝi en la Esperanto-literaturo per fidindaj librecoj;
- ★ publikigas anoncojn kaj reklamojn el la tuta mondo;
- ★ akurate aperadas ĉiumonate;
- ★ per sia Oficiala Informilo kompletigas la Jarlibron;
- ★ estas la oficiala organo de UEA.

Redaktorino : KIRSTEN ZACHO

Petu specimenan ekzempleron ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Eendrachtsweg 7, ROTTERDAM-2, NEDERLANDO

**La medicina scienco ĉiam pli progresas !
La meza aĝo de la homo fariĝas de tago al tago pli alta ! Do,**

Kial

VI NE FARIĜU DUMVIVA MEMBRO DE U.E.A. ?

La kotizo estas nur 20-oblo de la kotizo de Membro-Abonanto.

Sendube vi intencas resti pli longe ol 20 jarojn fidela membro de U.E.A.

Se vi estas juna, la Dumviva Membreco estos al vi tre profita. Post 20 jaroj senpage vi restos Membro-Abonanto de U.E.A.

Se vi estas jam neĵuna sed sana kaj iom atentos la trafikon, ankoraŭ la Dumviva Membreco estos profita al vi, ĉar eventualajn postajn kotizaltiĝojn vi ne pagos. Krome — vi helpos la Asocion kaj tio donos moralan kontentiĝon.

Tial

FARIĜU DUMVIVA MEMBRO DE U.E.A. !

Ĝis la 31-a de decembro validas la kotizo 1960, do 250.— gld. aŭ egalvaloro !

SPECIALAJ SERVOJ

DE U. E. A.

MAGNETOFONA SERVO

Turnu vin al S-ro R. Eichholz, Esperanto-Press, Oakville (Ontario) KANADO.

★

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Turnu vin al la nova adreso : F-ino C. Hueter, 12 rue des Jacobins, Clermont-Ferrand (P.d.D), Francujo.

★

FILMA SERVO

Turnu vin al S-ro G. C. Fighiera, ĉe la adreso de la Universala Kongreso aŭ ĉe U.E.A.

Aĉetindaj Libroj kaj Objektoj:

- ☆ **ORIGINALA VERKARO** de D-ro L. L. Zamenhof, kompilita de J. Dietterle
12,75 gld.; 51 steloj
- ☆ **LETEROJ DE ZAMENHOF**, I kaj II, kompilita de G. Waringhien
po 9.— gld.; 36 steloj
- ☆ **VIVO DE ZAMENHOF**, Edmond Privat,
3.25 gld.; 13 steloj
- ☆ **LA ESPERANTO-MOVADO**, Støp-Bowitz kaj Isbrucker
2.— gld.; 8 steloj
- ☆ **BILDO** de Zamenhof, laŭ gravuraĵo de R. Rossetti, 21 × 27 cm.
0.75 gld.; 3 steloj (Vidu p. 7 de Jarlibro 1959, Unua Parto)

Ĉio akirebla ĉe U.E.A.

ANGLA ANTOLOGIO

1000 - 1800

Redaktoroj

WILLIAM AULD

RETO ROSSETTI

320 paĝoj; bindita

Prezo : 10.— gld.; 40 steloj

ELDONA FAKO DE U.E.A.

UNIKA VERKO PRI FAMA LITERATURO

Legu la recenzojn en la Esperanto-gazetaro kaj
mendu ĝin ĉe U.E.A.!

En la hejmo de ĉiu esperantisto troviĝu

RETORIKO

kun aparta konsidero al esperanta parolarto
de

IVO LAPENNA

Ĝia unua parto donas perfektan argumentadon pri
la lingvoevoluo, utiliga al ĉiu esperantisto.

Eldono de la
Aŭtoro

Prezo : 11 gld.,
44 st. bind.

9.- gld.
36 st. broŝ.

LIBROSERVO
DE U.E.A.



Ĉiu esperantisto deziras posedi la belegan kajeron :

BELARTO

Redaktis : William Auld

Riĉa enhavo pri :


- ★ *LITERATURO*
- ★ *PENTRARTO*
- ★ *MUZIKO*
- ★ *LINGVISTIKO*
- ★ *KULTURAJ ARTISKOLOJ*

Multaj talentaj verkistoj kontribuis por certigi al ĉiuj legantoj plezurajn horojn.

Al membroj de U.E.A. tiu ĉi valora kajero kostas nur 2,75 gld. (11 stelojn)
por nemembroj : 3,25 gld. (13 stelojn)

Restas limigita kvanto.

RAPIDE MENDU ĈE U.E.A. !



Universala Esperanto-Asocio

Eendrachtsweg 7

— Rotterdam-2

— Centra Oficejo

— Nederlando

ENHAVO

- 3 Harrogate - 46-a U.K.
 4 Sekretoj de la Marestaĵoj
 5 Antaŭparolo
 6 Rezolucio
 7 La Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro
 8 Ĝenerala Regularo (aldono)
 9 Kotizoj 1961
 14 Komitato de U.E.A.
 17 Honora Patrona Komitato
 17 Estraro de U.E.A.
 18 C.E.D.
 19 Int. Esperanto-Muzeo, Wien
 20 Financoj
 30 Raporto de la Estraro
 30 I. Enkonduko
 31 II. Ĝeneralaĵoj
 33 III. Administrado kaj Financoj
 37 IV. Gazeto
 38 V. Kongresoj
 42 VI. Eksteraj rilatoj
 47 VII. Informado
 51 VIII. Zamenhof-Jaro
 54 IX. Specialaj Kulturaj Aktivecoj
 57 X. Esperanto kiel baza kaj komplementa lingvo
 60 XI. Junularo
 61 XII. Ĝenerala Trarigardo
 63 XIII. Konkludo
 65 Raporto de C.E.D.
 70 Aldono : Raporto de Landaj, neneŭtralaj kaj
 Fakaj Asocioj
 100 "Esperanto"
 101 Kial ? Tial !

ELDONAĴOJ de U.E.A.

Angla Antologio 1000 - 1800

Redaktoroj : William Auld kaj Reto Rossetti
Majstroverkoj de fama literaturo nun alireblaj
por ĉiuj nacioj
320 p. Prezo : 10.- gld. (40 steloj)

Belarto

literatura-kultura aldono al la Revuo "Esperanto"
Redaktoro : William Auld
Multaj ilustraĵoj, kolorbildo, muziknotoj ktp.
72 paĝoj
Prezo : 3.25 gld. (13 steloj)
Por ind. membroj de U.E.A. : 2.75 gld. (11 steloj)

Vagado sub Palmoj

de Jean Ribillard
Vojaĝimpresoj pri la dezerto
Ege taŭga legaĵo por kurso de progresintoj
Prezo : 2.50 gld. (10 steloj)

Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro

Redaktis : Prof. I. Lapenna
Eldonis C.E.D.
Prezo : 12.50 gld. (50 steloj)

AMASE VARBU APOGANTOJN

Varbu viajn amikojn, konatojn, kolegojn kiuj simpatias kun Esperanto, sed ial ne havas okazon mem lerni ĝin. Ili volonte pagos unufoje en la vivo moderan sumon por kontribui al la venko de la Internacia Lingvo

Apoganto pagas 5 gld. aŭ 20 stelojn kaj ricevas Atestilon.

Mendu libreton enhavantan 10 atestilojn ĉe U.E.A.,
Eendrachtsweg 7 - Rotterdam

PLIFORTIGU NIAN ASOCION!